PACO



MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO (MEM)

Bulteno de la MEM-sekcio de GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO (GDR) · 1974



La vero pri la puĉo en Ĉilio:

Sanga komploto de la monopoloj

Heredo: Dependa ekonomio, mizero
Jen la heredaĵo de la kristan-demokratia registaro sub prezidinto Frei al Unidad Popular (Unuiĝo Popola).

Stagnado kaj krizo
- Dum alta plukresko de la nombro de la enloĝantoj inter 1964 kaj 1970 pojare altiĝis
  - la kuntara naciprodukto per nur 2,5 procentoj,
  - la industria produktaro per 3,8 procentoj.
- La agrikulturo stagnas, vivnecesas importoj de nutraĵoj
- Ĉirkaŭ 4000 milionoj da dolaroj kiel ŝuldoj al eksterlandoj. La inflacia kreskonombro estas 35 %

Profitegoj de la konzernoj
- La plej ĉefaj industrioj estas en la mano de la eksterlanda kapitalo (Usono, FRG k.a.)
- Profitegoj estas akiritaj: la usona kuprokonzerno Kennecott akiris dum 1955–1970 pojaran dividendo de 52,87 procentoj.

Socia mizero
- 300 000 da senlaboruloj (8,3 procentoj)
- 500 000 senloĝejaj familioj
- ekstreme alta infanmortado

Estonteco: Sukcesoj de la UP-programo
La ĉilia popolo estis sufiĉe fitedita de ĉi „benoj" de siaj en kaj eksterlandaj regantoj. La 4an de septembro 1970 ĝi voĉdonis por la kandidato de Unidad Popular, d-ro Salvador Allende, por la 40-punkta programo de la Unidad Popular, por:
- la senpotencigo de la eksterlandaj konzernoj
- la naciigo de la ĉiliaj tertrezoroj
- la ŝtatigo de la bankoj kaj bazaj industrioj
- la konsekvenca agrara reformo
- la disponigo de novaj laborlokoj
- la konstruado de novaj loĝejoj por la laboruloj

Lakto, pli altaj salajroj, pano
La UP-kabineto sin montris inda je la konfido de siaj balotintoj.

Al la unuaj faroj de UP apartenis:
- ĉiutage duona litro da lakto senpage por ĉiuj infanoj sub 15 jaroj
- 35 procenta plialtigo de ĉiuj salajroj kaj dungopagoj, la minimumaj salajroj plialtiĝas per 66 procentoj, porfamiliaj pluspagoj duobliĝas





Jen ĝi aspektas: La faŝista generala kliko, nun murdanta en Ĉilio. La puĉestro Augusto Pinochet Ugarte en la rondo de siaj kunmurdistoj.
Foto: Zentralbild

Iliaj viktimoj: gvidaj reprezentantoj de la UP-registaro en la koncentreja insulo Dawson.
Foto: Zentralbild

Bruligo de libroj en Santiago... kiel 1933 en la faŝisma Germanio
Foto: Zentralbild

- Novaj lernejoj por 800 000 infanoj
- Terposedaĵo trans 80 hektaroj estas dividata inter la kamparanoj

Kontraŭrevolucio: Krei kaoson

Anaconda (Anakonda) kaj Hertie (Herti), eksterlandaj monopoloj kaj enlanda oligarĥio vidas siajn profitojn nuliĝi. Ilia ĉefa celo: Neniigo de Allende, de la UP-registaro. Ilia metodo: Krei kaoson kiel pretekston por ŝtatrenverso.

ITT, CIA kaj Blanka Domo

- La estroj de la ITT-konzerno (kapitala investaĵo en Ĉilio: 200 milionoj da dolaroj) proponas en 1970 al la usona registaro unu milionon da dolaroj por komploto celanta malebligi la oficiĝon de Allende. Oni aktivigas CIA-n, konsultas la Blankan Domon.
- En 1971a la kupromonopoloj per helpo de Vaŝingtono sabotas la pagbilancon de Ĉilio.
  - La mondmerkata prezo por kupro estas manipulata. Ĝi malkreskas de 750 da sterlingaj pundoj (marto 1970) al 394 st.p. (novembro 1971), sed kreskas post la puĉo ĝis 850 st. p. (14a de septembro 1973)
  - Ŝipoj kun naciigita kupro estas konfiskataj de tribunaloj de Usono kaj okcidenteŭropaj ŝtatoj kun aprobo de la registaroj.
  - Ĉiuj kreditoj por Ĉilio estas blokataj.
  - La kontoj de Ĉilio en Usono estas blokataj.

La sekvo: La valutoj de Ĉilio por importoj de nutraĵoj malabundiĝas. Oni volas krei malsaton.

FRG-ambasadoro ĝis „FAZ"

- FRG-ambasadoro Osterheld kaj „Konrad-Adenauer-donacaĵo" en 1970 prosperigas la ĉilian reakcion per plena ankaŭ financa subteno.
- En 1971 la „Frankfurter Allgemeine" (Frankfurta Ĝenerala [gazeto]) FAZ – postulas: „La komercado, antaŭ ĉio la importo de kupro, estu plej rapide novdirektata." Tuj la FRG-importoj malkreskas per 20 procentoj.
- La FRG-registaro samjare stagnigas la „evoluigan helpon" por Ĉilio kun jeso de la ministroj Scheel (Ŝel) (FDP, liberal-demokratia) kaj Franke (SPD, social-demokratia)
- FRG-entreprenoj rompas la kontraktojn kun Ĉilio por damaĝi ĝian ekonomion.

Strikoj, murdoj, atencoj

Man-enmane kun la deeksteraj atakoj la interna reakcio ekmarŝas:

- Almenaŭ 630 milionoj da dolaroj eksterlandiĝas per organizita kapitalfuĝigado.
- „Nigraj Merkatoj" (= kontraŭleĝaj) por valutoj kaj retenitaj nutraĵoj estiĝas.
- Strikoj de transportistoj, privatkomercistoj, teknikistoj, aviadistoj kaj partoj de la kuprolaboristaro organiziĝas.
- La produktado de la privata industrio malpliiĝas, investaĵoj haltas, kamparoj senplantiĝas.

La perdojn de la burĝaro bankoj en Usono kaj okcidenta Eŭropo rekompencas pli ol malavare. Ili pagas ĝis duoblo de la normala salajro.

Politika teroro aliĝas al la ekonomia kaoso:

- murdatencoj al UP-politikistoj
- eksplodaj-atencoj kontraŭ elektrostacioj kaj partikonstruaĵoj
- provokitaj stratotumultoj

La 22an de aŭgusto sekvas la antaŭlasta frapo:

La dekstra plimulto en la kongreso ri-

- firmigo de luprezoj kaj prezoj de bazaj nutraĵoj
- novaj ŝuoj por duona miliono da infanoj
- la bakistoj devas baki bonan, malmultekostan, unuecan panon. La infanmortado malkreskas per 20,1 procentoj ĝis la fino de aŭgusto 1971.
- 260 000 da homoj denove havas laboron.

Rompita potenco de la konzernoj

La bazo por tio: naciigo de kupra minado kaj fandado, ŝtatigo de 23 privataj bankoj, teksaj konzernoj, cementfabrikoj, ferercaj kaj karbaj minejoj.

La sukceso: La industria produktado en 1971 kreskas per 12 procentoj, la kuntara socia produkto per 8,5 procentoj. La inflacia kreskonombro malkreskas ĝis 22 procentoj. La senlaboreco atingas staton ĝis nun plej malaltan (3,7 procentoj). Loĝejoj kaj lernejoj.

En 1972a oni sukcese daŭrigas la batalon kontraŭ mizero:

- Estiĝas 140 000 da novaj loĝejoj





Junto-teroro en Ĉilio. Ek de 11. 7. 73 bravaj virinoj kaj viroj estas arestataj, perfortataj, torturataj . . . Foto: Zentralbild

proĉas al la UP-registaro senpruvaĵe „rompon de la konstitucio". Pri tio komento de la 2a televido de FGR: „Tio signifis instigon de puĉo".

Se devas morti 20 000 . . .

La faŝisma organizaĵo „Patria y Libertad" (demagogie: „Patrio kaj libero") minacas: „Se devas bruli ĉi tiu lando dum la saviĝo kaj se tial 20 000 ĉilianoj devas morti – ni faros".

Unue kaoso en la ekonomio, nun amasmurdo – por savi potencon kaj profiton!

Je la 11a de septembro ĉi tiu minaco realiĝas:

- Prezidanto Allende murdiĝas, oni akcelas ĉason al UP-ministroj, komunistoj, socialistoj, miloj da patriotoj. Al ĉiu, kiu staras fidele al la laŭkonstitucia registaro, minacas „tuja ekzekuto".
- Brutece murdiĝas per bomboj, tankoj kaj raketoj centope la laboristoj, kiuj sin defendas en siaj fabrikoj kontraŭ la puĉuloj.
- Multaj miloj estas arestitaj kaj forrabitaj, egalmultaj ankoraŭ persekutitaj. La reakcio volas pereigi per brutala perforto ĉion, kio rememorigas pri la trijara regado de Unidad Popular, pri la granda espero de jarcente torturita kaj subpremita popolo.

Ekonomia blokado, organizita malsato, stabe planita amasmurdo — jen la respondo de la imperiismo pri batalo de popolo por pli bona, homeca vivo. La ĉilia popolo suferas nedireble sub la teroro de la puĉuloj. Ĝi suferas repuŝon en sia batalo sed tiu ne estas daŭra. La liberiga movado de la popoloj estas nehaltigebla!

Liberecon por Luis Corvalán kaj ĉiuj enkarcerigitoj!

(Trad. laŭ div. dokumentoj de Michael Lennartz)

Isabel Allende, filino de la murdita prezidento

La lasta renkontiĝo en la prezidenta palaco

. . . Mi havis malfacilaĵojn ricevi permeson eniri la palacon mallonge post la 9a horo. Mi estis avertita, ke estus okazinta puĉo fare de la armeo. Tio renkontis nekredemon ĉe mi. Sente mi kontraŭis la penson, ke tio estas vera. Sed ŝaltinta la radion, mi aŭdis la lastajn vortojn de prezidento Allende disaŭdigitajn de la patriota radiodisaŭdigilo, kiun poste silentigis bomboj kaj maŝinpafado. Alvenante la palacon La Moneda, mi trafis plurajn intimajn kunlaborantojn de mia patro, plurajn ministrojn kaj eksministrojn volantajn resti ĉe la flanko de la prezidento. Ne kolektiĝis la tuta kabineto ĉar kelkaj kabinetanoj jam estis arestiĝintaj en siaj loĝejoj aŭ survoje al laboro. Ĉeestis ankaŭ anoj de lia persona gvardio. Kelkajn momentojn post mia eniro mi vidis, ke mia patro aperas. Tio profunde tuŝis min. Li eniris la Toesca-salonon kaj diris siajn lastajn vortojn al kelkaj ĉeestantoj. Malmultajn minutojn poste alvenis tankoj kaj kanonoj, kaj maŝinpafiloj komencis pafadon. Kaj en la Toesca-salono troviĝis la viro, kiu estis batalinta dum multaj jaroj por krei potencan popolan movadon, la viro, kiu estis dum multaj jaroj la fonto de ideoj, defendis la unuecon, akcentis la neceson levi la politikan konscion de nia popolo. Ĉi viro, kiu tiel amis la pacon, ne la fikcian specon sed pacon interne de nova socia ordo, kiu estis kreskinta en Ĉilio el la batalo kontraŭ malriĉeco kaj maljusteco, kontraŭ la ekspluatado de la homo per la homo, por vere homeca kaj justa socio kiel tiu, kiu volis krei, malfermante la pordojn por socialisma estonteco, ĉi viro, kiu estis ege batalinta por ĉi idealoj per fortaj kaj klaraj vortoj, kiujn li poste ripetis – ĉi viro estis firma kaj neŝancelebla. Vestita per pulovro, ŝtalkasko sur la kapo kaj pendiginta maŝinpistolon sur la korpon, tiu estas la



lasta bildo, kiun mi havas de li. Li diris al ni, ke la membroj de la ĥunto je mateno de ĉi tago estis proponintaj al li la eblecon forfuĝi el la lando kun siaj familio kaj plej intimaj kunlaborantoj. Li respondis al ili honore kiel ĝusta revoluciulo: „Tio validas por militaj krimuloj kiel vi, sed ne por viro kun principoj kiel mi. La ĉilian popolon mi neniam perfidis kaj neniam perfidos." Li tiam diris, ke li estus kaptinta decidon. La decidon batali ĝisfine, malakcepti la perfidon. Li aldonis, ke la revolucio ne okazas per senutilaj agoj. Li petis la kamaradojn, kiuj ne sciis uzi armilon aŭ ne posedis armilon, li petis nin, siajn filinojn, el kiuj du ĉeestis, kaj plurajn kamaradojn ĵurnalistojn forlasi La Moneda-n. Sed li petis aliajn resti ĉe li kaj batali kun li. Tiam li aldonis, ke la historio de Ĉilio nun eniras novan epokon. Nova paĝo skribiĝos, kiun devas daŭrigi kaj fini la popolo de Ĉilio kaj la tuta latinamerika kontinento – ĉe tio li ĉiam koncernis la kontinenton kiel tuton.

Plenkonscie, ke li probable mortos en la palaco, li aldonis krome: „Gvidanto povas morti sed ne la afero." Tiam li direktis al la ĉilia popolo ardan apelacion pri unueco. Pri unueco ne nur per vortoj sed ankaŭ per agoj. Pri neceso organizi kaj daŭrigi la batalon.

Se vi permesas al mi, mi ŝatus rediri al vi personan interparolon, kiun li havis kun mi kaj mia fratino. La situacio estis drama kaj ni ne volis forlasi la palacon. Ni pensis, ke ni restas ĉe li eĉ se tio signifas, ke ni mortos ĉe lia flanko. Li diris al ni la jenajn rimarkigindajn vortojn: „Se mi havus elekteblon, mi ne estus ĉi tie. Mi estus aliloke por daŭrigi la batalon. Sed mi estas ĉi tie en la palaco La Moneda, kie devas esti laŭkonstitucie balotita prezidento kaj nur post mia morto ili povos forpeli min el ĉi-tie. Mi neniam kapitulacios antaŭ perfiduloj."

Mi pensas, ke ĉi simplaj sed klaraj vortoj estas la pripensado de viro, kiu kaptis la decidon batali ĝisfine, de viro, kiu mortis en batalo, ĉar tiel li mortis. Li mortis batalante. Batalante kiel viro kun firmaj principoj, kiel ĝusta batalanto. Li uzis sian armilon. Ni kapablis restigi komunikan ligon kun kamaradoj, kiuj estis ĉe li ĝisfine kaj postvivis kaj rakontis al ni la historion de tiuj lastaj horoj. Mi pensas, ke estas pravigite raporti al vi pri tio, ĉar vi eble ne scias, kio okazis, kiel li kondutis dum la jenaj lastaj momentoj. Nevidante sian apelacion pri la daŭrigo de la batalo – ĉar li sciis, ke li probable mortos – la afero devas daŭri. Li diris al ni, siaj fratinoj, ke ni havas moralan devon forlasi la palacon por postvivi, por daŭrigi la batalon. Li mem volis resti en la palaco kun malgranda grupo de kamaradoj. Li petis plurajn el siaj kunlaborantoj, kiuj ne estis batalantoj, forlasi la palacon kaj savi siajn vivojn. Li petis ankaŭ, ke malgranda grupo de lia gvardio restu. Kaj ili restis kune por batali du aŭ tri horojn en palaco, kiu bombadiĝis kaj brulis. Lia konduto estas ekzemplo, pri kiu ĉiuj memoriĝu, ekzemplo, kiu ebligis al liaj plej intimaj parencoj pludoni lian mesaĝon. Kaj ni havas la kuraĝon fari tion Estas devo. Estas ekzemplo por la tuta ĉilia popolo, kiu rezistas ekde la unua momento kaj kiu plue rezistados. Liaj kamaradoj raportis, kiel prezidento Allende, la viro, kiu tiom amis la pacon, kiu volis eviti civitanan militon, entreprenis ĉiujn penojn por plenumi profundajn ŝanĝojn per laŭkonstituciaj rimedoj sen apliko de perforto. Sed vidante tiutage la perfidon, kies viktimo li iĝis, vidante tiutage kiel la reakcio, la armeo kaj la imperiismo – ĉiuj unuiĝintaj per siaj interesoj, – rompis la konstitucion de nia lando, neniigis ĉiujn eblojn de paca solvo, li decidis preni la armilon kaj doni al ni ĉiuj ekzemplon por la batalo. Li rezistis kun granda kuraĝo dum du aŭ tri horoj, donante ekzemplon por la maniero kiel oni rezistu. Li mortis batalante. Li mortige leziĝis kaj ricevis plurajn pafojn. Liaj plej intimaj kamaradoj ĉirkaŭkovris lian korpon per la prezidenta flago, simbolo, kiun la ĉilioj ne rajtas forgesi kaj ne povas forgesi. Ili faris tion kiel heroecan agon koste de sia vivo por postlasi simbolon de tio, kio estis prezidento Allende kaj kion li prezentos estontece. Ĉar, kvankam li estas mortinta, nia afero ne estas mortinta, kaj tio estas la plej grava.

(Trad. M. Lennartz)

La unua tago de la puĉo. La bombadita de la faŝistoj prezidenta palaco.
Foto: Zentralbild





Dr. Salvador Allende Gosses, prezidento de Ĉilio

Foto: Zentralbild

La lastaj vortoj de prezidento Salvador Allende

Kuncivitanoj!

Probable tio estas la lasta okazo, ke mi povas turni min al vi. La aerarmeo bombadis la sendturojn de Radio Portales kaj Radio Corporación.

Miaj vortoj ne havas amarecon sed seniluziiĝon. Ili estos morala puno por tiuj, kiuj perfidis sian ĵuron: soldatoj de Ĉilio, enoficigitaj armeestroj, admiralo Marino, kiuj enoficigis sin mem, sinjoro Mendoca, ĉi fiula generalo, kiu ankoraŭ hieraŭ konfesis sian fidelecon kaj sindonecon al la registaro kaj kiu hodiaŭ sinfaris ĝenerala direktoro de la karabenuloj.

Vide de ĉi faktoj mi ne povas ne certigi al la laborantoj: Mi ne rezignos!

Metita en periodon de transiro, mi pagos per la vivo mian fidelecon al la popolo. Kaj mi diras al vi: Mi havas la certecon, ke la semaĵo, kiun ni plantis en la indan konscion de multmiloj da ĉiloj, ne povas elŝiriĝi. Ili havas la perforton, ili povas subpremi nin. Sed oni ne povas haltigi la socialajn procedojn per krimoj, nek per perforto.

La historio estas nia, ĝi skribiĝas de la popoloj.

Laborantoj de mia patrio!

Mi dankas vin pro la konstante certigita fideleco, por la konfido, kiun vi metis al viro, kiu nur estis la korpiĝo de la sopiro al justeco, kiu donis sian vorton estimi konstitucion kaj leĝojn, kaj kiu faris tion. En ĉi decida momento, la lasta, en kiu mi povas turni min al vi: Ĉi instruo tuŝu vian koron, enmemoriĝu. La eksterlanda kapitalo, la imperiismo, unuiĝinta kun la reakcio, kreis la klimaton por ke la armeo rompu kun la tradicio, kiun instruis al ĝi generalo Ŝneider kaj plifortigis la Comandante Araya (Komandante Araja). Ili iĝis viktimoj de la sama sociala sektoro, kiu hodiaŭ embuskas rekonkeri la potencon per fremda helpo por tiel defendi siajn proprietaĵon kaj privilegiojn.

Mi turnas min antaŭ ĉio al la simpla virino de nia lando, al la kamparanino, kiu kredis al ni, al la laboristino, kiu plilaboris, al la patrino, kiu sciis niajn zorgojn pri la infanoj. Mi turnas min al la scienc-teknika intelektularo de nia lando, al ĉiuj patriotoj inter ili, kiuj ekde tagoj laboras kontraŭ la konspiro de la profesiaj asocioj, tiuj klasaj asocioj, kiuj nur defendas la avantaĝojn, kiujn la kapitalisma socio donas al kelkaj el ili.

Mi turnas min al la junularo, al tiuj kiuj kantis, kiuj pledis per gajeco kaj batalemo. Mi turnas min al la viroj de Ĉilio, la laboristoj, kamparanoj, intelektuloj, al tiuj, kiuj estos persekutataj; ĉar en nia lando la faŝismo furiozas jam ekde multaj horoj per teror-atencoj, eksplodigas pontojn, blokadas fervojajn liniojn kaj detruas oleajn kaj gasajn kondukilojn.

Kontraŭ tio staras la silentado de tiuj, kiuj havis la devon kontraŭagi tion. La historio juĝos ilin!

Certe Radio Magellañes (magejanjes) estas silentigita, kaj la kvieta sono de mia voĉo ne atingos vin. Tio faras nenion, vi plue aŭdos min, mi ĉiam estos inter vi, almenaŭ la memoro pri mi, pri indulo, kiu estis fidela al la afero de la laboranta popolo. La popolo sin defundu sed ne sin oferu. La popolo ne subjugiĝu kaj torturiĝu sed ĝi ankaŭ ne humiliĝu.

Laborantoj de mia patrio!

Mi kredas je ĉilio kaj ĝia estonteco. Aliaj post mi venkos ankaŭ ĉi amarajn kaj malhelajn momentojn, en kiu la perfido provas venki. Ili sciu, ke pli frue ĝustatempe ol poste veraj homoj marŝas sur larĝaj stratoj por konstrui pli bonan socion. Vivu Ĉilio! Vivu la popolo! Vivu la laborantoj! Tiuj estas miaj lastaj vortoj. Mi estas certa, ke mia ofero ne estas vana. Mi estas certa, ke tio estos almenaŭ morala Leciono, kiu punas malkuraĝon kaj perfidon.

Trad. M. Lennartz

Eĉ la murditan prezidenton ili ankoraŭ timas. Sekrete enterigita en Valparaiso, sen memoriga tombŝtono, sed peze gardita de soldato ... Foto: Zentralbild



La murdigo de Victor Jarra



de Mark Arnold-Forster

Viktor Jarra, la konata ĉilia popola kanzonisto. Malgraŭ brutegaj torturoj nerompita li verkis mallonge antaŭ sia murdiĝo en la koncentrejo „Stadiono de Ĉilio" kanzonon, kiu priskribas la neimageblan teroron de la ĥunto: „La sango de nia kamarado prezidento batas pli forte ol bomboj kaj maŝinpafiloj kaj tiel ankaŭ nia pugno rebatos . . .

Foto: Zentralbild

Victor Jarra estis la filo de ĉilia kamplaboristo. Per propraj penoj li fariĝis unu el la plej bone konataj teatro – produktantoj kaj poste kantisto de nacia famo. Li subtenis la Allende-registaron kaj estis mortigita 40-jaraĝa en la Estadio Chile, Santiago, verŝajne de aerarmeanoj.

Victor Jarra postlasas vidvinon, Joan Jarra, naskita en Anglio, kaj du filinojn en aĝoj de 9 kaj 13 jaroj, kiuj nun, dank' al la ŝtataneco de Joan Jarra, estas en Anglio. Ŝi donis al la „Guardian" jenan raporton pri la morto de sia edzo:

La 11-an de septembro je la 9-a horo matene la Jarra-anoj eksciis el la radio, ke soldatoj ĉirkaŭis Valparaison. Tiun ĉi tagon Victor Jarra estis atendata en la konstruaĵo de la Teknika Universitato por kanti okaze de la malfermo de ekspozicio, kiu ilustris la terurojn de interna milito. Victor Jarra foriris el la loĝejo por iri al la universitato. Li diris, ke tio estus io de li farenda. Pli poste sinjorino Jarra eksciis de hejmensenditaj virinoj, ke ĉiuj, kiuj estis kolektiĝintaj okaze de la malfermo, estis retenitaj ĝis la mateno de merkredo, la 12-an de septembro. Tiam forta trupkontingento ĉirkaŭis la grupon de la ankoraŭ tie restintaj ĉirkaŭ 600 studentoj kaj profesoroj, grupon ĉe kiu ankaŭ troviĝis Victor Jarra. Victor Jarra ne havis pafilon, li nur havis gitaron. Oni diris, ke jam en la konstruaĵo de la Teknika Universitato multaj studentoj estis mortigataj kaj ke oni devigis la postvivintojn kuŝiĝi sur la planko.

Tiutempe la rektoro kaj multaj membroj de la docentaro ankoraŭ vivis. Poste, merkrede, oni kondukis la postvivintojn al la Estadio Chile, kiu situas proksime de la Teknika Universitato. Sinjorino Jarra tiutempe sciis nenion de ĉi-tio. Sed ŝi ekkonis, ke ŝia edzo devis esti kaptito. Ŝi telefonis kun pluraj amikoj kaj aŭdis, ke kelkaj el ili, ĉefe virinoj, estis hejmensenditaj el la konstruaĵo de la Teknika Universitato. Tiel ŝi eksciis, kio tie estis okazinta. Nun sinjorino Jarra kaj ŝiaj filinoj nenion plu aŭdis, ĝis jaŭdo, la 13-an de septembro, juna virino telefonis por diri, ke sia edzo estas hejmensendita el la Estadio Chile, kie li estis vidinta Victor Jarra kaj estis parolinta kun li. Jarra alportigis al sia edzino sciigon: Ŝi zorgu por si kaj la infanoj. Li mem verŝajne ne kapablus eskapi el la stadiono.

La mardon, la 18-an de septembro, je la 8-a horo matene juna ŝtatoficisto diris al s-ino Jarra, ke sia edzo morta kuŝas en la kadavrejo kaj ke lin konanta persono devas identigi lin.

Sinjorino Jarra iris al la kadavrejo por identigi sian edzon; al siaj filinoj ŝi ne diris, kien ŝi iris. La ŝtatoficisto estis ofertinta sin kunveni, kaj li kuniris. Ili eniris la konstruaĵon tra flanka pordo kaj vidis ion, kion sinjorino Jarra priskribas kiel amason da kadavroj, plenigantaj la tutan ejon. La ejo, kiu kutime estas destinata por kadavroj, estis plena de ili, same la ejo, kie alie kadavroj estas preparataj (por la identigo).

Antaŭ ol trovi sian edzon, sinjorino Jarra devis iri supren en la ejon, kiu kutime estas destinata por la administrado. Oni diris al ŝi, ke li kuŝis tie jam de tri tagoj. Lia vestaro estis disŝirita, kaj kelkaj el liaj vestaĵoj estis malsupreŝiritaj. La ostoj de liaj manoj estis disbatitaj, kaj ŝi kredas, ke ankaŭ lia spino estis rompita. Krom tio li havis multajn pafvundojn. Sur oficiala formularo, fiksita sur lia korpo, tekstis, ke oni trovis lin surstrate. Sur la folio li ne estis identigita, sed nur provizita per numero. Sed ĉiu sciis, ke tio estis Victor Jarra. Oni permesis al sinjorino Jarra kunpreni la kadavron, sed nur post kiam ŝi estis alportinta la edzecdokumenton el sia loĝejo. Poste ili iris, kaj la ŝtatoficisto helpis ŝin enterigi Victor Jarra sur tombejo apud la kadavrejo. Entute ŝi forestis kvin horojn de la hejmo kaj de siaj filinoj.

Pli poste sinjorino Jarra eksciis de aliaj, kiuj estis en la Estadio Chile, ke sia edzo estis provinta subteni la animstaton de la tieaj per kantado. Pro tio la gardistoj elektis lin por speciale brutala traktado. Antaŭ ol mortigi lin, verŝajne per rompo de la spino, ili disbatis la ostojn de liaj manoj. Post tio ili pafadis lin per mitraletoj. Oni diris al sinjorino Jarra, ke tio estis homoj en uniformoj de la aerarmeo. Antaŭ ol forlasi Santiagon la 15-an de oktobro por (helpe de la angla konsulo) iri al Anglio, sinjorino Jarra ankoraŭfoje vizitis la tombon de sia edzo. Ŝi diras, ke kuŝis floroj sur ĝi, kiujn ŝi ne estis metinta tien.

(El „The Guardian", Londono, de la 3-a de novembro 1973)

Trad.: K.-D. Dungert

El la programo de vastaj helpagadoj por la ĉiliaj patriotoj

Rekomendita de la konferenco en Helsinki por solidareco kun la popolo de Ĉilio (1973)

La internacia konferenco por solidareco kun la ĉilia popolo aprobas kun profunda kontentiĝo la sennombrajn kaj tre diversspecajn paŝojn, entreprenitajn de post la 11-a de septembro 1973 en la tuta mondo por manifesti la kondamnon de la faŝisma puĉo kaj por subteni Ĉilion.

La konferenco decidas jenajn rekomendojn:

– Starigi kompleksajn unuecajn kaj aktivajn naciajn solidareckomitatojn en ĉiu lando laŭ ties kondiĉoj kaj eblecoj

– Efektivigi vastan informkampanjon por kondamni la krimojn de la militistara reĝimo, t.e. antaŭ ĉio helpe de konferencoj, debatoj ktp. kaj intensiva apliko de la amasaj komunikiloj

– Krei internacian tribunalon, konsistantan el mondkonataj juristoj, por juĝi tiujn ĉi krimojn

– Prepari „nigran libron", kiu enhavas dokumentojn pri la kruelaĵoj, okazintaj de post la faŝisma puĉo en Ĉilio

– Transdoni al la Unuiĝintaj Nacioj, al ĝiaj specialaj organizaĵoj samkiel al la registaroj mesaĝojn, deklarojn kaj rezoluciojn kun la postulo urĝe interveni, por ke finu la masakrado je ĉilianoj kaj por ke la militistara reĝimo estu publike senmaskigata en tiuj ĉi internaciaj rondoj

– Organizi demonstraciojn, mitingojn kaj aliajn formojn de popolaj manifestacioj

– Efektivigi tujajn kampanjojn por kolektado de subskriboj kiel signon de solidareco kun la ĉilia popolo por postuli finigon de murdadoj, torturadoj kaj arestadoj kaj senmaskigi la militistaran reĝimon

– Transsendi telegramojn kaj leterojn al la reprezentantoj de la militistara reĝimo, en kiuj ĝi estas kondamnata, kaj aliflanke mesaĝojn al la ĉilianoj por certigi al ili la simpatiojn kaj plenan subtenon de la popoloj

– Organizi kampanjojn, kiuj instigu la registarojn apliki rimedojn, servantajn al la izolado de la militistara reĝimo, apliki diversajn – kaj moralajn kaj politikajn kaj ekonomiajn – sankciojn kaj agi tiacele, ke la militistara reĝimo neniel ricevu armilojn por murdi la ĉilian popolon. Tiurilate la konferenco subtenas energie la decidon de la francaj havenlaboristoj pri neenŝipigo de armiloj, destinataj por tiu ĉi barbara reĝimo, kaj same la decidon de la laboristaj sindikatoj en Francujo, Venezuelo, Argentino kaj aliaj landoj, kiuj alvokis al grandaj strikoj por manifesti sian solidarecon kun la ĉilia popolo

– Organizi ĉiuspecajn manifestaciojn kontraŭ reprezentantoj de la militistara reĝimo, kiuj vojaĝas alilanden, kun la celo montri al ili la indignoplenan kondamnon fare de la popoloj. Samtempe ĉiu lando subtenu la viziton de gvidantoj de Popola Unueco kaj la viziton de aliaj personoj, kiuj estas veraj reprezentantoj de la ĉilia popolo

– Efektivigi vastan kampanjon por materia subteno al la viktimoj kaj al la rezistmovadoj de Ĉilio surbaze de tutpopolaj kolektadoj kaj aliaj iniciativoj

– Apliki politikan kaj diplomatian premon, premon flanke de la loĝantaro kaj alian premon por finigi la persekutadon de politikaj elmigrantoj en Ĉilio kaj por akcepti ilin en aliaj landoj

– Per ĉiuj rimedoj disvastigi la kortuŝan lastan mesaĝon, kiun Salvador Allende sub la bombado de la faŝistaj puĉistoj direktis al sia popolo. Tiucele estu uzataj ankaŭ sondiskoj kaj kasetoj, radioelsendaĵoj, gazetaro kaj specialaj publikigoj.

Por interligi tiujn ĉi gravajn kaj urĝajn agadojn kaj plirapidigi ilian realigon, la konferenco opinias konvena starigi internacian interligan komitaton, malferman por ĉiuj organizaĵoj. Ĝia rekta celo estu ekkonsulti plej rapide ĉiujn tavolojn, fortojn kaj organizaĵojn – ĉu ili partoprenis la konferencon aŭ ne – por senprokraste starigi tre larĝan, mondvastan solidarecmovadon por la ĉilia popolo, apogitan sur la multnombraj fortoj, kiuj subtenas la aferon de Ĉilio sur nacia kaj internacia nivelo.

Trad. D. Berndt

Salvador Allende kaj la mondfama poeto Pablo Neruda. La morton de la malsana Neruda plirapidigis la eventoj lige al la puĉo.

Foto: Zentralbild



Tiel estiĝis Izraelio

de d-ro Martin Robbe

Enestanta en la rezolucio n-ro 338 (1973) de UNO-sekureca konsilantaro, la postulo pri politika solvo de la proksimorienta konflikto instigas ĉe multaj legantoj la demandon kiel estiĝis kaj evoluis ĉi ŝtato Izraelio, kiu konstante ĝenas la pacon kaj malatentas UN-decidojn.

Je la 14a de majo de 1948a jaro „Provizora Ŝtatkonsilantaro" proklamis la fondon de ŝtato Izraelio. La komuna ludo de brita koloniismo kaj cionismo estis kreinta konfliktejon, kiu ĝis hodiaŭ minacas la pacon en Proksima Oriento kaj malhelpas la progresan evoluon de la arabaj ŝtatoj.

La antaŭhistorio

Movadiĝanta ĉirkaŭ la komenco de nia jarcento, la politika cionismo estis origine etburĝa reago pro kontraŭsemidismo kaj kontraŭjudaj progromoj. Ĝia baza konceptaĵo: En socioj kun plimulta nejuda enloĝantaro judoj estas fremduloj; tial ili ne partoprenu socialajn batalojn sed elmigru kaj fondu propran ŝtaton en Palestino.

Sed kial tio okazu? Palestino jam estis loĝigita, ĉefe de araboj. Ĝi apartenis al la Osmana Regno, ĝis ĝi iĝis grandbritia mandata teritorio je la fino de la unua mondmilito. La cionistoj tial sin turnis al la brita registaro por realigi sian ŝtatfondon per ĝia helpo kontraŭ la araboj. Ilia movado per tio iĝis ilo en imperiismaj manoj. Hodiaŭ la cionismo estas aperaĵo de la imperiismo de la juda etburĝaro. Kaj ĝi vokis kaj vokas necese la reziston de la araboj. La brita registaro esperis, ke la kunlaboro kun la cionistoj plifortigus ĝiajn poziciojn en Proksima Oriento, aparte vide al la rego super Sueza kanalo. Tial ĝi promesis en la Balfour-deklaro de 1917a jaro akceli la kreon de nacia hejmlando en Palestino por la juda popolo, ĝi ne zorgis, ke ĝi la saman teritorion – fiaĵo de imperiisma kolonia politiko – fordonis ankoraŭ dufoje: Ĝi devis iĝi sendependa (kiel rekompenco por la helpo de la araboj en la batalo kontraŭ Turkio), kaj ĝi estis objekto de la sekreta Sykes-Picot-kontrakto farita kun Francio, kiu planis ĝian disigon en du landojn.

Per helpo de Grandbritio la cionismaj institucioj organizadis la enmigrigon kaj loĝigon de judoj el multaj partoj de la mondo por tiel akceli la ŝtatfondon. De 1924a ĝis 1931a venis 82 000 enmigrantoj. Kiel sekvo de la faŝismaj progromoj la enmigrado kreskis salte: de 30 000 judoj en 1933a ĝis 42 000 en 1934a kaj 62 000 en 1935a (la jaro de la „Nurenbergaj Leĝoj"). Judaj koloniigaj fondusoj uziĝis por forpeli arabajn kamparanojn de iliaj kamparoj. Laŭ oficaj informoj la enmigrintaj judoj posedis en 1916a jaro 241 000 dunamojn (dunamo = dekono de hektaro) da agrokampoj. En 1927a estis 903 000, 1936a 1.394 milionoj kaj en 1947a 1,85 milionoj da dunamoj. La forpelo de arabaj kamparanoj de ilia tereno estis grava kaŭzo por tio, ke la rilatoj inter araboj ka judoj pliakriĝis. Antaŭ la brita kolonia regado ili estis kunvivintaj pace dum jarcentoj. Grandbritio, esence kontribuinta per sia dulanga politiko al la konfliktiĝo de Palestino, volviĝis en pli kaj pli grandaj kontraŭdiroj. Per sia akcelo de la cionismo la brita registaro provokis reziston de la araboj, kiu atingis ĉefpunkton en la ribeloj de la jaroj 1936a ĝis 1939a. Antaŭ la dua mondmilito pliorientiĝinta al la araba nacia movado, kiun ĝi volis gajni kiel sambatalanon kontraŭ la faŝismaj potencoj, ĝi kaŭzigis proteston de la cionistoj. Finfine la brita imperiismo konfliktiĝis kun sia usona rivalo, kiu malkovris sian intereson por Palestino en 1938/39 konekse kun grandaj naftaj trovaĵoj en Saŭdarabio kaj decidis akcelon de cionismaj ambicioj.

Grandbritio vidis nur unu elvojon: Ĝi enaferigis la Unuiĝintajn Naciojn. Je la 2a de aprilo 1947 ĝi starigis la Palestinan Demandon antaŭ la plenkunsidon.

La Ŝtatfondo

Kiam oni konfrontis la Unuiĝintajn Naciojn, la dua mondmilito estis finita nur antaŭ mallonga tempo; la bildoj de ĝiaj teruroj, inter tiuj la faŝismaj kontraŭjudaj progromoj, ankoraŭ estis aktualaj. Sovetio estis portinta la ĉefŝarĝon de la milito kaj farinta la ĉefan kontribuon al la disbato de la faŝismo; nun ĝi iĝis centro de la estiĝanta socialisma mondsistemo. Imperiismaj potencoj, ĉepinte Usono, volis fronti kontraŭ la socialismo per „Politiko de la Forto" stimulanta la malvarman militon.

Naciaj liberigaj movadoj en Azio estis akirintaj unuajn grandajn venkojn (inter 1946 kaj 1948 Indonezio, Hindio, Pakistano, Birmo kaj Cejlono akiris ŝtatan sendependecon), en Proksima Oriento ĝi staris nur ĉe la komenco de sia elkresko, en la plejparte ankoraŭ dependaj arabaj landoj ĉie regis feŭdalaj aŭ duonfeŭdalaj registoj sindonaj al la imperiismo. La Unuiĝintaj Nacioj staris antaŭ malfacila tasko. En komplika kaj streĉita internacia situacio ili devis trovi solvon por Palestino, kie la kontraŭoj treege akriĝis kaj fakte estis eksplodinta civitana milito.

Problemoj de paca solvo en Proksima Oriento


Rudi Graetz

Ili funkciigis specialan komitaton (United Nations Special Comittee on Palestine – UNSCOP, Speciala Komitato de la Unuiĝintaj Nacioj pri Palestino). Por malhelpi la kunlaboron de Sovetio en ĝi, la imperiismaj potencoj realigis, ke al ĝi ne apartenu membro de la Sekureca Konsilantaro. Post ekzameno de la fakta situacio la komitato per plimulta decido rekomendis la disigon de Palestino kaj la fondon kaj de juda kaj de araba ŝtatoj. Je la 29a de novembro de 1947a la plenkunsido akceptis ĉi rekomendon per rezolucio (33 jesaj, 13 neaj, 10 sendecidaj voĉoj), inter la jesaj voĉoj estis Usono kaj USSR.
La soveta registaro pledis konsideri la legitimajn interesojn de la koncernaj popoloj, tial ĝi jesis la dividon.
La 14an de majo ĉesis la brita mandato pri Palestino. Samtage „Provizora Ŝtatkonsilantaro" proklamis la fondon de ŝtato Izraelio. Sed malestis araba ŝtafondo por la palestinanoj. Momente de la ŝtatfondo en Izraelio ekzistis 960 000 araboj kaj 675 000 judoj. Dum kvar monatoj 50 000 judaj enmigrantoj venis, ĝis fino de 1951a jaro ĉirkaŭ 700 000 (komence ĉefe el Eŭropo, poste el Oriento). 840 000 araboj estis forpelitaj tiel, ke la juda enloĝantaro akiris plimultecon (1953: 1 484 000). Je la 11a de majo de 1949a Izraelio akceptiĝis en UN kiel 59a membro.

Cionistaj potenculoj

Cionistoj transprenis la potencon en la nova ŝtato. Kiam la antaŭa civitana milito per la ŝtatfondo transkreskis en militon inter Izraelio kaj ĝiaj arabaj najbarŝtatoj ili utiligis tion por disvastigi sian teritorion trans la limojn planitajn de UN. Kontraŭleĝe ili okupis 6 700 km^2 da teritorio. Ĉe tio komplezis al ili la sinteno de la reakciaj arabaj reĝimoj, kiuj reprezentis ne la interesojn de siaj, ankaŭ de la palestina, popoloj, sed proprajn potencpolitikajn celojn. Tiel Jordanio obeanta al Anglio anektis grandan parton de la araba ŝtato planita de UN en Palestino. Per tio la fondo de palestina ŝtato tiam estis neebla. La forpelitaj palestinanoj plenigis la fuĝulajn tendarojn en Jordanio, Libanio, Egiptio kaj Sirio.
Poste la cionistoj daŭrigis sian landraban politikon per la agresoj de 1956a kaj 1967a jaroj. Pro sia rifuzo pri redono de la teritorio rabita en 1967a la izraeliaj potenculoj portas la respondecon pri la batalado denove eksplodita en oktobro de 1973a jaro.
La agresa politiko de Izraelio ne havas perspektivon, ĝi ne nur kreas danĝeran situacion en Proksima Oriento, ĝi endanĝerigas la izraelian popolon mem. Ĉiuj popoloj en ĉi spaco bezonas justan kaj daŭran pacon. La rezolucioj de la Sekureca Konsilantaro de novembro de 1967a kaj oktobro de 1973a montras la vojon, sur kiu la paco estas atingebla.

Trad. M. Lennartz el „Horizont" n-ro 49/1973



Intertempe forpasis du jaroj, kiam mi skribis artikolon,* kiu aperis sub la titolo „La Suez-kanalo kaj paco". Nun fakte la unua ŝtupo – retiro de la izraeliaj trupoj de la Suez-kanalo – estas atingita kaj la malfermo de la kanalo ankoraŭ dum tiu ĉi jaro povos okazi, ekonomie avantaĝe speciale por multaj eŭropaj landoj. „La retiro de la izraeliaj trupoj okazis sen incidento" raportis la UN-komando. La izraeliaj militistoj transdonis la koncernajn areojn al UN-trupoj, kiuj siaflanke ses horojn pli poste transdonis la senokupigitajn teritoriojn al la egiptaj trupoj. Nun inter la izraeliaj kaj egiptaj soldatoj troviĝas teritorio de dekkilometra larĝeco, kiun kontrolas UN-trupoj kaj troviĝas dek kilometrojn for de la Suez-kanalo.

Kial tio nur eblas nun kaj ne jam antaŭ jaroj? La politika, ekonomia kaj militista situacio de Izraelio malfavoriĝis. Pro neplenumo de la UN-rezolucioj, ne retiriĝo el la okupataj arabaj teritorioj kaj aliaj kaŭzoj multaj ŝtatoj ĉesigis la diplomatiajn rilatojn kun Izraelio, inter ili sole 29 afrikaj ŝtatoj.

Unuafoje en la historio la arabaj landoj ankaŭ uzis la strategian armilon „oleo" kiel politikan batalilon kontraŭ la imperiismo, kio ĝis tiam estis instrumento de imperiisma potencpolitiko. Montriĝis konsiderinda unueco inter arabaj ŝtatoj kun vere diferenca politika naturo. Ankaŭ tio karakterizas novan situacion. Kaj la oktobra milito en la jaro 1973 montris al Izraelio, ke ĝia agrespovo ne estas senlima kaj devigis ĝin al parta solvo, se ankaŭ de pure militista karaktero, kiu nur rilatas al unu araba lando. Post la oktobra milito okazis, ke izraeliaj patrinoj nomis Moshe Dayan „murdiston de siaj filoj".
Nun devus sekvi plua paŝo por atingi konstantan pacon en Proksima Oriento – la disigon de la izraeliaj kaj de la suriaj trupoj. Sed tion kontraŭas la izraelia generalo Dayan, kiu deklaris, ke la okupitaj Golan-altaĵoj devas aparteni al Izraelio. Antaŭe jam antaŭ studentoj la izraelia militministro Dayan deklaris: „Prefere milito ol forlasi la Golan-altaĵojn, ankaŭ se ni devas pagi por tio konforman prezon".
Malgraŭ batalhalto dum la tuta tempo post la oktobra milito okazis atakoj kaj ofendoj kontraŭ Libano kaj kontraŭ Suria Araba Respubliko, kies prezidento Hafez Assad konfirmis la starpunkton de Surio, ke konstanta kaj legitima solvo de la proksim-orienta konflikto postulas plenan retiron de Izraelio de ĉiuj 1967 okupitaj arabaj teritorioj kaj garantion de la rajtoj de la palestina popolo". Tamen atendinda estas baldaŭa interkonsento pri la retiro de la izraeliaj trupoj ankaŭ el Surio. Tio estus plua paŝo al konstanta paco en la senco de la UN-rezolucioj.

*Komp. „Paco" n-ro 4/1972, p. 8

Trupoj de UN ĉe la tendo, en kiu subskribiĝis la interkonsento pri ĉesigo de la pafado inter Egiptio kaj Izraelio.
Foto: Zentralbild

Izraelio ankoraŭ ĉiam okupas la suriajn Golan-altaĵojn norde de la Tiberia-lago. Ili havas grandan strategian signifon. De tie eblas rekte minaci Damaskon, ĉar la izraeliaj trupoj staras nur 60 km antaŭ la suria ĉefurbo kaj la teritorio inter Damasko kaj la Golan-altaĵoj estas tre malfacile defendebla. Krom en tiu ĉi teritorio kuŝas parto de la oleo-kondukilo inter Dahran (Saŭdi-Arabio) kaj libanaj havenoj.
Sed la tempo ne laboras por Izraelio. La mito pri la araba militista nepovo detruiĝis. Pli precize tion esprimas londona gazeto „Morning Star":

> „Antaŭ la 6a de oktobro la pozicio de la izraeliaj gvidantoj estis la jena: Ili estis tute decidemaj reteni perforte la arabajn teritoriojn, kiujn ili konkeris dum la junia milito 1967. Ili eĉ minacis pluan pligrandigon de siaj teritorioj koste al la arabaj landoj. La ĵusaj bataloj tute klare devus esti montrintaj al la izraelia popolo, ke la sekurigo de konstanta militista hegemonio de Izraelio estas iluzio. Ĉiu politiko bazita sur ĝi, pli malpli frue kondukas al katastrofo".

Multaj usonaj kaj eŭropaj gazetoj konkludis:

> „La lastaj okazaĵoj klare montris, ke la tempo ne laboras por Izraelio".

La domaĝo por la Suria Araba Respubliko estis sufiĉe granda, kiun ĝi suferis per la senskrupula bombado fare de izraeliaj militaviadiloj. Ĝi ampleksas pli ol miliardo da suriaj pundoj. Nekompleta nombrado de tute aŭ parte detruitaj entreprenoj tion klarigas: Krom oleo-kampoj, ĉiuj instalaĵoj por prilaboro kaj stokado de oleo, la du plej grandaj termoelektro-centraloj (80 % elfalo de elektro-energio), la du plej gravaj havenoj same kiel pluaj entreprenoj, pontoj, stratoj kaj konstruĵoj. Necesas longdaŭraj kaj intensaj klopodoj de suriaj kaj ĉeĥoslovakaj fakuloj por la rekonstruo de la nova oleorafinejo en Homs, celite bombadita de Tel Aviv. La loĝantoj de SAR tial ankaŭ estonte devas enkalkuli malfacilaĵojn kun la provizado de benzino kaj hejtoleo. Tamen sentebla plibonigo okazos, kiam komenco de aprilo 1974 la unuaj tri 100-MV-turbinoj de la Eŭfrat-barilo produktos elektro-energion.
Gravaj projektoj por 1974 kaj pli poste krome estas: Rafinejo kaj akvo-barilo en la regiono de la Mediteraneo, komenci la ekspluatadon sur la oleo-kampo de Djubeiseh en Nordsurio, duobligo de la elminigo de salo, finkonstruo de fervoja linio inter la haveno Lathakia kaj la olea centro de Kamischli en la ekstrema nordoriento kaj paŝon post paŝo konstruado de 14 nutraĵentreprenoj, 10 grenmuelejoj kaj 13 stacioj por la bredado de bovoj. La plej multaj objektoj estas realigotaj en kunlaboro kun socialismaj landoj.
Tio signifos la pluan fortigon de la ŝtata sektoro. SAR decidis daŭrigi sian progreseman vojon. La plej grava garantio por tio estas la laŭeble plej rapida kaj efektiva solvo de la politikaj bazaj problemoj en Proksima Oriento: Retiro de la izraeliaj trupoj el la 1967 kaj pli poste okupitaj teritorioj kaj garantio de la rajtoj de la palestina popolo. Izraelio kreiĝis 1947 per UN-decido. Rigardante la situacion en Proksima Oriento de realaj pozicioj, ni do devas konstati, ke Izraelio ekzistas kaj kiel ĉiu alia ŝtato havas la rajton ekzisti. Ni ankaŭ povas diri, ke ni ne sentas iun malamikecon al Izraelio kiel ŝtato. Se ni kaj ne nur ni kondamnas Izraelion, tiam pro ĝia politiko de anekso, pro la malestimo de la popolrajtaj normoj kaj la UN-decidoj.

Kio validas por Izraelio, kompreneble devas validi ankaŭ por ĉiuj aliaj ŝtatoj de la Proksima Oriento. Ĉiuj havas la rajton por vivi pace. Ili havas la rajton al suvereneco, teritoria integriĝo kaj politika sendependeco. Por si mem Izraelio postulas tiun ĉi rajtojn, sed rifuzas ilin al siaj arabaj najbaroj. Ĝi retenas teritoriojn, apartenantajn al la araboj kaj intencas plivastigi siajn limojn je iliaj kostoj.

La regantoj de Izraelio predikas malamikecon kontraŭ la progresemaj arabaj ŝtatoj kaj ŝatus realigi siajn planojn faligi ties registarojn. La nuntempa politiko de Izraelio estas politiko de lanca pinto kontraŭ la antiimperiisma araba libereca movado.
Ok miliardojn da dolaroj Usono investis en Izraelio depost la fondo de tiu ĉi ŝtato ĝis 1967. Kaŝitaj kiel „reparacioj" la monopolkapitalo de FRG investis ses miliardojn markojn. Post 1967 flanke de Usono sekvis pluaj miliardoj por armiĝo kaj kiel militista helpo kaj ankaŭ pluaj subvencioj de FRG. Tiamaniere subtenita Izraelio malatentas la UN-decidojn, kiuj estas popolrajte devigaj decidoj. Tio estas la kaŭzo, kial Izraelio internacie sin totale izoliĝis. Tial ni ankaŭ kondamnas ĝin. Tial ĉiuj pacamaj ŝtatoj ankaŭ postulas de Izraelio fini sian politikon de agreso, ekspansio kaj de malamikeco kontraŭ la araboj kaj realigi la UN-decidojn.

Kondamnante la politikon de la reakciaj cionistaj gvidantoj, ni alte estimas la batalon de tiuj izraeloj, kiuj kontraŭas la agres- kaj ekspansian politikon per grandaj oferoj.

Ankoraŭ nepunitaj – la krimoj de la ekzekutinto de Lyon

Klaus Barbie, la ekzekutinto de Lyon, kiel lin nomas la francoj, ĝis antaŭ kelkaj monatoj ĝuis sian vivo-vesperon en Bolivio. Pro protesto el tuta mondo, precipe el Francio, la bolivaj ŝtatfunkciuloj antaŭ kelka tempo arestis lin. Sed li jam estas denove libera. „Tio estas afero, en kiu la franca registaro ne cedos kaj kiun ĝi taksas kiel tre severa", emfazis nur antaŭ nelonge ree la ministro por informade Jean Philippe Lecat.

En la jaroj de la faŝista okupado en Lyon kiel en tuta Francio la homoj ĝemis sub la naziisma okuparbitreco. Sed la rezistado vivis, spite al ĉiuj danĝeroj. Ĉiu sciis, ĉiu sentis tion. La plej aktivaj rezistantoj – batalantoj estis la komunistoj. Sed ankaŭ multaj burĝaj francoj pro patriotismaj sentoj kontraŭstaris la okupantojn. Komence la operacioj de diversaj partoj de la rezistado estis izolitaj unu de alia. Komuna agado estis necesa, deklaris la franca kompartio. Ankaŭ Jean Moulin, adepto de de Gaulle, pledis por komuneco. Li estis unu el la fondintoj de la en printempo 1943 establita CNR (Nacia Konsilantero de Rezistado), en kiu troviĝis diversaj organizoj, inter ili la kompartio kaj la socialisma partio, la radikal-socialistoj kaj la Gaullistoj. En junio 1943 sukcesis al la GESTAPO, gvidata de la SS-Hauptsturmführer Klaus Barbie per sia denunca servo, aresti Jean Moulin. Sekvis por la rezistintoj tagoj de torturoj kaj suferoj en la Lyona GESTAPO-centro. Finfine, kiam oni venigis Jean Moulin al Parizo, li kapablis nek aŭdi nak paroli nek vidi. En la trajno, kiu poste devis transporti lin al Germanio, li mortis. Barbie pro tio estis mallaŭdita de sia Berlina ĉefo, ĉar ne plu eblis, pridemandi la viktimon.

En majo 1944 Oskar Groβmann, kompetenta funkciulo de la aŭstria kompartio, kiu batalis kiel multaj aliaj eksterlandanoj ĉe la flanko de la franca popolo en la Rezistado, venis pro plej tragikaj kaŭzoj en la manojn de la GESTAPO. Kun du aliaj kamaradoj li kunvenis ĉe finhaltejo de tramo, proksime de la Lyona aerodromo Bron. Por la tie instaligita faŝista pilotgrupo tiu haltejo estis la sola ligo kun la interna urbo. Tiu fakto estis motivo por iu partizana grupo tie instaligi prokraste eksplodintan bombon. Pro malfeliĉa hazardo la bombo ĝuste eksplodis en tiu ĉi momento, kiam renkontiĝis tie niaj kamaradoj. Trafita per eksplodpecoj, Oskar Groβmann perdis sian vidkapablon kaj grave vundiĝis je la gambo. Rapide la faŝistaj gardantoj baris la tutan terenon. La aliaj du kamaradoj, ankaŭ vunditaj, sukcesis rifuĝi. Oskar Groβmann, gardita de polico estis enhospitaligita. Ĉiuj provoj, liberigi lin de tie, malsukcesis. Kelkajn semajnjn poste Lyon estis libera. Sed spite al intensaj streĉoj oni eĉ ne plu trovis spuron de Oskar Groβmann.

Alia rezistinto en Lyon estis Karl Katzenberger, germana komunisto. Dum la hispana civitana milito li estis leŭtenanto de la XI Internacia Brigado. Karl Katzenberger laboris ĉe benzin-stacio, kiun instalis la faŝistaj okupantoj en la artileria parko. Oni konsideris lin tie franco, ĉar li legitimiĝis per francaj dokumentoj. La okupantoj estis kontentaj, se ili trovis laboristojn el la civila loĝantaro, precipe, se tiuj parolis germane. Kaj Karl Katzenberger laboris akurate. Sed lia ĝusta tasko ne estis provizi la aŭtomobilojn de la germana armeo per benzino. Li estis komisiito de la komitato „Libera Germanio" por la okcidento kaj devis kolekti informojn kaj raportojn pri la animstatoj. Per alia kamarado la informoj estis transdonitaj, ekzemple la sciigo pri antaŭstaranta granda operacio kontraŭ partizana tereno en la departemento Drôme. La an taŭan tagon la speciala agadgrupo prenis benzinon en la arteleri-parko de Lyon. Je la 11-a de junio 1944 Karl Katzenberger estis arestita de ĝendarma patrolo kaj grave vundita. Oni trenis lin al la GESTAPO-sidejo. Ĉiuj streĉoj, ekscii ion pri lia plua sorto, restis sensukcesaj. Oni ne scias, kie kaj kiel Karl Katzenberger mortis. Sed tute certe oni scias: Respondeca por la GESTAPO en Lyon estis Klaus Barbie en tiu tempo.

Dum 1942–1944, kiam SS-Hauptsturmführer Barbie fiagadis en Lyon kiel ĉefo de la GESTAPO, pruve estis konstatita: 14 311 arestoj, 4 324 murdoj, 7 591 deportadoj al Aŭŝvic kaj Daĥaŭ, de kie nur transvivis 5 procentoj de la viktimoj. Per plej kruelaj rimedoj Barbie terurigis la loĝantojn. Inter alie li ordonis amasajn ekzekutojn en la Lyona Fort Montluc en junio 1944. Precipe abomena estis la de li ordonita deportado de 43 infanoj, 4 – 14 – jaraj, el juda orfa hejmo en Yzieu, kiujn Barbie kaj siaj SS-murdistoj eltrovis 1944 en kaŝejo. Ĉe tio li strangolis propramane la kvinjaran Claudine Halaubrenner. La aliaj venis al Aŭŝvic.

En Francio Klaus Barbie estis mortkondamnita dufoje je lia foresto, unufoje de civila, aliafoje de milita tribunaloj. Sed la administrado de FRG rifuzis transdoni lin kaj ĉesigis la proceduron kontraŭ lin pro tielnomata „ordondevigo". Ĝis 1960 Barbie vivis senĝene en Munkeno kaj Augsburgo. Poste li preferis transloĝiĝi al Bolivio. Li transprenis la bolivian civitanecon kiel Klaus Altmann (alpreninte la knabinan nomon de sia edzino). Por la ekstera mondo li ŝajnigis esti direktoro de la markomerca socio Trans-Maritima-Boliviana. Sed li ne kontentiĝis profiti el komercado. En Bolivio estas konata sekreto, ke Barbie alias Altmann partoprenis je tiaj maĥinacioj kiel tiu per la helpo de CIA iniciita kontraŭrevolucia puĉo en aŭgusto de la pasinta jaro.

Ĝis nun la bolivia administrado ne kontentigis la ripetitain postulojn, transdoni lin al la franca justico. Nun Francio denove intense postulas lian transdonon. Ĉu la registaro en La Paz plenumos la postulon? Ĉu Klaus Barbie finfine estos punata pro siaj krimoj? Aŭ, ĉu ankoraŭ valoras la demando, kiun portis sur siaj transparentoj demonstrantoj antaŭ la Munkena justicpalaco lige kun la Barbie-afero: „Justicia, ĉu vi estas blinda – se temas pri militkrimuloj?"

Trad. Ingrid Schödl el „Horizont" 4/1974

Paca kunekzistado kaj internacia sekureco

El la komuniko de l'mondkongreso de pacamaj fortoj 1973 en Moskvo

La paco ne povas esti garantiata sen ĝenerala agnosko kaj praktika apliko de la principo de la paca kunekzistado de ŝtatoj sendepende de ilia sociordo. La paca kunekzistado ne simple estas la foresto de milito; ĝi al ĉiu popolo ebligas defendi siajn memstaron kaj suverenon interne de netuŝeblaj limoj kaj evoluigi ĉiuflankan kunlaboron, kiu certigas la interligon kaj kunan agadon de la popoloj favore al la paco kaj al la socia progreso.

La paca kunekzistado ne signifas, ke oni rezignacias pri maljusteco; kontraŭe, ĝi premisas efikan refuton de la agreso kaj la rajton de la popoloj, lukti por siaj politika kaj ekonomia liberigo per ĉiuj necesaj rimedoj kaj por la socia progreso kaj por povi decidi libere kaj sen ia interveno ekstera pri sia sorto. Pro tio ĝi koincidas kun la interesoj kaj moralaj konceptoj de la popoloj pri la principoj, laŭ kiuj realiĝu justa paco.

La paca kunekzistado eksplicite kondamnas la aplikon de forto en la interŝtataj rilatoj kaj premisas efektive pacan karakteron de diversaj metodoj de reordigo de kvereloj kaj diferencoj. Ĝuste tio kaŭzas, ke ĝi estas la plej stabila bazo por la internacia sekureco. Tia bazo ne povas esti la „ekvilibro el timo": Tiu estas nestabila kaj danĝera, ĉar ĝi entenas kaj pretekstas la preparon al milito, daŭrigas la militan fonon por solvo de internaciaj problemoj kaj pliakrigas la militan konfrontiĝon de unu ŝtatogrupo kontraŭ alian.

Trad. L. Schödl

La mondkongreson de pacamaj fortoj en novembro 1973 en Moskvo partoprenis pli ól 3200 delegitaj el 140 landoj. La bildo montras la kongrespalacon de la Moskva Kremlo.

Foto: Zentralbild



RECENZO

Dum la jaroj de la heroa kontraŭbatalo de tiuj informoj kaj multnombra literaturo pri Vjetnamio oni kredis esti plene instruita pri strukturo kaj karaktero de de la popoloj de Vjetnamio kontraŭ la usonaj agresantoj informis gazetoj, radiostacioj kaj televizio konstante pri la okazintaĵoj en tiu mondparto. Pere ĉi-tiu lando en Hindoĉinio.

Leginte la ĉi-supre menciitan 136-paĝan broŝuron „La naciaj malplimultoj en VDR", publikigitan de la „Fremdlingva Eldonejo Hanojo – 1973", la leganto

La naciaj malplimultoj en VDR

konstatas surprize, ke malgraŭ la variaj raportoj pri Vjetnamio siaj konoj pri tiu fororienta lando estas absolute malkompletaj. Kiu jam scias, nur por citi iun ekzemplon, ke Vjetnamio estas multnacia lando sur kies teritorio pli ol 60 etniaj grupoj loĝas? Kiu jam havas konojn pri la vivmanieroj de tiuj grupoj, kiuj posedas proprajn kulturojn, folklorojn kaj parte eĉ propran skriban literaturon?

La eldonaĵo montras kiel kaj kiamaniere per longjara kooperado kaj komuna batalo kontraŭ koloniado, super tiu ekstrema etnografia diverseco tamen etabliĝis firma unueco. Detale priskribitaj en la broŝuro estas la akiraĵoj kaj influoj de la Revolucio de 1945 en politika, socia kaj kultura rilatoj. Gisfunde ŝanĝiĝis la vivkondiĉoj de la minoritataj socioj.

Plue estas donitaj informoj pri la grandegaj klopodoj de la registaro nuligi la jarcentan ekonomian, kulturan kaj socian postrestecon, ŝuldata de fremdaj koloniistoj, efektivigi realan samrajtecon kaj egalecon por ĉiuj, respektante la rajton de ĉiu nacieco laŭ la principoj de marksismo-leninismo, flegi siajn kulturajn tradiciojn kaj uzi siajn gepatrajn lingvojn.

Fakto estas, ke la noveldonita informilo pri la frata socialisma lando kontentigas veran bezonon, profundigas la konon pri ĝi kaj ĝiaj popoloj. La legado, aŭ pli bone la studado de la nete presita broŝuro estas nepre rekomendinda, por atingi trafan koncepton eĉ necesa.

Erich Würker

25 jaroj ekstera politiko por la paco


GDR subtenas la sovetian proponon por senarmigo

La sovetia propono, enigita en la tagordon de la XXVIII plenkunsido de UN, pri la redukto de la milita buĝeto de la konstantaj membroj de l'Sekureca Konsilantaro je 10 procentoj kaj pri la uzo de tiuj rimedoj kiel helpo al evoluantaj landoj, ankaŭ trovis tre pozitivan eĥon en GDR. Apartenas al la aktualaj ĉeftaskoj de la ekstera politiko de GDR aktive subteni ĉiujn iniciatojn, kiuj estas utilaj por kompletigi la procezon de la politika malstreĉiĝo.
Gvidite de tiu strebado, GDR subskribis ĉiujn al ĝi malfermajn internaciajn interkonsentojn rilate la limigon de la armado. Tio ekzemple koncernas la malpermeson de la nukle-armilaj eksperimentoj en la atmosfero, en la kosmo, kaj sub akvo. Tio validas por la kontrakto pri la neplidisvastigo de nukle-armiloj kaj por la konvencio pri la malpermeso de la projektado, produktado kaj deponado de bakteriaj (biologiaj) kaj toksaj (venenaj) armiloj.
La akcepto de la sovetunia propono pri dekprocenta redukto de la militbuĝeto de la konstantaj membroj de l'Sekureca Konsilantaro aktuale enkondukus novan etapon en la batalo pri la senarmigo. La ĝis nun interkonsentitaj paŝoj – kiel ajn utilaj ili ja estas – ne povis malebligi la pluan kreskon de la porarmilaj elspezoj kaj la vetarmadon kaŭzitan de Usono kaj NATO. Nun gravas konkrete realigi la procezon de vera senarmigo, do i.a. malpliigon de la porarmadaj elspezoj kaj la ĉesigon de la vetarmado. Kaj ĝuste tio estus atingota, laŭ la opinio de GDR, per la realigo de la sovetia propono.
Elirante de tio certe ne nur la civitanoj de GDR pritaksus la sintenon de iu lando al tiu malarmado-propono de USSR kiel veran pruvilon por la tiel ofte deklarita pacvolo, por la rilato de ĉiu registaro al la elementaj vivinteresoj de la homaro, pruvilon samtempe por la sinteno al la ekonomie malforte evoluintaj landoj. Surbaze de la militbuĝeto de 1973 kaj konsiderante la 10-procentan redukton, oni povas doni al la evoluantaj landoj subite ampleksan helpon de kelkaj centmilionoj da dolaroj. Des pli abomeninda estas la kruele negativa sinteno de Pekino, kiu sin per tio metis denove en malkaŝan kontraŭon al la plimulto de UNO-membroj, speciale al la junaj revoluciaj ŝtatoj.
La internacia politika praktiko pruvas, ke ankaŭ tiom komplikaj problemoj kiel la limigo de la armado kaj de la malarmado estas solveblaj.
GDR ĉion laŭpove faros, por ke la prudento venku kaj la tiel signifa propono de USSR kiel eble plej baldaŭ ricevu konkretan formon.

Trad. laŭ „Panorama DDR" D. B.

JAROS

„insulo de l'morto" en Egea Maro



Pli ol 7000 politikaj arestitoj, inter ili 235 virinoj, vegetas en la koncentrejo sur la greka insulo Jaros. En ejo, destinita por 60 personoj, devas vivi 170 arestitoj.
Foto: Zentralbild

Jam en la antikva epoko la romanoj malliberigis politikajn arestitojn sur la roka, sengastema insulo. Kiel raportis Tacitus, la imperiestro Tiberius (14–37 p.k.) ripete kontraŭis la deportadon sur la nur 23 km² grandan insulon, ĉar tio signifis la certan morton de la arestitoj. 1922 la greka reakcio mallongtempe internigis politikajn malliberulojn sur Jaros. 1943 la germanaj faŝistoj deportis italajn militkaptitojn al tiu insulo. „Nova periodo" en la morna historio de Jaros komencis post la dua mondmilito. De 1947 ĝis 1952 7 000 komunistoj kaj aliaj demokratoj estis internigitaj en granda koncentrejo, kiun devis konstrui la kaptitoj mem. Jaros estiĝis en Grekio unu el la simboloj de torturo kaj aliaj neeldireblaj suferoj. 1950 parlamenta esploro konstatis, ke 93 procentoj de sur Jaros internigitaj politikaj arestitoj malsaniĝis pro tuberkulozo.
Post la faŝisma puĉo de 1967 denove miloj da komunistoj kaj aliaj demokratoj estis transportitaj sur la fifaman insulon. Sed la protestoj de greka kaj internacia publiko baldaŭ devigis Papadopoulos, fermi la koncentrejon. Ili ankaŭ denove devigos la atenajn potenculojn ĉesigi la deportadojn al Jaros kaj liberigi la politikajn arestitojn.

Trad. Ingrid Schödl el „Horizont"



Prof. Dr. Siegfried Bock

La konferenco pri sekureco en Eŭropo - vojmontrilo en la estonton

Jam pli ol unu jaron la konferenco pri sekureco kaj kunlaborado apartenas al la tag-ordo de la eŭropa politiko.

Tio estas esperiga signo, ĉar tiu ĉi konferenco, partoprenata de 33 eŭropaj ŝtatoj kaj de Usono kaj Kanado, altagrade predestiniĝas ŝalti la relojn por la evoluo en Eŭropo dum la lasta kvarono de nia jarcento.

Tiu-ĉi konferenco jam pruvis sian kapablon en la praktiko. Malgraŭ la klopodoj de difinitaj rondoj en okcidentaj landoj minimumigi la signifon de ĉi-tiu konferenco kaj fari obstrukciojn al ĝi, la atingitaj en Helsinki kaj Genf sukcesoj rajtigas al optimismaj atendoj rilate la fermon de la konferenco.

Sole la okazigo de tiu konferenco estas evento de granda signifo. Ja per tio ebliĝis, unuafoje en la historio de Eŭropo kunigi la eŭropajn ŝtatojn kune kun Usono kaj Kanado ĉe unu tablon, por debati kaj reguligi problemojn de sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo, ĉiujn samgrade koncernantaj. Cetere, aktuale la atingitaj rezultoj ĉe la ellaboro de la finaj dokumentoj ne estas en laŭa rilato al la ĝis nun elspezita tempo. Kaŭzo por tio tamen ne estas en la sinteno de la ŝtatoj de l'Varsovia Kontrakto. Tiuj ĉion eblan faris por eviti temporabajn debatojn pri proceduroj kaj por orientiĝi je tiuj problemoj, kiuj vere staras en la fokuso de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro. Estas senutile disputi pri tio, ĉu la problemoj de sekureco aŭ tiuj de kunlaboro ĉefrangas. La vivo mem kaj speciale la amaraj historiaj spertoj jam longe respondis tiun demandon. Tute evidente la problemoj de la sekureco ĉefrangas, ĉar sen ilia solvo ne eblas evoluigi la kunlaboron... Sed tio ne signifas subtaksi la kunlaboron. Unuafoje en la eŭropa historio ekzistas pozitivaj kondiĉoj, por larĝe evoluigi la kunlaboron sur la fundamento de samrajteco kaj reciproka utilo...

La ŝtatoj de la Varsovia Kontrakto sekvas la principon, ke la konferenco de eŭropa sekureco ne estas solokaza evento.

Post la unua tuteŭropa konferenco oni ne regresu en periodon de duflankaj kontaktoj aŭ kontaktoj inter ekzistantaj grupoj. Ĉiu tre bone scias, ke la aktuala konferenco ne povas solvi ĉiujn demandojn kaj problemojn, komune koncernantajn Eŭropon.

Samtempe tiu unua konferenco metas novajn problemojn kaj novajn eblecojn por kunlaboro.

Tio starigas al la konferenco la taskon, krei tuteŭropan organon, kiel ĝi estas proponita de ĈSSR kaj subtenita de USSR, GDR kaj aliaj ŝtatoj.

Ekzistas bonaj kondiĉoj, por ke 1974 fariĝu signifoplena jaro sur la vojo al la firmigo de la paco kaj evoluo de fruktodona kunlaboro en Eŭropo.

Genf: La dua fazo de la konferenco pri eŭropa sekureco. GDR estas reprezentata per delegitaro sub la gvido de ambasadoro prof. d-ro Siegfried Bock unua vico, dekstre)

Foto: Zentralbild

El „Panorama DDR", trad. D. B.

Frank Wolff

Pekina sabota pafado kontraŭ la malstreĉiĝo

En la nuntempa mondo okazas evoluoj de historia graveco. La ĉefa merito pro la ŝanĝo el de la „malvarma milito" al malstreĉiĝo kaj saniĝo de la internacia situacio sendube apartenas al la pac-ofensivo iniciatita de la XXIV-a partikongreso de la KPdSU. Ĝi estas direktita al atingo de daŭraj solvoj en intereso de la paco kaj la sekureco de la popoloj. Prave la partoprenintoj de la Krim-renkontiĝo, la komunistaj kaj laboristaj partioj de la socialismaj landoj, povis indiki al tio, ke ĉi tiu politiko" de la popoloj kaj de la tuta pacama mondpubliko plenkore estas subtenata". Samtempe ili insiste avertis antaŭ la fortoj, kiuj opozicias al la internacia malstreĉiĝo kaj pledas por kreskado de la militpreparoj, por la pufigo de militbuĝeto. Al tiuj fortoj apartenas hodiaŭ ankaŭ la maŭisma gvidistaro de la Popola Respubliko (PR) Ĉinio.

La X-a partia kongreso de la KP de Ĉinio, okazinta de la 24a ĝis la 28a de aŭgusto 1973 en profunda sekretigo antaŭ la ĉina popolo kaj la monda publiko, konfirmis, ke la pekinaj gvidantoj hodiaŭ aktivas sur ĉiuj kampoj kontraŭ la politiko kaj la interesoj de la socialisma mondo kaj iĝas rekta aliancano de la plej reakciaj rondoj de la imperialismo.

Kiel la ĉinaj gvidantoj praktikas la gvidlinion de ekstera politiko difinitan de la X-a partikongreso speciale klare manifestiĝas en la parolado far la gvidanto de la delegacio de PR Ĉinio, la vicministro por eksteraj aferoj Qiao Guanhua, en la ĝenerala debato de la XXVIII-a sesio de UN-asembleo, la 2an de oktobro 1973. Ĉi tiu parolado ne lasas dubon pri tio, ke la pekinaj gvidantoj hodiaŭ konsideras la ofensivon en ekstera politiko kontraŭ la ĉirkaŭ Sovetunio kunariĝanta socialisma ŝtataro plej signifa atakcelo de sia internacia agado. Samtempe ĝi montras, ke la pekinaj gvidantoj rigarde al la efektiviĝanta turno al malstreĉiĝo, firmigo de la sekureco kaj paca kunekzistado estanta la baza tendenco de la evoluo de nuntempaj internaciaj rilatoj plimultiĝe venas en la defensivon kaj izolon.

Timo antaŭ internacia malstreĉiĝo

En la centro de ĉiuj aktivadoj en ekstera politiko de la pekinaj gvidantoj staras la konvulsia klopodo, kontraŭefiki al la ekkomenciĝa malstreĉiĝo, malebligi la akceptigon de la principoj de paca kunekzisto kiel fundamento por la rilatoj inter la socialismaj kaj kapitalismaj ŝtatoj.

Pro kio ĉi tiu karakteriza timo antaŭ la internacia malstreĉiĝo? Atmosfero de tensioj kaj konfliktoj estas rigardata de la ĉinaj gvidantoj kiel ideala nutra substrato por la realigo de iliaj ambiciaj mondpotencaj planoj. Ili bezonas internaciajn streĉojn por pravigo por la internpolitika kurso „preparo al milito kaj krizaj tempoj", por siaj ĉiam novaj postuloj je la laborkvanto de la laboruloj ĉe artefarite malalte tenita vivnivelo kaj same por la freneza armiga politiko. Ili bezonas tensiojn kaj konfliktojn por siaj provoj, elvoki kontraŭdirojn inter la ŝtatoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj ties naturaj aliancanoj, la socialismaj ŝtatoj. Ili ne lasis fali la esperon, impliki la imperialismajn kaj la socialismajn ŝtatojn, precipe Usonon kaj Sovetunion, per konservado kaj ekscitado de streĉoj en rektan militan konfrontadon, kiu povus konduki al maksimuma reciproka malfortigo de la du kaj per tio al aŭtomata plivaloriĝo de la potencilaro kaj influo de Ĉinio. Kaj finfine ili spekulas je tio, ke la socialismaj ŝtatoj en atmosfero de streĉoj estas devigitaj al kreskantaj elspezoj por la defendado. Tio obstaklus la plenumon de iliaj planoj direktitaj al daŭra plibonigo de la vivo kaj malpliigus la atrakcian forton de la socialismo por la popoloj, ne lastvice por la ĉina popolo. En ĉi tiu senco la X-a partikongreso skizis la apokalipsan bildon de mondo en „granda tumulto", „granda ekskuo, granda dividiĝo kaj granda transformo" kiun Qiao Guanhua en sia oratoraĵo en la UN-plenkunveno fidele postdesegnis. Tamen li ne povis decidiĝi, ripeti de sur la tribuno de UN la aserton difinitan ja pli por la interna propaganda uzo, ke ĉi tiu „granda tumulto" estas „io bona, neniel malbona por la popoloj", ĉar gi konfuzigas la malamikojn kaj ŝtaligas la popolojn.

Koncepto de la „superpotencoj"

Por la klarigo de la kaŭzoj por la „granda tumulto" en la mondo Qiao Guanhua ne multe penis. Li uzis la ŝablonon de la „du superpotencoj", kiu antaŭ kelkaj jaroj far la pekinaj gvidantoj sin apogantaj al burĝaj teorioj estis ĉarpentaĉita kaj intertempe pro ofta uzo estis plensufiĉe eluzita. Ĉi tiu ŝablono formas la bazon por ideologio, en kiu ekzistas nek socialisma mondsistemo, nek komunisma mondmovado, nek nacia liberiga movado. Male vidalvide al amorfa amaso da „malgrandaj kaj mezaj ŝtatoj" staras laŭdire du „superpotencoj" (celitaj estas Usono kaj Sovetunio – F. W.), kiuj luktas unu kun la alia por la monda hegemonio kaj samtempe aliancigas kontraŭ la resto de la mondo.

Lia politika celo estas sen ĉia dubo la plejeble granda diskreditado de Sovetunio. Qiao Guanhua ja parolas pri la „du superpotencoj" kaj dediĉas ankaŭ kelkajn kritikajn rimarkojn al Usono. Sed la usona imperialismo en lia prezentado kiel ankaŭ en tiu de la X-a partikongreso estas markita kaj karakterizita per tio, ke ĝi „pli kaj pli dekaden-

cas", ke „iras ĉiam pli malsupren" kun ĝi. Kontraŭe Sovetunio estas vehemente atakita kaj kalumniita per la plej absurdaj, plej sordidaj eltrovoj. La plej nova „teoria ekkono" pri la karaktero de la soveta socio tekstas, kiel „science" ŝminkita artikolo en la teoria gazeto de la centra komitato de KP de Ĉinio „Hongqi" eksplikas, ke ĉikoncerne (kaj ne eventuale ĉe la imperialismaj ŝtatoj) temas pri „ŝtatmonopola kapitalismo. Sovetunio kiu dum la 50 jaroj ekde ĝia fondiĝo kiel neniu alia ŝtato de la mondo efektivigis la realan demokration de la laborantaro kaj la samrajtecon de la nacioj, estas nomita „faŝisma diktaturo de hitlera tipo". Per tiaj kalumnioj, kiuj estas tiel sensencaj, ke oni eĉ ne faras la provon de argumentado, per la plej malkredeblaj falsigoj de senescepte ĉiuj paŝoj en ekstera politiko de Sovetunio estu sugestita al la popoloj, unuavice al la nacia liberiĝa movado, ke Sovetunio estas la envere danĝera „imperialisma" malamiko. La kontraŭimperialismaj strebadoj de la fortoj de la nacia liberiĝa movado estu direktitaj kontraŭ Sovetunio.

Kontraŭdiroj en la mondo el maŭisma vido

La sistemo de la kontraŭdiroj en la mondo, sur kiu baziĝas la maŭisma koncepto de la „superpotencoj", iĝis ankoraŭ pli primitiva kaj triviala. Ĝi estis plu simpligita kontraŭe al la dum la IX-a partikongreso de la KP de Ĉinio (1969) proklamita versio, en kiu la konceptoj „socialismaj ŝtatoj", „proletaro" kaj „burĝaro" (en maŭisma difino) iel ajn ankoraŭ enestis. La ĉinaj gvidantoj hodiaŭ agnoskas en la mondo nur du kontraŭdirojn: la kontraŭdiron inter la „superpotencoj" unuflanke kaj la „malgrandaj kaj mezaj ŝtatoj", precipe la tielnomata Tria Mondo aliflanke kaj la kontraŭdiron inter la „superpotencoj" mem.

Ekaŭskultigas la fakto, ke la pekina propagando nuntempe dediĉas apartan atenton al la kontraŭdiro inter la „superpotencoj". Ĝisnune la „komploto de la superpotencoj" estis daŭre speciale akcentita, slogano, inventita por povi starigi Sovetunion kaj Usonon sur unu – imperialisman – rangon. Denune oni pli forte atentigas je la rivaleco de la du „superpotencoj". Tschou En-lai diris al tio en la X-a partikongreso: „La rivaleco estas absoluta kaj longe daŭra, dum ke la kunlaboro estas relativa kaj provizora".

Tiu ŝanĝo de la akcentoj certe ne sen motivo estas praktikita far la pekinaj ideologoj. Unue la timfantomo de la laŭdira „komploto de la superpotencoj" konstruita de ili dumjare precipe por la uzo kontraŭ la „Tria Mondo" perdis sian efikecon konsidere al la decida subteno, kiun Sovetunio, la tuta socialisma ŝtataro demonstras al la popoloj en la batalo kontraŭ imperialisma agreso kaj interveno. Due la progresoj en la malstreĉiĝo kaj paca kunekzisto, kiu Sovetunio atingis en la rilatoj al la imperialismaj ĉefpotencoj, inter ili Usono, fortiras al la pekina kurso al la pliakrigo de la internacia situacio la bazon por iliaj argumentoj. Al ĉi tiu evoluo oni volas kontraŭstarigi sin per la tezo de la „absoluta rivaleco".

La nepacigeblo de la baza kontraŭdiro inter la imperialismo kaj socialismo, kiu ankaŭ kaj ĝuste inter Usono kaj Sovetunio efikas, estas senhezite transformita de la ĉinaj gvidantoj en nepacigeblo de la „rivaleco de la superpotencoj".

La celo de la praktiko estas klara: La jam atingitaj sukcesoj en la malstreĉiĝo estu malplivalorigitaj, relativigitaj, reala malstreĉiĝo, vera paca kunekzisto estas false prezentitaj kiel malatingeblaj.

La partikongreso esprimis al tio: „La malstreĉiĝo estas provizora, supraĵa fenomeno, sed la granda tumulto daŭras". Qiao Guanhua asistis: „Paca kunekzisto estas la mantelo, kunekzisto de rivaloj estas la esenco „Precipe furiozajn atakojn li direktis ĉikonekse kontraŭ la soveta-usona kontrakto por prevento de nuklea milito, kiu prezentas esencan progreson sur la vojo al definitiva ekzilo de la milito el la vivo de la popoloj. Ĉi tiu kontrakto, per kiu Usono kaj Sovetunio esprimas sian specifan responson por la konservado de la mondpaco kaj kiu laŭspirite kaj laŭlitere ne estas direktita kontraŭ la interesoj de iu ajn tria ŝtato, estis kalumniita far la ĉinaj reprezentantoj kiel esprimo de la „batalo pri la mondhegemonio", instrumento por la „arbitra interveno en la aferoj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo".

Senvole sin altrudas la demando: Kiun agmanieron la ĉinaj gvidantoj atendas de ŝtatoj kiel Usono kaj Sovetunio, kies nuklea potencilaro sufiĉus, por fizike neniigi la tutan homaron? Ne la elimino de la milito kiel rimedo por ellukto de sociaj kontraŭdiroj el iliaj reciprokaj rilatoj, sed, kiel Tschou En-lai en la X-a partikongreso de la KP de Ĉinio deklaris, la „absoluta rivaleco", klartekste: la absoluta konfrontado, eĉ je la prezo de nuklea neniiga milito.

Malamikeco kontraŭ eŭropa sekureco

Ankaŭ en la poziciesprimo de la ĉina gvidantaro al la disvolviĝo en Eŭropo montriĝas novaj nuancoj. Diference al ilia antaŭa klopodado, speciale reliefigi la signifon de la azia kontinento por la tutmonda batalo kontraŭ la imperialismo, nun Eŭropo estas difinita „strategia pezocentro de luktado far la superpotencoj". La respondon je la demando pri la motivoj de ĉi tiu mensoŝanĝo donas la menciita artikolo de „Hongqi": „Ĉi tie la du hegemoniuloj havas kolosajn, ekonomiajn kaj armeajn interesojn, gi estas regiono, kie Usono kaj Sovetunio staras rekte vidalvide."

Per tio la ĉina gvidistaro demaskas sin: Eŭropo estas por ili nenio alia ol speciale taŭga tereno, sur kiu tensioj inter imperialismaj kaj socialismaj ŝtatoj, precipe inter Usono kaj Sovetunio, povas esti provokitaj. Speciale taŭga ankaŭ pro tiu, ĉar ĝi troviĝas malproksime de la limoj de PR Ĉinio kaj ĉar oni kredas, pli facile esti kapabla eviti la konsekvencojn, kiuj milita konflikto en ĉi tiu dense loĝita, ekonomie altevoluinta regiono senevite alportus por la tuta mondo.

La ĉagreniĝo de la pekinaj gvidantoj pri tio estas evidenta, ke ĝuste en Eŭropo tiaj esencaj progresoj en la malstreĉiĝo estis atingitaj, ke sistemo de kolektiva sekureco kaj kunlaboro iĝis jam ne fora futurvizio, sed atingebla proksimcelo. Des pli febraj iĝis la klopodoj de la ĉinaj gvidantoj, meti obstaklojn al ĉi tiu procedo. Ankaŭ ĉi tie la terurilo de „soveta danĝero" estas konstruata, la imperialismaj kaj kapitalismaj ŝtatoj de Okcidenteŭropo estas false prezentitaj kvazaŭ viktimoj, kiujn la „socialimperialismo" intencas fendi kaj post tio enkorpigi en sian influsferon, la neceso de ilia ekonomia, politika kaj armea (!) unueco kaj same la konservado de la militistara ĉeesto de Usono estas emfazita. En la bildo, kiun la ĉina propagando desegnas pri Eŭropo, ludas rolon nek la socialismaj ŝtatoj (kiuj ampleksas du trionojn de la eŭropa teritorio), nek la komunisma movado, nek aliaj demokrataj kaj progresemaj fortoj. La sinteno de la pekinaj gvidantoj al la interesoj de la eŭropaj popoloj bezonas konsidere al tio certe neniun kroman eksplikon.

Atakoj kontraŭ la kolektiva sekureco en Azio

La elradia forto de la ekzemplo de malstreĉiĝo en Eŭropo je aliaj regionoj de la mondo – precipe je Azio- kaŭzas al la ĉinaj gvidantoj grandan cerbumadon. Ĉar atmosfero de sekureco kaj kunlaboro en Azio, kiun ili rigardas sia tradicia influsfero, fortirus la bazon al ilia politiko de la konfliktoj, de la agitado de unuopaj ŝtatoj unu kontraŭ la alian.

Koresponde vehementa estas ilia reago je ĉiu iniciato en ĉi tiu direkto kaj precipe je la simptomoj de kreskanta kompreno, kiun trovas la ideo de la kolektiva sekureco inter la aziaj ŝtatoj. Ĉar konsidere al la plurfojaj, tute klaraj proponoj de la soveta registaro pri la egalrajta partopreno de ĉiuj aziaj ŝtatoj, do ankaŭ de PR Ĉinio, en sekurecsistemo la asertoj de intencita „encirkligo" de Ĉinio iĝas pli kaj pli malkredeblaj kaj ne ekzistas raciaj argumentoj kontraŭ tiuj proponoj, Qiao Guanhua ne havis alian rimedon antaŭ la UN ol rifuĝi al insultadoj, kiuj eĉ en la maŭisma vorttrezoro ne estas tute ĉiutagaj. Li arogante asertis, ke Sovetunio estas eŭropa ŝtato, kaj kontestis al ĝi la rajton, zorgi pri la azia sekureco. La fakton, ke Sovetunio ampleksas pli ol trionon de la azia

kontinento (Ĉinio kontraŭe apenaŭ kvinonon), ke ne malmultaj grandaj kaj negrandaj nacioj kaj naciecoj de Azio apartenas al la popola familio de Sovetunio, li ŝajne plene ignoris. Qiao Guanhua plue faris riproĉojn al Sovetunio, voli etendi la Varsovian Kontrakton sur Azion, kaj finfine komparis la proponitan azian sekurecsistemon kun la de Dulles fondita agresa SEATO-pakto. Qiao Guanhua ne entreprenis etan provon, pruvi tiujn asertojn. La monstreco de la akuzoj kaj la laŭteco de la parolado restis ĉe tio liaj solaj „atutoj". Pri sia absolute kontraŭmalstreĉiĝa sinteno la ĉinaj gvidantoj lasis ankaŭ en la lasta tempo nenian dubon pro sia sinteno al la konflikto en la Proksima Oriento, la plej danĝera krizocentro sur la azia kontinento post la fino de la vjetnama milito. Ili provas imputi Sovetunion kiel ĉefkulpulon pro la estiĝinta situacio kaj ne laciĝas false prezenti sin la veraj gardantoj de la interesoj de la arabaj popoloj. Ili serioze riskas postuli de la arabaj ŝtatoj, kiuj devas defendi sin kontraŭ dumjara agreso far imperialisma Izraelo armita ĝisverte kaj de Usono per mono kaj modernaj armiloj senrezerve subtenita, disiĝi de siaj plej intimaj aliancanoj, la socialismaj ŝtatoj, antaŭ ĉio de Sovetunio, kaj „apogi sin sur la propra forto". Kiun „helpon" la arabaj ŝtatoj povus atendi de Ĉinio, se ili sekvus tiun konsilon, evidentiĝas el la aktivadoj de la ĉina reprezentanto en UN-sekureckonsilio: Post kiam li estis fifamiginta Sovetunion, estis rifuzinta kaj disdebatinta la konstruivajn proponojn de Sovetunio kaj de pluraj ŝtatoj ne ligitaj en paktoj, sed mem ne estis farinta unuuran kontraŭproponon, kiu povus progresigi la solvon de la problemo, li distingiĝis per malĉeesto ĉe ĉiuj voĉdonoj pri rezolucioj, kiuj devigis Izraelon al ĉesigo de militagadoj. Plenprave ĉi tiu agmaniero estis akre kondamnita per la araba publiko kaj en la mondkongreso de la pacfortoj en Moskvo.

Malakcepto de la malarmadaj proponoj

La ĉina reprezentanto ne povis ne esprimi sian opinion ankaŭ pri demandoj de malarmado, kvankam ĉi tiu temo kaŭzis al li videblan malplezuron. Ankaŭ ĉikoncerne la pekinaj gvidantoj, kiuj dum jaroj senindulge malobservante la interesojn de la propra popolo kaj ne konsiderante grandajn ekonomiajn malfacilaĵojn faras obstinaĉan armpolitikon, por povi plejeble baldaŭ ankaŭ armee fundamenti siajn grandpotencajn pretendojn, okupas ege detruivan pozicion. Precipe konsternita estas la ĉina gvidantaro, kiu ne preterpasigas okazon, false prezenti sin „advokato" de la „Tria Mondo", pro la soveta propono, ke la konstantaj membroj de la UN-sekureckonsilio devus redukti siajn armeajn elspezojn je 10 procentoj kaj disponigi parton de la rezultontaj rimedoj al la evoluantaj landoj. Tiu propono, kiu tiel evidente korespondas al la interesoj de la ŝtatoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj povus plu progresigi la batalon pri malarmado, absolute ne konformis al la armadkoncepto kaj al la kontraŭsoveta „superpotenc-" tezo de la ĉina gvidantaro. Sed ĉar ĝi trovis la subtenon far multnombraj reprezentantoj de la evoluantaj landoj, la ĉina propagando estas devigata al evitmanovroj. Ĝi provas antaŭ ĉio pridubi li sincerecon de la propono. La informagentejo Hsinhua verkis ampleksan artikolon, en kiu ĝi provas pruvi per longa listo de antaŭaj similaj proponoj far la soveta registaro, ke ĉe tio temas pri nenio „nova". En tiu listo, kiu nur pruvas, ke Sovetunio konstante konsekvence pledas por la interesoj de la ŝtatoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, memkompreneble mankas indikoj pri tio, kiu malakceptis ĉiujn ĉi proponojn. Anstataŭe fervore estas cititaj esprimiĝoj de tiuj fortoj, kiuj torpedis ilin, nome la plej dekstrumaj fortoj de la imperialismaj ŝtatoj kaj iliaj presorganoj, kiuj – kiel povus alie esti – ankaŭ la plej novan proponon misaprezas kiel „propagandan manovron". Qiao Guanhua finfine menciis kiel „frapan argumenton", ke la armadelspezoj de la ŝtatoj „estas malfacile kalkuleblaj". Se oni konsideras la esencon de ĉiuj ceteraj esprimiĝoj de la ĉina reprezentanto, tiam rezultas, ke la malarmado principe ne estas realigebla.

La kaŭzo por tio estas laŭ la maŭisma ŝablono refoje la potencpolitiko de la „superpotencoj". En pozo de kuratoro Giao Guanhua deklaris, ke la aktuala problemo por la malgrandaj kaj mezaj ŝtatoj ne konsistas en la malarmiĝo, sed en la armado. Al la evoluantaj landoj kun iliaj grandaj ekonomiaj problemoj li klarigis, ke eĉ „la defendoforto de Okcidenteŭropo ne sufiĉas", kaj senmaske li konfesis per tio, ke Pekino ankaŭ en la malarmada afero paktas kun la militemaj fortoj de la imperialismo kaj de NATO kontraŭ la interesoj de la socialismo kaj de ĉiuj pacamaj fortoj.

Ni resumu: Ĉiokuniganta elemento de la nuntempa kurso en ekstera politiko de la ĉinaj gvidantoj estas ilia malamikemo kontraŭ malstreĉiĝo. Ĝi manifestiĝas en ĉiuj paŝoj en ekstera politiko kaj starigas la pekinajn gvidantojn apud la plej reakciajn fortojn de la mondimperialismo. Samtempe ĝi estas grava motivo por tio, ke la ĉinaj gvidantoj plue pliakrigis la kontraŭsocialisman, kontraŭsovetan ĉefan puŝdirekton de ilia aktorado sur la internacia scenejo. Tio estas la decida rekonilo de la dekstreniĝo, kiun la ĉina ekstera politiko en la lastaj jaroj faradis kaj kiu sur la X-a partikongreso trovis denovan konfirmon.

Trad. D-ro M. Schüler el „Horizont"

Esperanto kiel pontolingva fenomeno

Oni ofte parolas pri la Internacia Lingvo kiel perilo de malsamaj kulturoj aŭ lingvosferoj. Sed kiam tiu perado komenciĝas – ĉu en la momento de ek- aŭ de retraduko?

Unuflanke amasiĝas kvanto da plej diversaj tradukoj – precipe el la grandskale uzataj lingvoj – kiuj akceptas la sorton de la deponitaj trezoroj. Aliflanke postrestas en- kaj elesperantigo de tiuj verkoj, per kies retraduko – profitante facile transireblan ponton de Esperanto – oni povus multobligi ne nur ilian konatecon, sed samtempe altigi la prestiĝon de la Internacia Lingvo mem.

Esperanto nome povus pli bone konkuri kun la aliaj lingvoj, se ĝi plene eluzus unue Esperantan provizon rilatan al la literatura heredaĵo de la malgrandaj nacilingvoj – amasigitan dum jardekoj de sia ekzistado. Cetere ni povus trovi plurajn ekzemplojn en la ĝisnuna Esp. literaturo: esperantigo de la verkaro de l'fama ĉeĥa poeto P. Bezruĉ iam servis kiel bazo por ties ĉina versio.

La tereno estas sufiĉe vasta por plugi ĝin. Oni rigardu nur la lingvan karton de Eŭropo kun blankaj insuloj sur la teritorioj kiel la latva, estona, islanda, frisa, slovena, kimra, luzaca ktp.

La publiko ĝenerale jam multon aŭdis pri Esperanto, sed malmulton spertis, kiamaniere ĝi funkcias en diversaj sferoj de la spirito.

Kiam ni siatempe demandis k-don Nguyen von Kinh, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kiamaniere la esperantistoj povus helpi al la vjetnama popolo, li simple respondis: disvastigante nian literaturon... Kompreneble precipe konigante ĝin al la alilingvanoj, en kio praktika utilo de Esperanto klarvide manifestiĝas.

Oldřich Knichal, Praha

Alternativo

Sur preĝeja pordego en Marseille estis skribita indiko: „Se vi intencas ŝanĝi vian vivokonduton bonvolu eniri!" Baldaŭ poste, aldono estis legebla: „Sed se ne, venu hodiaŭ vespere al la nokta klubejo „Verda Kakatuo" en la Malnova haveno!"

Rudi Graetz

25 jaroj Germana Demokratia Respubliko kaj la laboro de la esperantistoj



La prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Rudi Graetz, dekstre la sekretario Detlev Blanke

Foto: Zentralbild

Dudekkvin jaroj ne estas longa tempo en la historio de la homaro. Tamen signifoplenaj estas 25 jaroj en rilato al la kvaronjarcenta jubileo de Germana Demokratia Respubliko, kiun ni festos la 7an de oktobro 1974. Kia profunda transformiĝo de la socio dum tia mallonga tempo, ke estas direble, ke jam historia dimensio estas videbla. Ankaŭ en nia respubliko pruviĝis, ke sole la socialismo kapablas solvi la sociajn evoluproblemojn en la intereso de la laborantaj homoj.

La socialismo ĉe ni en GDR estas reala kaj konkreta. Ĝi estas nun perceptebla per homaj sensorganoj. Per aliaj vortoj: La socialismo montris sian superecon super la kapitalismo – ne per belaj vortoj, sed per transformiĝo de la politikaj kaj socialaj bazoj de la vivo.

Tiu ĉi evoluo ne estis facila vojo. La imperiismo entreprenis ĉion por malebligi tiun ĉi historian progreson. Nia komenco ne estis favora, speciale en ekonomia rilato. Ni devis venki grandajn malfacilaĵojn. Sed la internaciaj potencproporcioj profunde ŝanĝiĝis per la venko super la Hitler-faŝismo. Per la helpo de la socialismaj landoj, speciale per la helpo de Soveta Unio, nia GDR kreskis al ŝtato, kies tuta celo estas la feliĉo kaj bonfarto de la laboranta popolo. Ĉi tie ni havas la bazon por la optimismo, kiu radias de nia respubliko.

En ĉiuj socialismaj landoj ni vidas sanan evoluon, kiu estas libera de konstantaj krizaj okazaĵoj. La socialisma ekonomio pruvite kreskas pli rapide ol la kapitalisma. Senhalte la socialisma mondo marŝas antaŭen. En socialismaj landoj la ĉeftasko nun estas la plua altigo de la materia kaj kultura vivniveloj.

La evoluitaj kapitalismaj landoj ankoraŭ havas altan nivelon de la produktado. Sed ĉu ili povis solvi la bazajn socialajn problemojn? En nia socialisma mondo ekzistas sociala sekureco, ĉar ĝi garantias al ĉiu la rajton de laboro, dum en kapitalisma mondo pli kaj pli geviroj senlaboriĝas. Dum la deka Mondfestivalo en Berlin juna esperantisto el kapitalisma lando demandis: „Kaj kie estas la almozuloj?" Jes, niaj gejunuloj senlaborecon, senhejmecon, inflacion kaj aliajn sociajn senhumanajn aĉaĵojn de kapitalismo nur ankoraŭ konas el historiaj libroj kaj el gazetoj. Kia diferenco inter la du mondoj.

25 jaroj GDR signifas ne nur socialan sekurecon, sed ankaŭ pacaman ŝtaton, kiu deziras esti vera amiko ankaŭ por niaj najbaroj. Ni GDR-esperantistoj estas feliĉaj, ke ni estas civitanoj de tiu ĉi progresema ŝtato, kiun nun jam pli ol 100 ŝtatoj agnoskis diplomatie.

Kompreneble ni, membroj de Kulturligo de GDR, dum tiu ĉi jaro festos konvinkite la 25an datrevenon de la fondo de nia Germana Demokratia Respubliko.

Okaze de datrevenoj necesas rerigardi la pasintan tempon kaj la nuntempan situacion, t.e. konstati la atingitajn sukcesojn, sed ankaŭ la mankojn, kiuj ankoraŭ ekzistas por ekkoni la realan fundamenton por la estonto. Kaj hodiaŭ ni povas konstati ke ni sukcesis konstrui bonan fundamenton por la estonto de la laboro de niaj GDR-esperantistoj. Nia organizo havas solidan bazon por perspektivplena laboro. Dependas nur de ni esperantistoj mem, ĉu nia laboro stagnos aŭ ĉu ni rapide antaŭenmarŝos.

Post kelkmonata preparlaboro kaj ellaboro de direktivoj okazis la 31an de marto 1965 en Berlin la konstitua kunsido de Centra Laborrondo (CLR). La dua Centra Konferenco, kiu okazis la 27an kaj 28an de majo 1972 en Berlin, akceptis novajn direktivojn kaj elektis novan CLR. Al ĝi apartenas 36 elektitaj membroj, inter ili 3 inoj. CLR okupas tri pagatajn geoficistojn.

Per la konstituo de CLR antaŭ 9 jaroj estis metita fundamento por organizaĵo de GDR-esperantistoj, kiu donis al ili ĉiujn eblecojn de rapida evoluo per helpo de Kulturligo de GDR, kies parto ĝi estas. Post la fondo de Distriktaj Laborrondoj kaj subdistriktaj Laborgrupoj la organizo rapide kreskis kaj per ĝi la aktiveco de la GDR-esperantistoj.

Tamen siatempe kelkaj gvidaj esperantistoj en okcidentaj landoj bedaŭris la GDR-esperantistojn, kiuj „nur" trovis sian hejmon en Kulturligo kaj ne en „propra" organizo. Ili kredis tion malavantaĝa por ni, ne sciante, ke Kulturligo estas speciala amasa organizo, kiu nur ekzistas en GDR kaj ne havas similaĵon en aliaj socialismaj landoj. (Ĝi apartenas al la tradicioj de LEA, kiu antaŭ 1933 jam aktive kunlaboris en „Interes-unuiĝo por laborula kulturo" IFA = Interessengemeinschaft für Arbeiterkultur, komuna tegmentorganizo de laboristaj kulturasocioj, do rekta antaŭulo de la nuna Kulturligo). Ne sciante, ke nesektemaj GDR-esperantistoj antaŭ la fondo de CLR pledis por esperanto-organizo en la kadro de ĝuste tiu ĉi Kulturligo por ĝui per ĝi multajn avantaĝojn. Kaj niaj esperantistoj, kiuj estis por la aliĝo al nia Kulturligo pravis, kiel montris nia pasinta laboro kaj niaj kreskantaj sukcesoj dum la lastaj naŭ jaroj. Ni sentas nin hejme en Kulturligo de GDR, kiu

1-e estas la sola organizo, kiu unuigas multajn adeptojn de kulturaj interesoj kaj servas al la kulturkrea agado de niaj civitanoj;


2-e speciale okupiĝas pri la intelektularo. La Kulturligo estas ejo de ren-

kontiĝoj de sciencistoj inter si kaj aliprofesiuloj. Renkontiĝas tie naturscienciistoj kaj soci-sciencistoj kune en kluboj. Ankaŭ okazas multaj renkontiĝoj de la intelektuloj kun la laborista klaso;

3-e La 8a Partikongreso de SED starigis la taskon, ke Kulturligo fariĝu ankoraŭ pliforta kultura amas-organizajo de ĉiuj civitanoj, kulture interesitaj.



La veterano de la laborista esperantista movado, la instruisto Ludwig Schödl estas aktiva membro de CLR, verkinto de la unua lernolibro kaj ofte aktivanta en junulara medio.



Bonan laboron faris la fakgrupo de CLR por interlingvistiko kaj esperantologio, sub gvido de prof. d-ro Viktor Falkenhahn, Humboldt-Universitato Berlin. Prof. Falkenhahn klarigas la lern-unuojn ĉe kelkaj naciaj lingvoj kompare al Esperanto

Post naŭjara laboro en la kadro de la Kulturligo nun en ĉiuj 15 distriktoj de GDR ekzistas distriktaj laborrondoj, kiuj estas gvidorganoj por pli ol 70 subdistriktaj laborgrupoj kun pli ol 120 grupoj, studrondoj kaj cirkloj por komencantoj. Ili laboras pli malpli aktive, kvankam ili havas ĉiujn eblecojn en Kulturligo, t.e. je nia dispono estas klubejoj, ĉambroj por kursoj, ankaŭ financaj rimedoj, kiujn niaj grupoj ofte ne sufiĉe uzas por sia laboro. Ni bone scias, kiaj financaj problemoj ekzistas ĉe aliaj eksterlandaj esperantoorganizoj en nesocialismaj landoj, kiuj estus feliĉaj, se ili havus niajn eblecojn. Senkostaj Centraj Konferencoj, Distriktaj Konferencoj, Seminarioj ktpl. pri tio ili nur povas revi.

Dum la jaro 1974 okazis la 8a seminario por kursgvidantoj. La partoprenintoj estis plej parte junaj kaj novaj esperantistoj. CLR organizis ĉiujare unu semajnan seminarion por kvalifikado de kursgvidantoj kun aktualaj politikaj, kulturpolitikaj kaj fakaj temoj, koncernantaj inter alie pedagogiajn, metodajn problemojn de la lingvo-instruado, interlingvistikajn kaj esperantologiajn. Krome okazis fakultativaj ekzamenoj.

Krom la kunsidoj de CLR, regule kunvenas la „labor-aktivo de CLR", la metodika komisiono, nun helpante la preparon de nova lernolibro, la komisiono por interlingvistiko. Krome la terminarkomisiono kaj la redakta komisiono de tempo al tempo kunvenas. Ĵus fondiĝis laborgrupo de fervojistaj esperantistoj kaj fakgrupo de filatelistaj esperantistoj estas en preparo. Neforgeseblaj, la aktivecoj de nia junulara komisiono, kiu speciale en la pasinta jaro havis bonajn rezultojn. La ĉefajn rezultojn de tiuj ĉi kunsidoj ni regule publikigis en la organo de CLR „der esperantist". Ĝis nun ni sukcesis eldoni 62 numerojn, inter ili kvar kromaj numeroj. Ni provis konstante plibonigi la enhavon kaj pli internaciigi ĝin, nun rezumante germanlingvajn artikolojn en esperanto. La eldonkvanto nun atingis 5000 ekzemplerojn.

Kunlaborante jam de komenco kun Mondpaca Esperanto-movado CLR depost 1966 ĉiujare regule eldonas numeron de „Paco" kaj ankaŭ nun intencas daŭrigi tiun ĉi tradicion. Niaj grupoj inter alie organizas pac-vesperojn kaj kolektas monon por la viktimoj de imperiismaj atakoj. Nuntempe ili kolektas por la rekonstruo de Vjetnamio kaj por la persekutataj demokratoj de Ĉilio. Niaj GDR-esperantistoj havas multajn korespondantojn en la socialismaj landoj kaj ankaŭ en aliaj landoj. Ili organizas ekspoziciojn, kie ili montras siajn korespondaĵojn kaj ankaŭ donacojn, kiujn niaj vjetnamiaj amikoj kreis el detruitaj usonaj aeroplanoj, kiuj antaŭe forbombadis iliajn pacajn hejmojn.

Kun delegitaroj CLR ĝis nun partoprenis la Eŭropan Esperanto-Konferencon en Vieno (1965) kaj la UK en Budapest (1966), Helsinki (1969), Vieno (1970), London (1971) kaj Beograd (1973) kaj partoprenis tie ankaŭ la MEM-aranĝojn. Delegitaroj de niaj junaj amikoj partoprenis la koncernajn TEJO-kongresojn. La situacio en la mondo ankoraŭ ne estas tia, ke ni metu la manojn sur la genuoj. La lasta kruela ekzemplo estas por ni Ĉilio. La sendependeco de junaj naciaj ŝtatoj ankoraŭ ne estas certigita. Hindoĉinio kaj la Proksima Oriento bezonas konstantan, sekurigitan pacon ktpl. Tial ni ne nur devas daŭrigi nian laboron por fortigi MEM, sed samtempe ni ankaŭ devas labori por ankoraŭ pli larĝa pacmovado.

Post la dua mondmilito la germana poeto Bert Brecht trovis sian patrion en Germana Demokratia Respubliko. Li foje klarigis, ke la tuta potencaparato de la militinteresuloj estus senpova, iliaj planoj por agresado sentaŭgaj, se la popoloj inkluzive la misuzataj soldatoj ekkonsciiĝus pri la veraj situacio kaj faktoj. Helpi, ke la popoloj ekkonu la verajn kaŭzojn de militoj, estas ankaŭ grava tasko por ĉiu konscia esperantisto.

La esperanto-organizajoj de la GDR-esperantistoj en Kulturligo sekvas en tiu rilato la laboristajn esperantistojn. Kompreneble tial estas, ke ni esploras la historion de la Laborista Esperanto-Movado, flegas ĝian tradicion kaj klopodas konkludi el la spertoj por la nuntempa laboro. Al niaj najbaraj landoj ni havas amikajn rilatojn. Ni strebas al pli konkretaj konoj de la historio, kulturo, moroj, kutimoj kaj ankaŭ la lingvoj de aliaj landoj kaj uzos por tio ĉiujn eblecojn por la konatiĝo.

La sinteno de la iama imperiisma Germanio por siaj najbaraj ŝtatoj konstante signifis minacon. GDR estas la unua germana ŝtato, kiu ne minacas la limojn de siaj najbaroj, ĉar en GDR al neniu eblas profiti per milito aŭ per produktado de armiloj. Tial inter aliaj vera amikeco evoluas kun najbaraj Pollando ĈSSR kaj. Tio kompreneble ankaŭ koncernas organizojn de tiuj ĉi landoj.

Speciale intimaj amikecaj rilatoj, kiuj sin konstante evoluas sur ĉiuj kampoj de la agado de la Kulturligo de GDR, evoluis kun la koncernaj kunagantaj organizaĵoj en Pola Popola Respubliko. Tiel ekzistas firmaj interkonsentoj kun polaj societoj, kiuj agas sur la sfero de la landa kulturo kaj de la gardo de hommedio, de foto-asocioj, de filatelaj organizoj kaj ankaŭ de niaj esperanto-asocioj. La tuta agado de la Kulturligo – kaj ne laste de niaj esperanto-amikoj – kontribuis multe al tio, ke la civitanoj de PPR kaj GDR akiras pli kaj pli profundajn reciprokajn konojn pri la historio kaj de la nuntempa kultura vivo en ambaŭ landoj.

Depost la enkonduko de la senviza limtransiro komence de la la jaro 1972 inter PPR kaj GDR por la ŝtatanoj de ambaŭ landoj kompreneble ankaŭ la kunlaboro inter polaj kaj GDR-esperantistoj rapide kaj konstante kreskis. Kreskis kompreneble ankaŭ la intima kunlaboro inter CLR kaj la estraro de PEA. En GDR ni uzas pli kaj pli la instrumaterialojn de Andrzej Pettyn, kiu en februaro 1974 dum unu semajno gvidis intensan kurson por GDR-kursgvidontoj, novaj esperantistoj de la distrikto Cottbus.

Kompreneble CLR ankaŭ havas intimajn rilatojn al la Esperanto-Komisionoj de Soveta Unio kaj al la landaj organizoj de ĈSSR, Hungario, Bulgario kaj Vjetnamio. CLR ankaŭ pretas kunlabor kun UEA, ĝis nun ankoraŭ kiel ne aliĝinta landa organizo, kaj ankaŭ

pli malpli kun landaj organizoj en la cetera mondo.
Kiajn eblecojn havas komencantoj en GDR por uzi la lingvon kaj utiligi ĝin por sia patrio, GDR? Novaj lernantoj nun havas eblecojn praktike uzi esperanton, komencante ĝenerale per korespondado. Ili facile havas la eblecon trovi amikojn en Soveta Unio, Bulgario, ĈSSR, Hungario, Rumanio kaj Pollando kaj ankaŭ persone konatiĝi kun ili. Lernante la lingvon, ili havas la eblecon legi la gazetojn, kiuj aperas en socialismaj landoj, kiel „Paco", „Juna amiko", „Homo kaj Kosmo", „Hungara Vivo" kaj la organojn de la landaj asocioj. Libroj el tiuj ĉi landoj estas haveblaj en internaciaj librovendejoj, kiuj ekzistas en la distriktaj urboj. Kun siaj eksterlandaj amikoj povas partopreni iujn internaciajn aranĝojn, kiuj nun ĉiujare okazas en la nomitaj socialismaj landoj. Tie ili povas konatiĝi kun la lando, trovi novajn amikojn kaj inde reprezenti sian patrion.
La esperantistoj de GDR pasintjare havis kelkajn bonajn sukcesojn. Elstara certe estis la aranĝo de niaj junaj esperantistoj dum la 10a Monda Festivalo en Berlin. Aranĝo inter multaj, sed tamen escepto, ĉar ne estis bezonataj la kabinoj por tradukistoj. Aliloke necesis traduki germane, ruse, angle, france, hispane kaj arabe.
Aktivecoj ankaŭ montris sin speciale sur la scienca kampo. Regule kunvenis la CLR-Komisiono por Interlingvistiko por diskuti lingvo-sciencajn problemojn. Sukcese ĝi partoprenis universitatajn kolokvojn en Jena kaj Leipzig, kontribuante per prelegoj kaj diskutkontribuoj. En GDR aperantaj sciencaj revuoj „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung 1/2 1973" kaj „Das Altertum 3/1973" publicis sciencajn artikolojn de Detlev Blanke. Pri la kolokvo en Jena skribis la gazeto „Sozialistische Universität" Nr. 6/73:

> „La aranĝo entute povas esti taksata kiel valora kontribuo al la pluevoluigo de marksisma-leninisma lingvistiko en nia sekcio".

Ekzistas pluaj interesaj aktivecoj de nia organizaĵo, pri kiuj ni jam regule kaj detale raportis en „der esperantist".
Konklude ni devas konscii, kian grandan respondecon ni havas kiel esperantistoj de GDR. Ni devas kunligi niajn personajn interesojn kun tiuj de la socio.
Necesas ĉiam pripensi reale kaj saĝe, kiamaniere ni povas utiligi esperanton por la socio. Per tia maniero ni utilas al ni kaj al esperanto, ĉar per tio ni atingos agnoskon por la laboro de la esperantistoj.


Köpenick kvartalo de Berlin,

regiono de ripozo kaj historia memoro

Berlin, ĉefurbo de Germana Demokratia Respubliko estas favorita per sia situo inter arbaroj, lagoj kaj akvostratoj. Tio koncernas aparte la sudorientan urboparton Köpenick. En la skalo de ripozregionoj de Germana Demokratia Respubliko, ĝi okupas la duan lokon (post Balta Maro).
Plua interesa trajto de Köpenick estas ĝia historio. Praa centro estas insulo, kie ekloĝis slavaj fiŝistoj en antaŭhistoria epoko. De ili originis la nomo: Copanic- insula loko. Hodiaŭ Köpenick estas grava industria centro, ĉefaj produktoj estas kabloj, transformatoroj, elektronikaj aparatoj kaj ŝipoj. Riĉaj revoluciaj tradicioj kaŭzas, ke multaj placoj, stratoj kaj memorejoj portas la nomojn de antifaŝistoj, persistaj batalantoj de la laborista klaso.
En sportgastejo okazis 1933 la lasta kunsido de Centra Komitato de la Germana Komunista Partio sub Ernst Thälmann (memorejo Ziegenhals). Pro minacanta perfido la partoprenantoj devis fuĝi per boato trans la akvo. Ankoraŭ nun oni povas rigardi boaton kaj ĉambron en origina stato. Je sia erupta ekpotenco la faŝismo faris senkompatan finkalkulon kun la klaskonscia laboristaro per la „Köpenicker Blutwoche" (Köpenicka sangosemajno), dum kiu centoj da antifaŝistoj estis enkarcerigitaj 91 el ili murditaj, post kruelaj turmentoj. Videblaj rezultoj de la revolucia historio estas la nunaj viv- kaj laborkondiĉoj de la laboranta popolo, bazantaj sur la ĉiam kreskanta produktiva potenco. Tion atestas la socialaj, sanecaj kaj kulturaj aranĝoj, la zorgemakonservo de historia heredaĵo. Praa estas la laveja metio kaj la gildo de lavistinoj. Mondfamon atingis la ruzaĵo de la ŝuisto Wilhelm Voigt, laŭdira „Kolonelo de Köpenick". Perhelpe de malnova uniformo kolonela li submetis taĉmenton da soldatoj, ordonis arestigon de la urbestro kaj konfiskis la urban kason. Ĝia ago mokige nudigis la ekstreme florantan militarismon imperiestran. Tio okazis en la jaro 1906. Nun ĉiujare dum la „Köpenicker Sommer" (Kepenika somero) la iama okazo estas parto de festa procesio. Multokazaĵa estas la historio de Köpenick kaj de la Köpenick-a kastelo sur la insulo. Jardeke ĝi estis restadejo de rabkavaliroj kaj lokaj aŭtokratoj, nun ĝi estas atrakcia centro kultura kun Artometia Muzeo, kafejo kaj belega parko. Famon posedas la tie okazantaj koncertoj kaj aliaj artaj aranĝoj. En la korto oni ludas subĉielan ŝakon per grandaj figuroj – spirita kaj korpa sporto. Sed speciala altireco de Köpenick estas la akvo – kaj arbaroriĉa ĉirkaŭo.
Kun dekduoj da lagoj ĝi estas paradizo de fiŝhokistoj, akvoturistoj, banemuloj kaj ĉiu ferianto. La Köpenick-a ekskursa – kaj ripoza regiono disponas pri multaj ripozadejoj. Inter la 11 kampadejoj estas daŭraj, junularaj kaj internacia kun tendoj kaj bungaloj. Invitas 57 ekskursaj gastejoj, 8 strandbanejoj, multaj vidindaĵoj kaj memorejoj. Kiel ekzemple la „Pionierpark Ernst Thälmann" en la „Wuhlheide", la „Grünauer Regattastrecke" (akvosportejo de internacia rango), la „Müggelturm" (videja turo). Lagojn kaj riverojn trasulkas floto de pasaĝeraj ŝipoj. Tre ŝatata cirkonstanco estas la favora interligo de feriado en bela ripoziga ĉirkaŭo kun la proksima ebleco konatiĝi kun la vidindaĵoj de Berlin. Tio kaj la pejzaĝa beleco de la ripozregiono de Köpenick altiras pojare 6 milionojn da feriantoj el GDR kaj eksterlando.

Rudolf Hahlbohm

La ĉirkaŭo de Berlin estas lago- kaj arbaro-riĉa Foto: Zentralbild



Bert Brecht

Parabolo de l'Budao pri la brulanta domo

Gotama, la Buda', instruis
L'instruon pri la rado de l'avid', sur kiun estas ni plektitaj, kaj rekomendis
Forigi la avidon, por
Eniri sendezire la Nenion, kiun nomis li Nirvana.
Disĉiploj liaj foje lin demandis:
„Kia estas ĉi Nenio, majstro? Ĉiuj ŝatus ni
Forigi la avidon, kiel rekomendas vi, sed diru,
Ĉu Nenio tiu, kiun ni eniros,
Eble estas kiel tiu unuest' kun ĉiu kreitaĵo,
Kiam je tagmezo oni kuŝas en la akvo, malpezkorpe,
Preskaŭ ne pensante, pigra en la akvo, aŭ endormiĝas,
Apenaŭ konsciante pri l'ĝustigo de l'kovraĵo,
Rapide fordronante, do ĉu ĉi Nenio
Estas Nenio gaja, bona, aŭ ĉu ĉi Nenio via
Simple nur nenio estas, frida, malplena, sensignifa".
Silentis longe la Budao, poste malvigle diris:
„Respond' ne estas al demando via".
Vespere tamen, post forir' ilia,
Sub artokarp' sidante, la Budao al aliaj,
Ne demandintaj lin, rakontis jenan parabolon:
„Antaŭ nelonge vidis mi brulantan domon.
La flamo lekis ĉe l'tegment'. Mi alpaŝinte vidis,
Ke ankoraŭ enestas homoj. Paŝis tra la pordo mi kriante,
Ke fajro estas ĉe l'tegment', do instigante
Ilin elrapidi. Sed l'afero
Ne urĝa ŝajnis al la homoj. Iu min demandis,
Dum fajro jam difektis lian brovon,
Kiel ekstere estas, ĉu ne pluvas,
Aŭ eble blovas vento, ĉu alia domo tie estas
Kaj tiel plu. Ne respondinte
Mi eliris ree. Tiuj ĉi, mi pensis,
Brulmorti devas, antaŭ ol demandi ili ĉesas.
Ho, amikoj, vere,
Al kiu ne la grund' jam tiel brulas, ke li
Preferas ŝanĝi ĝin al iu ajn ol resti,
Al tiu mi nenion povas diri". Tiel Gotama, la Budao.
Sed ankaŭ ni, ne plu okupiĝantaj pri la art' de l'suferado,
Male, okupiĝantaj pri la arto de l'nesuferado, kaj farante
Proponojn multajn terrilatajn, kaj instruante al la homoj
Forpeli siajn homajn turmentantojn, opinias, ke al tiuj, kiuj
Malgraŭ proksimaj bombaviadil-eskadroj de l'kapital'
ankoraŭ tro detale demandadas,
Kion ni pri tio pensas, kiel ni imagas jenon
Kaj kio estos pri iliaj ŝparujoj kaj dimanĉaj
vestoj post revolucio,
Al tiuj ni ne multe povas diri.

Trad. D-ro Karl Schulze

A. Ĥarkovskij

ĈAHOTINA ODISEO

La 24. 2. 1973 finiĝis la vivo de fama sciencisto kaj esperantisto. Jaron antaŭ lia morto la ĵurnalisto s-ro A. Ĥakovskij el Moskvo povis intervjui profesoron d-ron Ĉahotin

Ni sidas ĉe la plej malnova esperantisto en la mondo, kiu ellernis Esperanton jam en la jaro 1892. Malantaŭ la fenestroj bruas Lenin-prospekto. Sur muroj pendas portretoj de amikoj de profesoro doktoro Sergeo Ĉahotin – akademiano Pavlov, Ejnŝtejn, G. Wells, Jolio-Kuri.

Sergej Stepanoviĉ komencas rakonton, kaj al mi ŝajnas, ke historio mem eniras la pordon.

Mezo de tridekoj. Londona hotelo. Apud kameno sidas duope Albert Ejnŝtejn kaj Sergeo Ĉahotin. La granda sciencisto baldaŭ fuĝos Usonon. Eŭropo freneziĝis, Hitler akiris la potencon en Germanio kaj minacas per milito. Sed Ejnŝtejn emas sin okupi nur per scienco.

– Kaj vi, mia kara lernanto, – konsilas li al Ĉahotin, revenu al viaj eksperimentoj.

– Sed, estimata majstro, kiel mi povas stari flanke de politiko. Se mi ŝlosos min en laboratorio, malkovros ion kaj homaro ĉi-tempe ekstermos sin en militoj . . . Kaj unu tagon mi malfermos la pordon de mia laboratorio – al kiu do ni transdonu nian malkovron? Ne, ni sciencistoj ankaŭ devas batali.

Pasos jaroj, A. Ejnŝtejn jam post Hiroŝima ekkomprenos la pravecon de la soveta sciencisto. Sed en tiu tempo ankoraŭ plej teruraj hom-bestoj minacis la mondon.

Ĉahotin ridetas: „La azenoj venĝas al mi". Poste li klarigas. Li, rusa homo, naskiĝis apud Stambulo en familio de rusa konsulisto. Dum lia naskiĝo la insulon, kie ripozis liaj gepatroj, skuis tertremo. Ondego forlekis turismajn azenojn, lasitajn por nokto apud la maro. Matene la patro de Sergeo ŝercis: „Ho la azenoj neniam pardonos tion al mia filo". Kaj li pravis.

Jam en la jaro 1902 Ĉahotin estis en prizonita kune kun aliaj ekribelintaj moskvaj studentoj. Poste la caro dissendis ilin laŭ la lokoj de iliaj naskiĝoj. Tiel Ĉahotin liberiĝis kaj forveturis Germanion, kie li ekstudis ĉe W. K. Röntgen. Baldaŭ li defendis jam doktoran disertacion, faris sian epokinfluivan malkovron – per ultramalvasta radio operaciis ĉelon, kiu restis post tio viva (por tiu laboro jam en tridekaj jaroj oni lin promociis por Nobela premio, sed kontraŭ lin elpaŝis faŝistaj sciencistoj – pro kaŭzoj politikaj).

En la jaro 1912 akademiano Pavlov invitis lin labori en Rusio. Ĉahotin faras hejme alian grandan malkovron – montras eksperimento, ke unuĉeluloj ankaŭ havas memoron. Sed dum la revolucio li ne povas daŭrigi sian sciencan laboron. Restadante sude, li malkovras antaŭ kozakoj, ke ilia gvidanto, blanka generalo Krasnov, vendas Rusion al kajzero Wilhelmo. Denove „azenoj venĝas al li". Ĉahotin fuĝas al Francio, poste al Germanio, kie li verkas sian faman artikolon „Al Kanoso": „Elmigrintoj devas reveni por kunlabori kun la bolŝevikoj". Reakciuloj, kiuj opiniis la profesoron ilia natura aliancano kruele atakas lin. Sed Ĉahotin kunlaboras kun progresemaj germanaj revuoj kaj por defendi sian ruĝan patrolandon ĵurnaliste venas al Ĝeneva paca konferenco, kie li amike kunlaboras kun la sovetaj gvidantoj Ĉiĉerin kaj Krasin. Ĉar Germanio fariĝis la unua el grandaj landoj, kiu agnoskis Sovetion, Ĉahotin eklaboris en nia Berlina komerca reprezentejo. Poste oni sendas lin labori science en Italion. Sed li esploras ne ĉelon, sed alion – pure socian fenomenon – italan faŝismon. Germanion li revenas jam kiel sperta kontraŭfaŝisto.

Mi foliumas libron de Ĉahotin „Tri sagoj kontraŭ svastiko", kiun li verkis germane kaj eldonis en Danlando en la jaro 1934. Sur la kovrilo Hitler, fuĝanta de tri sagoj, simbolo, kiun inventis same Ĉahotin.

. . . Bierejo. Eniras faŝistoj. Sonas ilia slogano „Zig haj!" Kelkaj levas responde la manon – ili salutas naziojn, kaj al multaj ŝajnas, ke faŝistoj amasas. Kaj dumnokte hitleranoj ĉion ŝmiras per sia svastiko.

Ĉahotin esploris la situacion science. Faŝistoj penas timigi la etburĝojn, elvoki ĉe ili reflekson de timo, same kiel akademiano I. Pavlov plifortigis ĉe siaj hundoj reflekson de malsato. Hitleranoj pliŝajnigas sian potencon. Kaj Ĉahotin proponis forstreki ĉiujn svastikojn per tri sagoj, kontraŭ la faŝista saluto levi alte la pugnojn. En mokaj kantoj kripligi kaj priridi la faŝistajn sloganojn. Tiel laborante la soveta profesoro aŭspiciis la propagandon de socialista „Fera fronto" („Die eiserne Front"). En 1932 la komunaj fortoj de la komunistoj kaj social-demokratoj ne ĝislasis nazian potencon. Rejhstagon malfermis K. Cetkin – „ruĝa Klara". Sed la socialdemokratoj emis al perfido. Ĉahotin venis al ilia ĉefo Wels, petegis lin kunlabori kunla komunistoj, sed vane. La socialdemokrataj gvidantoj decidis – Hitler pli bonas por ili ol Ernst Telman. Faŝistoj prenis la gvidadon. Al Ĉahotin venis polico. Savita de soveta ambasadoro, li daŭras batali en Danio, Anglio – same tie li vizitis Einŝtejn-on – kaj poste en Francio.

La 1941-jaron li renkontis apud Parizo en nazia koncentrejo. La azenoj daŭris revenĝi al li. Sed inter germanoj sciencistoj troviĝis veraj amikoj, kiuj pruvis al la faŝistoj, ke Ĉahotin estas nura biologisto, ke pri politiko okupiĝis alia Ĉahotin. Hitleranoj liberigis la profesoron, poste komprenis sian eraron, sed tro malfrue: Ĉahotin jam estis kaŝita de franca rezistanco.

Post la milito en Parizo lin vizitis sendito de G. Wells. La granda verkisto gratulis sian restintan vivan amikon kaj donacis al li sian romanon, en kiu simila al Ĉahotin biologisto batalas kontraŭ la faŝismo.

Nia patrolando bone akceptis sian filon. Ĝis la lasta tago li profesoris en Instituto por evoluo de vivo. Nun li pensiiĝis, sed daŭras okupiĝi pri scienco. Doktoro pri biologio kaj doktoro pri filozofio, li defendas la vivon mem, batalante por la paco. La inventita de li kontraŭmilita simbolo – forstrekita A-bombo, estas konata en la tuta mondo. Por tiu batalo li, scianta dek lingvojn, uzas ankaŭ Esperanton, kiun li ellernis kiel 9-jara knabo. Li ofte diras, ke la lingvo internacia estas bona armilaro kontraŭ milito kaj imperiismo. Pri tio pruvas lia longa kaj fruktodona vivo.

A. Ĥarkovskij, Moskvo, USSR

Novaj interpretoj de Aleksandro Logvin



Anatolij Parpará

Ladomirka

Rivereto Ladomirka
glate – blua,
kviet-glata,
kvazaŭ eta-eta
vejno
sur Ruslanda
la manplato.
Kiam ĝin
mi tuŝas kore,
kiel filo
kun pasio –
pulsen
sentas mi nelaŭtan
de patrino, –
de Rusio.
Kaj ĉe tiu eta rojo
ĵus komprenis mi pri tio,
ke por ĉiam apartenas
mi al tero de Rusio.

Viktor Bokov

Estu mi petola rojo

Estu mi petola rojo,
Trans la kampoj eksonoru,
Mia akvo malvarmeta
Pliverdigos herbon, floron.
Estu mi negranda nubo
kun la rando brila – ore,
Per pluveto kun folioj
Mi babilos intim-kore.
Estu mi pomarbo bela
kun la rozkoloraj pomoj,
Mi donacos per ĉi fruktoj
Ĝojon al la multaj homoj
Estu mi arbara planto,
Heperike tuj ekverdu,
Sed en ĉiu transformado
Mian memon mi ne perdu.

Moskvo 1973

Aleksandro Logvin, Moskvo, fama soveta esperanto-poeto, festis la 23. 12. 1973 sian 70-an naskiĝtagon kaj sian 50-an jubileon kiel esperantisto. La legantoj de „Paco", kiuj ofte povis legi liajn poemojn, postdate sed ne malpli kore gratulas al la jubileulo.

Bonan apetiton

„Bonvolu senvestigi vin de botoj kaj ŝuoj kun ekstre akraj najletoj antaŭ enlitiĝi. Ĉiuj gastoj estas urĝe petataj ellitiĝi antaŭ la sesa matene, ĉar la tolajoj estas bezonataj kiel tablotukoj por la matenmanĝo".
Tiu ordono devenas de hotela regularo el la jaro 1886, por gastoj de la kanada urbo Mc Leod.

Trista kompenso

En sveda radiostacio Dr. Sven Holmgaard parolis pri la domaĝantaj sekvoj de dikkorpeco. Li finis signifoplene: „Sed ĉio kompensiĝas. Des pli da korpa pezo oni devas kunportadi, des malpli da tempo oni devas porti ĝin".

N. Danovskij

Thälmann-brigado

La avo kaj lia nepino Nastja estas tre bonaj amikoj. Ili kune pentras, vizitas la parkon, kelkfoje muzeon. Nastja eldonas sian propran revuon „Terglobo“ en unu sola ekzemplero en kiun ŝi lokas siajn proprajn verkojn kaj la verkojn de la avo, kaj krome ŝi engluas ĉion, kio subite ekplaĉas al ŝi en la ĵurnaloj kaj revuoj „Pioniro“, „Oktobrido“ kaj aliaj, kiujn ŝi ricevas. Ŝi jam transiris en la kvaran klason. Sed la amikeco kun la avo komenciĝis de post nememorebla tempo.

Hodiaŭ ili planis kune rigardi la kinofilmon „Ruslan kaj Ludmila“. Sed jen ŝi havas embarason. Alvenis el Germana Demokratia Respubliko reprezentantoj de Kulturbund. Tiel estas nomata tie la ligo de diversaj kulturinteresitoj: pentristoj, verkistoj, jurnalistoj kaj aliaj. Al ilia klubo estis sendita invito por renkonto kun Kulturbund en la Domo de Amikeco, sed estis dirite, ke ili venu tien kun la gepatroj.

Inter Nastja kaj la avo okazis mallonga interparolo.

– Avĉjo, ni veturu al la Domo de Amikeco?!

– Ni veturu. Sed kial ni tien veturos?

– Jen la invito, ĉu vi vidas? Ni konversacios kun Kulturbund . . .

– Nu, se kun Kulturbund, tiam certe . . . Kaj kiel atendos nin Ruslan kaj Ludmila?

– Sed ni poste iros al ili.

– Nu, kion fari, ni ekiru.

Kaj ili forveturis . . .

En la Domo de Amikeco estis tre interese. En la vestiblo brulis kameno. Ardantaj lignoŝtipoj disradiis agrablan varmon. Sed ĉe pli atenta rigardo evidentiĝis, ke tio estis tre versimila imitaĵo helpe de elektrolampetoj en vitroj havantaj la formon de lignoŝtipoj.

Ili preteriris diversajn lignoskulptitajn murornamaĵojn, marmorajn figurojn kaj trapasis malgrandan korteton.

En la halo estis multaj liberaj lokoj. La avo kaj Nastja iris en la unuan vicon, por pli bone vidi kaj aŭdi.

Ĉe la prezidantara tablo viroj kaj virinoj estis okupantaj siajn lokojn. Per la unua parolo kaj post nelonga enkonduko la prezidanto – juna barbulo, sin turnis al la ĉeestantoj, li anoncis: – Je la nomo de Kulturbund parolos Hugo Werner.

Kompakta nealta viro parolis saksakcente. Li transdonis varmajn vortojn de saluto je la nomo de siaj kamaradoj kaj rakontis pri la laboro de Kulturbund. La tradukon faris junulo kun grandaj nigraj okulvitroj.

Sed de kiam la prezidanto la unuan fojon eldiris la vortojn „Hugo Werner“, kaj dum la tuta parolado de tiu nejuna plumpeta viro, la avo ne povis liberiĝi de la penso, ke li jam ie iam intervidiĝis kun tiu homo, kaj ie iam aŭdis la nomon „Hugo Werner“ . . . „Hugo Werner“ . . . Sed kie kaj kiam li ne povis memori. Tio estis plene neebla.

Nehaste Werner cedis sian lokon al ĉarmaspekta blondulino en tranĉe rugaj jako kaj pantalono . . .

Nastja preskaŭ laŭtvoĉe ion diris al la avo. Sed la avo nenion aŭdis. Li rigardis la ruĝan vizaĝon de Werner, kiu sidiĝis inter la prezidantaro, kun rideto konversaciante per mallongaj frazoj kun najbaro.

Kaj en la kapo de la avo ĉiam kirliĝis „Hugo Werner“. Absolute klare, ke ili jam renkontiĝis, la avo penis pli atente distingi la trajtojn en la vizaĝo de Werner. Sed post ties dorso estis hela fenestro. Kaj la trajtoj svagis, ĉar la vizaĝo formis malhelan silueton sur la hela fono.

La kunveno finiĝis. Ĉiuj disiris. Fine la avo rimarkis, ke la halo preskaŭ senhomiĝis. Nastja tiras la manikon de la avo kaj urĝas lin.

– Nun al la kinejo, avĉjo, ni rigardos „Ruslan kaj Ludmila“. Kaj la avo reeĥis de ie malproksime:

– Jes, jes, ni iru, Nastja!

Sed li ĉiam klopodis kapti iun fadonon. Kaj ŝajnis, ke li jen-jen jam eltiras la fadeneton. Kaj tuj la tuta afero klariĝos. Sed ne. Surfluis tute aliaj vizaĝoj, la fadeno ŝiriĝis. Ĉio enabismiĝis. Kaj denove en la memoro elnaĝis la halo, prezidantaro, Kulturbund, kiu admiris la konstruadon de la komunismo kaj transdonis ardan saluton de la germanaj fratoj.

Preskaŭ forestante, la avo aĉetis biletojn. Ili eniris sian naŭan vicon, sidiĝis. Nastja ion pepis. Sed la avo estis ie fore-malproksime. Li flugis sur la memfluga tapiŝo en la landon, kie ili estis kune kun la plumpeta nejuna viro nomita Hugo Werner. Kaj li preskaŭ ne vidis, kio okazis sur la ekrano.

Nur kiam li ekaŭdis timigitan ekkrion de Nastja, li vidis, kiel ventoblovo forportis Ludmilon tra la fenestro.

Kaj dum Ruslan trapasante arbarajn densejojn inter kolosaj trunkoj kaj same gigantaj radikoj, kiuj ĉirkaŭvolvis ilin kvazaŭ nigraj serpentoj, vagis en virgaj arbaroj, renkontis diversan sovaĝan vivularon hidan kaj malpuran kaj subite eliris en la kampon, kie iu disĵetis malvivajn ostojn, la avo subite ekvidis, kiel antaŭ li aperas bildoj kvazaŭ el kroniko ege longe-longe antaŭe vidita, travivita kaj forgesita el la profundoj de la memoro.

Kampo. Jes, ja, tio estis kampo, aviada kampo. Kampara aerdromo. La ofensivo energie disvolviĝis. La fronto, kie agis la aviadarmeo, en kiu la avo militservis, estis proksimiĝanta al Königsberg. La militiro, trapasis Litovion en sia marŝo okcidenten.

Kaj la aerdromo el ŝtalaj folioj, kvazaŭ ŝtala pargeto, ricevita laŭ „landlease“ el Usono kaj muntita ĉe Mariampole (malgranda loĝloko en oriento de Litovio), iĝis neneseca kaj sen uzo. Oni pavimis ĝin en la daŭro de kelkaj monatoj. Sed post subita breĉo en la fronto la trupoj ofensive impetis okcidenten kun tia vervo, ke post kelkaj tagoj ili atingis la okcidentan limon de Litovio. Kaj la aerodromo en Mariampole subite troviĝis en profunda malfronto. Antaŭ Königsberg la fronto stabiliĝis. Kaj por plua marŝo necesis aerodromo por aviada subteno de l'ofensivo. Sed aerodromoj proksime de Königsberg mankis. La Hitler-armeo tute ne planis tie ajnajn milit-operaciojn sur sia teritorio. Tial ĝi neniajn multekostajn aviadajn konstruaĵojn entreprenis tie.

Tial la fronta komandantaro akceptas decidon translokigi la ŝtalan aerodromon el Mariampole al marĉa spaceto ĉe malgranda urbeto Romau, sude de Königsberg.

Por ĉiuj operacioj de malmunto en Mariampole, transporto kaj etendo en Romau oni fiksas templimon – dek tagojn.

Laŭ kalkuloj de inĝenieroj por transporti la tutan amason da ŝtalo necesas kvar plene kompletigitaj aŭtomobilaj batalionoj. La tuta laboro de transporto estas planata por ok tagoj. Por la muntado de la ŝtala parketo en Romau estas invitata la tendaro de polaj repatriigotoj, ĉirkaŭ kvardek mil homoj. Por malmunto en Mariampole estas destinata la tendaro de germanaj militkaptitoj, kiu nombras ĉirkaŭ dek mil homojn. Respondeco por la tuta operacio estas surmetata al tri oficiroj. Inĝeniero-majoro Savostianov el la aerodroma fako gvidas la malmunton, inĝeniero-majoro Sergievckij de la sama fako gvidas la munton, inĝeniero-majoro Sadovskij el

la aŭtomobila fako gvidas la transportadon.
La avo definitive perdis la ligon kun la ekrano. Li rememoris pri si, pri siaj kamaradoj el la aŭtomobila fako. Kaj observinte Nastja'n, kies okuloj algluiĝis al la ekrano, li tute indiferente glitigis rigardon laŭ ĝi kaj tuj mergiĝis en sian propran kinofilmon . . . Ferminte la okulojn, li travivis sian filmon, en kiu li rolis kial inĝenier-majoro Sadovskij . . . De Savostjanov la sorto postulis la plenumon de la plej sendanka tasko. Krei laboran taĉmenton el antaŭnelongaj reprezentantoj de la fanfaronema hitlera „Wehrmacht" estis nesimpla afero. Ricevinte el la frontrezervo kvar aŭtomobilajn batalionojn ekipitajn per novaj, ĵus liveritaj „studebekeroj", Sadovskij sendis ilin al Mariampole per propra komando, kaj mem flugis tien per sia aeroplano.
Estis fino de vintro. Ankoraŭ kuŝis neĝo. Savostjanov jam sukcesis majstri la situacion pri sia heterogena armeo. Kaj nur dio scias, per kiaj lingvistikaj sagacoj li ne nur estigis kontakton kun ili, sed eĉ okazigis ion similan al „produkta kunsido" kun grupestroj – „Gruppenführer", kiel ili estis nomitaj. Sur vasta spaco de la kampo la soldatoj laboris en malpuraj mus-koloraj kapotoj kaj uniformoj . . .
La unua aŭtomobila bataliono estis ekspres ŝarĝita per stokoj da pargettabuloj, kaj ĝi foriris al Romau. Sadovskij postflugis per sia aeroplano. Flugante super la vojoj, li observis, kiel kvazaŭ ĉeneto da alumetskatoloj moviĝis la aŭtomobila bataliono. Kaj tuj kiam okazis iu obstaklo dumvoje, li signalis al la piloto, kaj ili surteriĝis senpere apud la vojo. Kaj severa dokumento de la komando de fronto ebligis momentan forigon de la obstakloj starigataj de vojtaĉmentoj.
Li alflugis en Romau, iomete antaŭ la aŭtomobila bataliono surteriĝis sur la terenon . . .
Kiam Sadovskij alflugis denove en Mariampole, tie ankaŭ jam bolis la laboro.
Li rimarkis, ke Savostjanov proksimiĝas al li. Apud li iris nealtkreska serĝento de „Wehrmacht" kaj ion pasie argumentis. Savostjanov prezentis la serĝenton:
– Hugo Werner, estro de la Thälmann-brigado.
Sadovskij manpremis la serĝenton. Kaj tiu tuj sin turnis denove ne speciale atendante la alflugintan altrangan staboficiron, al Savostjanov daŭrigante vehemente sian argumentadon. Ili konversaciis en abrakadabra germana-rusa slango, sed ĉion decidis energia gestado. Pri kio temis?
La Thälmann-brigado konsistis nur el komunistoj kaj konsciaj proletoj senpartiaj. La provo de Savostjanov pligrandigi la brigadon renkontis decidan rifuzon. Werner diris, ke akcepti en sian brigadon ĉiun faŝistan aĉularon ili ne povas. La brigado certigis, ke ili plenumos la tutan laboron plene en la disponita templimo, eĉ se tiu faŝista bando tute nenion faros. Kaj malpurigi sian proletan dignon per akcepto de tiuj sentaŭguloj en siajn vicojn la brigado ne konsentas.
Sadovskij observis, kiel la Thälmann-brigado laboris kaj marŝis post la laboro. Sampaŝe, kun instrumentoj surŝultre, kun la batalsonoj de Ernst-Busch kanto ili paradis tiel, ke la ceteraj militkaptitoj nur haltis kaj cedis vojon antaŭ tiu taĉmento de proleta gvardio. Nevole li rememoris la dudekajn jarojn, kiam li renkontiĝis dum laborista esperantista kongreso kun la marŝo de la ruĝfrontbatalantoj.
La Thälmann-brigado efektive malmuntis preskaŭ memstare la tutan ŝtalan pargeton dum ok tagoj. La aŭtomobiloj de ĉiuj kvar aŭtomobilaj batalionoj estis ŝarĝitaj kaj foriris fulmrapide kaj forportis stokojn da tabuloj kaj kestojn da klemoj. Kaj Sadovskij la tutan tempon moviĝis aeroplane inter la du punktoj, observante la survojan movadon.
Kaj kiam Sadovskij la lastan fojon alflugis en Romau, Sergievskij jam montris al li la alteriĝon de la unua peza aeroplano. La ŝtala pargeto fleksiĝis sub la pezo de la aeroplano, kaj eĉ tra la truoj en la tabuloj sprucis fontanoj de flava akvo. Sed la pargeto risortis, kaj la aeroplano iris en sian lokon. La alteriĝo de la aviadilo memorigis la saltadon de gimnasto sur elasta reto.
Do jen kiu evidente estis Hugo Werner. En la halo eklumis la lampoj. Ĉiuj stariĝis. Sed Nastja kaj la avo sidis senmove. Nastja retravivis la sorton de Ludmila kaj la malicajn artifikojn de Naina kaj Ĉernomor. Ŝi ankoraŭ moke ridetis pri la misoj de Ratnir kaj Ragdaj. Kaj la avo respondis al ĉiuj manifestiĝoj de ŝiaj emocioj unusilabe kaj ofte mistrafe.
Antaŭ liaj okuloj staris Königsberg, kiel li vidis ĝin post la sturmo.
Ili ekstaris kaj postsekvis la foririntojn el la halo. Kaj en tiu momento al la avo subite ŝajnis, ke Nastja ankaŭ vidis tion, kion vidis li, ĉar ŝi seriozmiene diris:
– Ĉu vere, avĉjo, kiam la homoj helpe servas unu al la alia en malfacilaj cirkonstancoj, ili tion memoras la tutan vivon? Li rigardis ŝin kun miro kaj ĉifoje plene laŭteme respondis:
– Jes, Nastja. Tio estas por la tuta vivo. Eĉ, se ili poste tute ne renkontas unu la alian, aŭ subite vidas unu la alian de malproksime.

(Forte Koncizigita)



Foto: Zentralbild

ELVIRA LIPPE

La balta maro

Foras bordo, foras dunoj
Ondas regno de Neptuno
Lara nub' ĉirkaŭas nin.
Laroj saĝas, ne eraras,
Laroj fiŝkaptaĵojn flaras,
Riĉa estas mara sin'.

Vitrogloboj sin balancas,
Ĉielarke lum' nuancas,
Ŝnur' sin streĉas, knaras rad'.
„Mara riĉo! Mara bono!
Plenas retoj el kaprono!"
Ĝojas viroj de brigad'.

Post sukceso de laboro
Ekfunkcias jam motoro,
Ni veturas al haven'.
Viroj kantas, laroj krias,
Vento fajfas, sun' radias, –
Gaja estas la reven'.

Sortoj de virinoj en la vjetnama literaturo

Hella Sauerbrey



Mirinda la vigla eldonagado dum tiom da suferplenaj militjaroj! Eĉ en la plej danĝeraj cirkonstancoj oni ne ĉesis eldoni. Altrudiĝas la demandoj, kiuj verkis kaj kie oni presis la literaturaĵojn?

Niaj vjetnamaj amikoj Esperantistoj, sindoneme batalante kaj agante, mem respondas ilin. Oni verkis kaj presis inter bataloj en ĝangalo, tranĉeoj, inter detruitaj muroj, ĉe vojbordoj, tiel sciigante al la mondo, ke Vjetnamio ankoraŭ vivas malgraŭ ĉiuj malamikaj atakoj, malgraŭ malsato, detruoj kaj senfinaj oferoj. Oni sciigis al la mondo, ke la vjetnama popolo la vivon amas, la pacon sopiras kaj pro tio obstine batalante strecis ĉiujn fortojn.

Pli aŭ malpli spertaj verkistoj kreis per siaj literaturaĵoj dum la lastaj 30 jaroj modestajn, emociigajn, neforgeseblajn monumentojn omaĝe al sennombraj heroaĵoj.

Foliumante en diversaj vjetnamaj libroj mi aparte serĉis priskribojn de virinaj sortoj. Jes, oni renkontas ilin, nek aparte signitaj, nek fanfarone substrekitaj. Tute memkompreneble ili estas troveblaj el inter aliaj rakontoj.

Sed en *„La Drinkejo de la Mutulo"* – kolekto da noveloj aperinta en la 1969a jaro – 6 el la 7 noveloj pritraktas virinajn agadojn kaj sortojn. Nguyen Sang, membro de la Liberiga Literaturo- kaj Arta-Asocio de Sud-Vjetnamio priskribas per profunda kaj vigla stilo la plej diskretajn sentimentojn, la aspirojn, la revojn, la viv- kaj pensmanieron de siaj sampatrujaninoj, plenaj je lokaj, same kiel naciaj koloroj. Estas epizodoj el la vivo de vjetnamaj virinoj kaj knabinoj, ĉiutagaj eventoj, ĉiutagaj pruvoj de fidindeco, heroaĵo, kiujn, tie ja postulas la vivo. En *„La ebura kombilo"* temas pri knabino, dejoranta kiel interligantino kaj kondukistino de motorkanoto. Nur unufoje la patro estis vidinta ŝin, ĉar li plejparte devis batali kaj kaŝi sin en ĝangalo. Do, ŝi kreskis kvazaŭ kiel senpatra orfo. Kiam ŝi ricevis la malfeliĉan novaĵon pri la morto de la patro, ŝi faris sin interligantino. Dejorante okazis, ke ŝi renkontis hazarde tiun soldaton, kiu estis la iama amiko kamarado de ŝia mortinta patro. Li transdonis al ŝi eburan kombilon, kiun ŝia patro dum libertempaj horoj mem estis farinta, ne sciante, ke post la baldaŭa morto ĝi estus la ununura heredaĵo kaj memoraĵo por lia amata, preskaŭ ne konata filino. Sur tiu kombilo li propramane diligente estis gravurinta – literon post litero – jenan frazon: „Ame dediĉita al mia karega Thu". Jes, tre ofte la virinoj agis kiel interligantinoj kaj vojgvidistinoj. Senlace kaj lerte ili respondecis pri la vivoj de multaj soldatoj en la etapo de la malamika fronto, ne domaĝante la propran

vivon, same kiel „Njung, la batalintino de Sajgono" kaj „Sareta", kiu savis la vivojn de la gerilanoj el la rifuĝejo, „Nokta Akvo", kondukante la malamikojn en seneliran kavernan faŭkon.
„La virino el Thap Muoi" estas patrino, kiu penege prilaboras la vivrimedojn de siaj ses infanoj en la t.n. liberigita vilaĝo proksime de la malamika posteno My An. Minacate de helikopteroj, ĉasaviadiloj kaj bomboj, ŝi iom post iom, vole-nevole spertas jenan akran, sed necesan ekkonon: „Nuntempe, batalante kontraŭ la Usonanoj, ĉiu patrino devas ankaŭ disponi fusilon, se ŝi volas vivteni siajn infanojn".
„La vilaĝa milicestrino" estas la juna fraŭlino Zung, unue sekreta aktivulino, kiu poste mem gvidas popolleviĝon kaj atakon al la malamika posteno Daŭ Vam.
„Agataj orelpendaĵoj" estas la lasta titolo en tiu ĉi kolekto. Temas pri 40jara patrino kaj ties 20jara filino, kiuj ambaŭ, ĉiu laŭ siaj fortoj kontribuas al la komuna batalo.
La laste en 1973a jaro eldonita novelaro estas *„La bambufluto"* kreita de famkonataj verkistoj de libera Sud-Vjetnamio. Estante samfoje verkistoj kaj batalantoj ili kapablas komprenigi al ni tiujn, kiuj tie devas ĉiutage fronti kontraŭ kruelegan malamikon. El la 9 entenantaj noveloj, 4 pritraktas precipe virinajn sortojn sub jenaj titoloj:
La sovaĝa floro de Duong Thi Minh Huong,
Venta sezono de Anh Duc,
Dum foresto de patrino de Nguyen Thi,
La bubalo de Tran Phuong Tra,
La patrino de Vien Trinh de To Nhuan Vy.
4 diversaj titoloj – 4 diversaj sortoj!
Ĉiu per si mem admirinda, kompatinda, laŭdinda. Ni konatiĝas kun fraŭlino Fuoc, kiu lertmove gvidas la batalantojn tra de la bomboj minacata tereno, kun fraŭlino Ut Zien, kiu spite al la tute detruita vilaĝo en subtera lernejo plue instruas la infanojn, kun heroino de la Liberiga Armeo, Nguyen Thi Ut, patrino de 4 infanoj, per kies helpo la posteno de Ba Mi estis elrazita.
Kaj kun la 60-aĝa virino, kiu savis la vivon de la vundita komandanto Khank, kovrante lin per la propra korpo.
Ankaŭ en la plej ampleksa novelaro *„La horloĝisto de Djen Bjen Fu"*, – koncernanta la periodon de 1945–1964 – ne mankas rakontoj pri virinoj. Ili estas verkoj de pluraj aŭtoroj – unuaj apartenis al la generacio de verkistoj de antaŭ la Aŭgusta Revolucio de 1945, aliaj komencis uzi la plumon ekde la venkoplena Revolucio kaj la ceteraj estas junaj, parte senspertaj verkistoj, naskitaj aŭ kreskintaj dum la Rezistado kaj la konstruado de la socialismo.
El la 19 noveloj jam laŭ titoloj 5 estas ekkoneblaj kiel privirinaj, nome:
Patrina koro de Vu Le Mai,
Du fratinoj de Vu Thi Thuong,
La adoptitino de Nguyen Kai,



La vilaĝa instruistino de Xuan Sach,
La geedzoj AFu de To Hoai.
Tamen ankaŭ en pluaj 7 noveloj virinoj influas nerekte la okazintaĵojn.
Kia delikata, sentema, preskaŭ lirika rakonto estas *„Printempa pluvo"* de Nguyen Thi Nhu Trang!
Multaj frazoj povus forgesigi la militon.
Ĉu jenaj profundaj pensoj de la juna Thu ne estas laŭdokanto?: „Oni parolas kaj reparolas pri la heroaĵoj de la soldatoj; sed estas aliaj, kiujn oni prisilentas, tio estas la rezignacio, la pacienco, la atendemo, la senbruaj sinoferoj de la patrino." Alia vivovera kaj kortuŝa verko estas la romano *„Hon Dat"* de Anh Duk, en kiu estas rakontata la 10taga heroa batalo de 19 Vjetnamoj kontraŭ pli ol mil malamikaj soldatoj ekipitaj per plej bonaj armiloj. Inter la 19 defendantoj troviĝis du knaboj kaj tri virinoj.
Do, ankaŭ en la historio de „Hon Dat", kiu okazis post la komuna popolleviĝo ĉirkaŭ la jaro 1961, oni ne preteratentis la virinan kamaradon sen kies helpo kaj oferoj la venko ne estintus imagebla.
Parolante pri virinaj sortoj en la vjetnama literaturo, oni nepre devas mencii la romanon *„Franjo Tu Hau"* de Bui Duc Ai, en kies centro staras juna virino, vivante, kreskante kaj evoluante en la periodo de 1945–1954 dum la provizora okupacio fare de francaj koloniistoj. Kiel sengepatra orfo ŝi jam frue konatiĝis kun malsato kaj penigaj, malfeliĉaj cirkonstancoj. Laborinte en hospitalo ŝi iom post iom akiris konojn sur medicina kampo. Post la edziĝo kun maristo ŝi vivis en apudmara regiono de Sud-Vjetnamio kaj agis tie kiel akuŝistino. Kiam ŝia filineto havis 3 monatojn, la francaj kaj marionetaj soldatoj faris disraban operacion, forbrulis boatojn de la fiŝkaptistoj kaj eĉ seksatencis ŝin. Tamen ŝi ĉiam sin montris helpema al ĉiuj akuŝontaj virinoj, ĉu sampatrujaninoj aŭ ĉu virinoj de la marionetaj soldatoj. Antaŭ ol ŝi naskis fileton, la edzo estis trafita de malamika kuglo. Sed spite al ĉiuj sortobatoj ŝi ne perdis kuraĝon. Instigite de la sekretariino de la Distrikta-Virina Unuiĝo ŝi iom post iom partoprenis la rezistadon kaj faris propagandon. Ne eblas, detale ripeti la tutan penigan vivon de tiu ĉi admirinda virino, kiu fine fariĝis ŝatata, estimata aktivulino.
Facile dirite kaj skribite, sed tutcerte ne facile travivite! Franjo Tu Haŭ mem ofte dum malfeliĉaj horoj enprofundiĝis, kaj meditis pri sorto, milito, vivo:
. . . „De longe mi trovis, ke nia virina vivo estas malfeliĉa, sed, tion mi vidis nur malklare . . . neniam mi pensis, ke ni mem, virinoj povus nin liberigi" . . .
. . . „Ĉu, dum la Rezistado ekzistis homoj, kiel mi? Nepre, miaj samsortulinoj ne estis malmultaj. Do, ne estis mi sola, kiu suferis. Sur ĉiuj vojoj, la milito elfosis kalvariajn kavaĵojn. Ĉu iam tiuj kavaĵoj estos plenigitaj kaj la vojoj estos glataj, kiel antaŭe?" . . . Resume oni devas konstati, ke virinaj sortoj havas indan lokon en la literaturo, sed ne specialan lokon, ne podion, sed laŭ kutima modesta vjetnama maniero lokon apude inter aliaj.
La vjetnama literaturo esperantista, konigante vjetnaman viv- kaj pensmanieron, inde kontribuas al reciproka interkompreniĝo en la mondo.



Prof. E. A. Bokarev

Fonemo kaj sono en esperanto

La 23. 2. 1973 profesoro d-ro E. Bokarev estus fariĝinta 70-jara. Honormemore al la fama lingvisto kaj esperantologo ni represas studon aperintan en 1964 en „Nuntempa Bulgario"

Moderna lingvoscienco uzas terminon „fonemo", kiu korespondas al tre grava nocio inter aliaj lingvosciencaj nocioj. Do kio ĝi, la fonemo, estas? La fonemo estas sono, kiu kapablas diferencigi sencon de vortoj kaj vortformoj. Ekzemple, en Esperanto „b" kaj „v" estas apartaj fonemoj, ĉar ili diferencigas sencon de vortoj: *balo – valo, rabi – ravi;* „o" kaj „u" same estas apartaj fonemoj, ĉar ili diferencigas sencon de vortoj: *sono – suno, roso – ruso.* Sed ne en ĉiuj lingvoj ekzistas tiuj fonemoj. Ekzistas lingvoj (hispana, novgreka) en kiuj „b" kaj „v" estas variantoj de la sama fonemo, do en ili ne ŝanĝiĝas senco de vorto, se anstataŭ „b" oni prononcas „v" kaj inverse. Same pri „o" kaj „u". Ekzistas lingvoj (ekz. lezgina en Kaŭkazo), kie ili estas nur variantoj de la sama fonemo, do senco de vortoj ne ŝanĝiĝas, se anstataŭ „o" oni prononcas „u" kaj inverse.

Oni povas doni tre multajn ekzemplojn, kiuj montras, ke ankaŭ en Esperanto mankas iuj fonemoj, kiuj ekzistas en aliaj lingvoj. En kelkaj lingvoj (ekz. en franca, itala) ekzistas kiel apartaj fonemoj vasta kaj malvasta „e" vasta kaj malvasta „o". En tiuj lingvoj ili diferencigas sencon de vortoj, sed en Esperanto ne: ĉi tie ili povas aperi en ies prononcado nur kiel variantoj de neŭtraj (nek vastaj, nek malvastaj) fonemoj „e" kaj „o". Oni povas nomi ankaŭ lingvojn, en kiuj ekzistas kiel apartaj fonemoj aspirataj kaj neaspirataj plosivoj: p – p', t – t', k – k'. Sed en Esperanto ili povas aperi en individua prononcado nur kiel variantoj de neŭtraj (nek aspirataj, nek neaspirataj) p, t, k. Mi ĉi tie ne citos multajn ekzemplojn de tre raraj kaj komplikaj fonemoj, abundantaj en miloj da lingvoj de la terglobo.

Lingvoscienca fako, kiu okupiĝas pri fonemoj, estas nomata fonologio, sed pli ĝuste fonematiko aŭ fonemiko. La kvanto de fonemoj en iu certa lingvo, estas pli-malpli preciza, kalkulebla; la kvanto de ĉiuj reprezentantoj de fonemo (variaĵoj, variantoj, alofonoj) praktike ne estas kalkulebla, ĉar ili aperas pro plej diversaj kaŭzoj (asimilado, disimilado, dialekta kaj individua prononcmaniero, stilo de prononcado ktp.), kaj ilia kvanto dependas ankaŭ de precizeco de parolanalizo.

En Esperanto ĉiu fonemo estas skribe reprezentata de speciala litero. Pro tio ni nomas esperantan ortografion fonetika aŭ pli ĝuste fonematika aŭ fonemika. Kompreneble, variantoj de fonemoj en ortografio ne estas speciale signataj. Ili povas esti signataj nur en speciala fonetika transskribo, kiun uzas fonemikistoj por signi ĉiujn nuancojn de prononco. Ĉar fonemo diferencigas sencon de vortoj kaj vortformoj, do nia unua kaj ĉefa postulo de korekta prononcado en Esperanto estu strikta diferencigo de ĉiuj ĝiaj fonemoj. Niaj instruantoj de Esperanto devas esti tiurilate tre postulemaj kaj rigoraj, kaj en ĉiuj nacilingvaj lernolibroj ĉiam devas esti avertoj pri fonemikaj prononceraroj, specifikaj por tiu aŭ alia nacio. Ni penu, ke ĉiu fonemo havu apartan prononcon kaj ne koincidu kun iu alia. Ĉiu lingvo havas sian propran sistemon de fonemoj, do anoj de ĉiu lingvo, studante Esperanton, pro konflikto inter du fonemikaj sistemoj estas minacataj de iu serio de eventualaj prononceraroj.

Ekzemple, rusoj en senakcenta pozicio povas miksi „o" kaj „a". Anstataŭ oranĝo ili povas diri aranĝo, anstataŭ *okcidento – akcidento,* anstataŭ *komparo – kamparo,* anstataŭ *organo – argano,* anstataŭ *ofero – afero,* anstataŭ *poŝtisto – paŝtisto,* anstataŭ *nocio – nacio.* Precipe grava estas la eraro, kiam tiuj fonemoj miksiĝas en gramatikaj finaĵoj: anstataŭ *bono – bona,* anstataŭ *koro – kora,* aŭ anstataŭ mi *venos* – mi *venas,* anstataŭ mi *diros* – mi *diras.* En la sama senakcenta pozicio ruso povas miksi „e" kaj „i": anstataŭ *letero* li povas diri *litero* ktp. La rusa lingvo ne diferencigas ankaŭ fonemojn „G" kaj „h": la nordanoj scias nur „g", la sudanoj – nur „h". Tial rusoj iafoje povas erari, miksante tiujn fonemojn: *galo – halo, gardi – hardi, guto – huto, gurdo – hurdo, gobio – hobio, gasti – hasti, gisi – hisi.*

Ni rigardu kelkajn aliajn tipajn prononcerarojn, kiuj aperas pro konflikto inter du malsamaj fonemikaj sistemoj. Eble la plej okulfrapa ekzemplo estas sorto de „r" kaj „l" en la buŝo de japanoj kaj ĉinoj. En japana lingvo ne ekzistas „l", en la ĉina – „r". Tial japanoj kaj ĉinoj povas miksi en sia prononcado tiujn fonemojn: *rado – lado, rano – lano, revi – levi, rimo – limo, ripo – lipo, roko – loko, ruli – luli, ribelo – libelo, modera – modela, birdo – bildo.*

Fine ĝi aperis!
Majstroverko mondliteratura!

„Nuda inter lupoj"

de Bruno Apitz, tradukis d-ro Karl Schulze,
lingve kontrolis Jerzy Grum.

Sur 480 paĝoj en verva lingvaĵo la romano temas pri la sorto de arestistoj, kiu estas ligita al eta infano en la fifama faŝisma koncentrejo „Buĥenwald". Atentokapta verko kun alta streĉo kaj animskua enhavo. Mendu ĝin tiuj ĉe la eldonejo Eidition Leipzig, 701 Leipzig, Postfach 340, Sovetunianoj ĉe Knigeksport, Moskau A 183, 4-yi Nowomichailkowskij proezd, dom nr. 11. Esperantistoj en aliaj socialismaj landoj ĉe la internaciaj librovendejoj. Esperantistoj el nesocialismaj landoj rekte sin turnu al la eldonejo.

Intercetere oni devas noti, ke ankaŭ eŭropanoj ne ĉiam bone prononcas tiun „r". Ekzemple, angloj en iuj fonetikaj pozicioj prononcas ĝin tre malforte, preskaŭ nule, neaŭdeble por reprezentantoj de iuj aliaj lingvoj. Tio povas kaŭzi miskomprenon: *verki – veki, surda – suda, karto – kato, tigro – tigo, korto – koto, frako – fako, vorto – voto, prava – pava, agro – ago, prezo – pezo, grado – gado, ventro – vento,* Iafoje en prononcado de germanoj, danoj, estonoj renkontiĝas mikso de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj: b – p, d – t, g – k, v – f, s – z, ĝ – ĉ, ŝ – ĵ. Tio precipe aperas, ĉar en iuj lingvoj inter elementoj de tiuj fonemparoj opozicio esprimiĝas precipe ne en voĉeco (sonoreco), sed en intenseco (forteco) de artikado de parolorganoj, kio iafoje restas neperceptebla de alilingvuloj. Ni donu kelkajn ekzemplojn de tiu mikso inter voĉaj (sonoraj) kaj senvoĉaj konsonantoj: a) *brava – prava, bubo – pupo, karbo – karpo, baki – paki, baro – paro;* b) *domo – tomo, mardo – marto, sendi – senti, dento – tendo, tento, drinki – trinki;* c) *sago – sako, logi – loki, frago – frako, vergo – verko, ŝargo – ŝarko;* ĉ) *vino – fino, valo – falo, vojo – fojo, grava – grafa, vermo – fermo;* d) *sumo – zumo, pesi – pezi, resoni – rezoni, kaso – kazo, preso – prezo;* e) *kaĝo – kaĉo, ĝeno – ĉeno, plaĝo – plaĉo, aĝa – aĉa, vojaĝo – vojaĉo;* f) *ŝako – ĵako, ŝipo – ĵipo.*
Renkontiĝas ankaŭ mikso de afrikatoj kaj simplaj plosivoj: c – s (*colo – solo, cento – sento, peco – peso, celo – selo, kareco – kareso*), ĉ – ŝ (*ĉamo – ŝamo, ĉelo – ŝelo, ĉia – ŝia*), ĝ – ĵ (*aĝo – aĵo, ĝibo – ĵibo.*)
Ni tuŝu plue mikson de dentaj kaj palataj frikativoj, kiu aperas iafoje en prononcado de skandinavoj, mikso de c – ĉ, s – ŝ, ĝ – z: a) *celo – ĉelo, peco – peĉo, placo – plaĉo, caro – ĉaro, maco – maĉo;* b) *muso – muŝo, pasi – paŝi, vesto – veŝto, spino – ŝpino, kaso – kaŝo;* c) *ruĝa – ruza, rifuĝi – rifuzi, reĝino – rezino.*
Kiel lastan pekon kontraŭ esperantaj fonemoj mi tuŝos nuligon de „h" en iafoja parolado de francoj, italoj kaj kelkaj aliaj nacioj, kio ankaŭ povas produkti miskomprenon: *horo – oro, haro – aro, homaro – omaro, hordo – ordo, hajlo – ajlo, halo – alo, hardi – ardi, havo – avo, hoko – oko.*
Principe multe malpli grava estas normigo de prononco de alofonoj, t.e. de diversaj variantoj de fonemoj. Estas indiferente, ekzemple, ĉu oni prononcas palatizitan (malmolan) „ŝ", „ĉ" en la vortoj *ŝipo, ĉelo;* voĉan aŭ senvoĉan „h", „j" en la vortoj *homo, fojno.* Ordinare ni eĉ ne perceptas la fonetikan diversecon de tiuj alofonoj, de diversaj variantoj de la samaj fonemoj. Pro tio tiel nomata problemo pri vasteco kaj longeco de esperantaj vokaloj estas tute malprava kaj sensignifa. Esperanto ne havas diferencon inter vokalaj fonemoj laŭ ilia vasteco kaj longeco, kaj tiun diferencon inter koncernaj alofonoj povas percepti nur ano de tiu lingvo, kie ekzistas tia diferenco inter la fonemoj.
Iafoje tamen estas grava la demando pri alofonoj. Ekzemple, rusoj ofte moligas (palatizas) dentalan „t" en pozicio antaŭ vokaloj „e" kaj „i", kaj en tiu pozicio ĝi povas esti perceptata kiel varianto de „c", sed ne de plosivo „t": *timo – cimo, tindro – cindro, titro – citro, tiklo – ciklo, tiro – ciro, tia – cia.* Do uzado de palatizita alofono de „t" ne estas rekomendinda. Pro analogio eble tiu rekomendo povas rilati ankaŭ al aliaj dentaj plosivoj „d" kaj „n", kvankam la supre citita kaŭzo tute ne rilatas al tiuj fonemoj.
Lastloke ni okupiĝu iom pri asimilado de sonoj en parolĉeno. Distance proksimaj sonoj povas influi unu la alian iurilate. Se posta sono influas la antaŭan, asimilado estas nomata regresiva: *ekzisti = egzisti;* se antaŭa sono influas la postan, asimilado estas nomata progresiva: *diversa = diverza.* Ĉar Esperanto estas fonemika lingvo kaj ĉiu aparta fonemo en ĝi ne devas koincidi kun iu ajn alia, la proceso de asimilado ne devas esti rekomendata. Sed unu el la formoj de asimilado nome la regresiva, estas disvastigita en tre multaj lingvoj kaj pro tio estas tolerebla kaj permesebla: *absurda = apsurda, ekzisti = egzisti, dissiri = diŝŝiri.* Male pri progresiva asimilado: ĝi ne nur ne estas rekomendinda, sed ne devas esti eĉ permesebla: *univerzitato, inzekto, diverza ktp.*
Ne estas rekomendataj, sed eble nur tolerataj ankaŭ kelkaj aliaj eventualaj fonetikaj procedoj en parolĉeno, kiuj povas aperi en esperanta prononco pro influo de naciaj lingvoj: a) transformiĝo de sonkombinoj „ng" en uvulan „n" (*sango, atingi*): b) palatizo de konsonantoj antaŭ „j" (*sinjoro, panjo*); c) apero de „j" inter vokaloj (*ĉielo = ĉijelo, piedo = pijedo, mia = mija*).
Do ni povas konkludi, ke kiam ni parolas pri unueca prononco en Esperanto, oni parolas precipe pri strikta diferencigo de fonemoj, sed plej ofte oni ne povas insisti, ke iu speciala alofono estu sola reprezentanto de la koncerna fonemo. *Do ni rigore obeu la principon de fonemikeco, kiu estas esence grava de l'vidpunkto de interkompreno, sed estu toleremaj al tio, kio estas sensignifa de tiu vidpunkto.*

Komuna lingvo por orienta Afriko

Eminentaj edukistoj el Tanzanio, Kenjo kaj Ugando kunlaboros kun registaraj kaj aliaj instancoj por pliigi la jam kreskantan uzon de la lingvo svahilo kiel komuna lingvo tra la tuta Orienta Afriko. Bazajn studojn, evoluigon de uniformaj ortografio, gramatiko, prononco kaj vortprovizo prizorgos la Interuniversitata Konsilio de Orienta Afriko (IUC), kiu provizos ankaŭ la eblecojn instrui svahilon je la nivelo de la pli alta eduko. Laŭ la Internacia Instituto por Studoj pri Eduko, en Bruselo, la uzo de svahilo rapide kreskis dum la pasintaj dek jaroj.

Instruado por paco


„La instrua profesio *povus* influi porpacan agadon je niveloj lokaj, naciaj kaj internaciaj." Tiel diris Prezidento Jomo Kenyatta de Kenjo, inaŭgurante porpacan kampanjon, kiun lanĉis la Monda Konfederacio de Organizaĵoj de la Instrua Profesio (WCOTP) kaj la kvin milionoj da instruistoj, kiujn ĝi reprezentas. Prezidento Kenyatta parolis ĉe la Ĝenerala Asembleo de WCOTP la pasintan aŭguston en Najrobi, Kenjo. Li petis pli vastan interŝanĝon de ideoj kaj informoj kaj helpon en la gvidado de gejunuloj al „respekto kaj aprezo de la rajtoj de aliaj homoj, kaj samtempe la surprenon de sia propra respondeco por la socio". WCOTP esperas organizi kunvenon venontjare en Parizo kun aliaj internaciaj societoj, tiel ke instruistoj ĉie povu antaŭenigi la bonfarton de la profesio kaj de paco en la mondo.

(Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

El letero de J. Krolik

La Smolenskaj esperantistoj korespondis en la 20-aj jaroj kun partoprenintoj de revolucia ribelo en Hamburg. Unu el ili estis Willi Willendorf, kiun la klasa juĝo malliberigis por kelkaj jaroj. En la Smolenska ĵurnalo „Laborista vojo" (Rabočij putj) estis presitaj en januaro, februaro kaj julio 1927 tri liaj leteroj el la malliberejo Grooden, skribitaj en Esperanto kaj tradukitaj de smolenskaj esperantistoj.
Mi tre deziras ekscii pri la sorto de tiu esperantisto, kunbatalanto de E. Thälmann, kio okazis kun li en la sekvontaj jaroj, en la jaroj de faŝista reĝimo kaj dua mondmilito. Povas esti, ke iu el Hamburgaj Esperantoveteranoj povas rakonti pri la samideano Willi Willendorf... Ili skribu al I. Krolik ul. Bagrationa a. 16, Kv. 16, Smolensk, Soveta Unio.

LA DIA DEKRETO



Nguyen Hai Trung

Jam longe, tre longe en la estinteco. Tiam la kontrakto inter la homoj kaj Dio estis tre facila afero eĉ ĉiutaga!
Foje, delegitino de la surteraj virinoj venis plendi al Dio, ke estas grandega, ne tolerebla maljusteco inter la viroj kaj la virinoj: Jen, la geedzoj ĝuis la saman feliĉon por havi infanon; sed nur la virinoj suferegas naskante la idojn. Ke la aĉa maljusteco ĉesu!
Post elpripensado, Dio konsideris, ke la plendo estas taŭga eĉ pravega, tial li senprokraste solene dekretis, ke, de tiam, kiam la virinoj naskos infanon, la edzoj (veraj patroj de la naskontaj idoj) devu suferi anstataŭ siaj karaj edzinoj. Tuje, la dekreto fariĝis sankta leĝo sur ĉiuj sunsistemoj.
Ĉio bone marŝis.
Unu jaron post la publikigo de ĉi tiu Dia ordono, la Dio-edzino estas naskonta la reĝidon. Ĉie estis ĝojo! Festego estis pretigata sur la tuta Dio-reĝimperio. Por esti modela, la Dio-Moŝto pretiĝis dolori anstataŭ sia karega, sankta, nobela kunvivantino. Li ĉion preparis por si mem (kuraĝegon, trankvilecon, ĉielreĝan sintenadon ktp.)
La horo malrapide marŝis. Finfine ĝi alvenis kaj estis pasanta. Sed, nenio okazis ĉe la Dia ventro! Kial do?
La Dio-Moŝto vere miregis!
La Dio-edzino estis naskanta . . .
Rigardante tra la fenestro, la Dio-Moŝto vidis, ke sinjoro Thiên lôi – la Dia-gardisto – tenante per siaj du manoj la ventron, tenante malfacile sian korpon, grimacante, li suferegas, ĝemegas: „Oj . . . oj . . . kiaj doloregoj! . . ."
Furioziĝante, la Dio-Moŝto, per sia dikega fermita mano, frapegas la Dianskribtablon, ekkriis fulmotondre:
– Ke la Tho-công (tergardisto) venu tuj! Tiu ĉi akurate, tremante alflugis.
Eksciinte la koleregon de la Dio-Moŝto, la tergardisto raportis ke . . . estis . . . preskaŭ la sama situacio sur sia empirio – la terglobo!
La furiozo de la ĉiela empiriestro iom post iom trankviliĝis. Fine, li denove dekretis ke de hodiaŭ la malnova stela leĝo estu senkompate reaplikota: „Tiu, kiu naskos infanon devu suferi mem, sen iu ajn helpo, eĉ de la karega edzo!"

Memoroj de pordisto

Post kiam Ernest Bouchain, ĝistiama pordisto de grandaj hoteloj en Nizza estis retiriĝinta al privata vivo, raportisto demandis lin pri la plej kurioza gasto dum lia kariero. „Estis tiu anglo", diris la maljuna pordisto, „kiu ĉiam mendis dulitan ĉambron kaj sin lasis veki meznokte por rampi en la duan liton".

Lasta admono

Reklamo de vojaĝoficejo en Vaŝingtono „Ĝuu ĉiun tagon! Rigardu la mondon kiam estas ankoraŭ kapabla. Niaj tombejoj estas plenoj da homoj, kiuj kredis esti senanstataŭeblaj!"

Majstra ŝtelistino

Certan rekordon akiris la poŝ-ŝtelistino Lorenza Cossu el Bologna. Dum ŝia pridemandado en la policejo ŝi ŝtelis la biletujon de la komisaro, la lip-kolorigilon de lia sekretariino kaj la cigaredojn de policisto.

RECENZO

Kia vigla eldonagado!

Jam denove la fremdlingva Eldonejo en Hanojo surprizas kaj ĝojigas nin per nova eldono de tre leginda novelaro sub la titolo *„La Bambufluto"*.
Famkonataj verkistoj de libera Sud-Vjetnamio prezentas al ni 9 novelojn kun allogaj titoloj, nome:
La sovaĝa floro (Duong Thi Minh Huong) / La Bambufluto (Hoai Vu) / La rifuĝinto (Le Vinh Hoa) / Venta sezono (Anh Duc) / Dum foresto de patrino (Nguyen Thi) / Ĉe la rando de bombotruo (Phan Vo) / La bubalo (Tran Phuong Tra) / La patrino de Vien Trink (To Nhuan Vy) / Rakonto pri mia samvilaĝano (Anh Duc) /
Ĉu la pli bona papero, la unupaĝaj grafikaĵoj kaj la modestaj sed tre konvenaj vinjetoj jam povas esti la esprimo de ekflorantaj pacaj cirkonstancoj?
En „La sovaĝa floro" estas rakontata la energia kaj klarjuĝa sinteno de juna vojgvidistino, kiu sperte senlace kaj lertmove kiel sciuro kondukas la batalantojn tra danĝeraj regionoj konstante minacataj de bomboj kaj kanonobusoj. „Sed nenio povas difekte ŝanĝi ŝian humoron". Eĉ survoje ŝi kolektas sovaĝajn florojn por la Laborjunulara Organizo en la etapo. Fine la estro de unu trupunuo baptas la sveltan, mildvoĉan junulinon „sovaĝa floro".
En „La Bambufluto" temas pri dektrijara knabo, kiu heroe suferis la torturaĵojn de la jankeoj. Tiu etulo kiel vojgvidanto multfoje gvidis la kamaradojn tra malamika regiono. Kun sia bambufluto la knabo ŝajnige aŭdigis birdokriojn por voki aŭ averti la kamaradojn. Vere emociiga rakonto!
„La Rifuĝinto" preskaŭ estas humoraĵo. Oni ekscias, kiel virino senĝene dum oficiala ceremonio postulas sian pagon de Serĝento Ro, kiu intencis „rifuĝi"! Heroeca kortuŝa atmosfero elfluas el la linioj de la novelo „Venta Sezono". La titolo iomete erarigas. Sur milita fono preskaŭ idilia amrakonto!
Ŝi: juna instruistino sengepatra,
Li: militvundito.
Oni ekscias la penigan vivon en t.n. limregiono „. . . kies loĝantoj, kiujn oni kredas senesperaj kaj foririntaj, male firme alkroĉiĝas al tiu tero, kiu estas preskaŭ nuda. Ne plu domoj, oni vivas ĉiuj en subteraĵoj". Sed meze en tiu dezerto, kvazaŭ oazo, troviĝas la subtera gaje aspektanta klasĉambro de fraŭlino Ut Zieu „kun bone instalitaj pli ol dek vicoj da tabloj, fabrikitaj el brile polu-

rita, bonkvalita ligno. Ŝajnas, ke ĉiuj plej bonaj lignotabuloj kiuj restas de la vilaĝo, estas rezervitaj al tiu subtera ŝirmejo". Tiu ĉi paca bildo akompanas la junan militvunditan Lan en ĉiuj liaj bataliroj.

„Dum Foresto de Panjo" priskribas vivon kaj agadon de kvar infanoj de heroino de la Liberiga Armeo. Be, Than, Anh kaj Hien senĝene kaj gaje ludas lernejon, dum la patrino forestas, batalante atakas la malamikojn. La plej aĝa filino. Be prizorgas la gefratojn. Pro tio ŝi ne povas viziti lernejon.

„Sed fine la posteno Balli estas elrazita kaj venas la tiel longe atendita tago: Be kaj siaj gefratoj iras al la lernejo". Unikaj ridigaj infanaj scenoj karakterizas ĉi tiun psikologie impresan novelon.

„Ĉe la rando de bombotruo" respegulas en dialogoj la noblan ofereman sintenon de diversaj popoltavoloj. Sidante ĉe la rando de kreita de bombo lageto la rakontanto kaŝobservas la preterpasantojn, aŭskultante iliajn interparolojn, kiuj estas du mezaĝaj virinoj venante de la bazaro, 3 oficistoj kun peza tornistro, mezaĝa kamparano, homgrupo el kvar, kvin knabetoj kaj ĉefe la du amantoj, junulo kaj junulino. Ili longe kaj profunde interparolas pri okazintaĵoj militaj, komunaj konatoj kaj simplaj ĉiutagaj aferoj. La junulo konkludas, ke „nia persona feliĉo kvankam grandvalora por ni, estas tamen malgrandega, kompare kun la komuna . . .".

„La bubalo" estas emociiga pruvo, ke unuanimeco fine venkas. Temas pri la peniga vivo en regiono, provizore okupita de la malamiko en Sud-Vjetnamio. La vilaĝaj aŭtoritatuloj faras ĉion eblan por senigi la vidvinon Chuyen de la bubalo, kiu estas propraĵo de la Kamparana Asocio. Post multaj klopodoj kaj suferoj la vilaĝanoj venkas kaj povas revenigi la bubalon.

„La patrino de Vien Trinh" estas emociiga rakonto pri vivo kaj sorto de sesdekjara virino en milita tempo. Perdinte siajn tri filojn ŝi fariĝas la patrino de la tuta bataliono.

„Rakonto pri mia samvilaĝano" de Anh Duc estas laŭdokanto de la oferema sinteno, de la forto de la kolektiva unuiĝa bloko, la forto de la batala kamaradeco. Noi, senpatrina orfo laboris kiel bubalgardisto. Poste li fariĝis vojgvidisto kaj flegisto de militvunditoj. Dum atako de malamikoj li kun sia kunbatalantino Hong estis sukcese rezistinta kontraŭ pli ol ducent malamikoj kaj tuta aro da kirasĉaroj. Spite al multaj gravaj vundoj ĉe frunto, dorso kaj flanko, amputita dekstra brako kaj difektita okulo li resaniĝis kaj trovis sin taŭga por plenumi sian funkcion de vojgvidisto.

Vere, antaŭ tiaj fortostreĉoj kaj obstino, ne estas mirige, ke la vjetnama popolo „atingis la celon en gloro", kiu estas libereco kaj paco.

Hella Sauerbrey

Mi intencas allogi vian apetiton parolante pri eldono de la Brita Esperantista Asocio.

Tiu ĉi belaspekta libro pritraktas receptojn de kuirarto. Ĉia titolo estas „La Internacia Kuir-Libro — Receptoj el la Tuta Mondo" kompilita de Johanna Shorter Eyk.

Vere ĝi estas dusence „Internacia Libro", ĉar oni prezentas internaciajn receptojn en internacia lingvo.

RECENZO

Kuir-libro

Sur 193 paĝoj oni trovas 500 receptojn el 100 landoj. Mi nur mencias kelkajn landojn: Aŭstralio, Anglio, Adeno, Cejlono, Eburbordo, Islando, Kanado, Koreo, Laplando, Malto, Monako, Norvegujo, Rumanujo, Sovetunio, Sudano, Usono, Venezuelo kpt. . . . Foliumante la koro de ĉiu virino kaj kuiremulo devas ĝojbati, ĉar ĉiujspecaj manĝaĵoj estas kompilitaj: supoj, almanĝaĵoj, fiŝaĵoj, legomoj, saŭcoj, ovaĵoj, fromaĝoj, salatoj, pudingoj, birdoj kaj ĉasaĵoj, bovaĵoj, bovidaĵoj, ŝafaĵoj kaj ŝafidaĵoj, porkaĵoj, kukoj. Certe la viroj bedaŭras, ke trinkaĵoj mankas. La nomoj de kelkaj manĝaĵoj ankaŭ estas skribitaj nacilingve. Ekz.: Densa Fiŝsupo = Bouillabaisse el Francujo, Supo el Bova Osto = Oxtail Soup el Britujo, Haringoj Rulitaj = Rollmops el Germanio, Terpoma Omleto = Kartoffelpuffer el Germanio, Kristnaska Kuko = Dresdner Stolle el Germanio, Ŝafidaj vostoj = Cha Yang wei el Ĉinujo ktp . . . Kvankam temas pri 500 receptoj la legado ne estas enuiga. Ne pensu, ke ĉiu komenciĝus laŭ antikva modelo per la vortoj „Oni prenu"! Tute kontraŭe! La esprimriĉeco de la IL kaj la lerteco de la aŭtorino garantias bonegan stilon. Diversflanke la receptoj komencas, ekz. „Lavu la brasikon . . ." „Deprenu la eksterajn foliojn . . ." „Intermiksu asparagon, picajn karotojn . . ." Trempadu la haringojn en malvarma akvo . . ." „Fandu la gelatenon en malvarmo akvo . . ." „Lavu kaj sekigu la laktukajn foliojn . . ." ktp. . .

Nature estas tre interese kiaj estas kaj la eksterlandaj kaj la germanaj receptoj. Kiel ekzemplo mi citas unu recepton:

„Kuko kun terpoma faruno"

150 g da butero, 150 g da sukero, 75 g da terpomfaruno, 75 g da faruno, 4 ovoj apartigitaj, raspita, ŝelo de $1/2$ de citrono aŭ kelkaj gutoj de vanila ekstrakto, sukerpulvoro. Kremigu la buteron kun sukero dum 30 minutoj. Iom post iom aldonu la ovoflavojn kaj citronŝelon, terpomfarunon kaj farunon. Kiam tio estas bone miksita, enmiksu la bategitajn ovoblankojn. Metu en buterumitan bakujon kaj baku je mezalta varmeco dum 45 minutoj. Superŝutu sukerpulvoron.

Kompreneble por ni estas aparte interese kiom da germanaj manĝaĵoj oni mencias kaj kiujn. Mi nombris 25. Estas jenaj:

Artiŝoka supo	poma griaĵo
Asperaga supo	pomoj kun rizo
Bovidkapa supo	haringoj rulitaj
	tomatoj farĉitaj kaj
biera supo	stufitaj
terpoma omleto	riza farĉaĵo
cepa saŭco	boligita fiŝaĵo
	fiŝaĵo en
pana saŭco	pikanta saŭco
	plateso kun tomato
ovoj batmiksitaj	kaj lardo
asparaga salato	saŭrkraŭto
	ansera internaĵo,
haringa salato	ansero rostita
	bovpulma hakitaĵo,
ansera kolo stufita	leporo rostita
leporo rostita	spica kuko
kristnaska kuko	

Menciindaj ankaŭ estas la enkondukaj ĉapitroj kun amaso da terminoj. Helpe de tiuj ĉapitroj eĉ nespertulo povus eklerni kuiri. La unua titolita „kuireta terminaro" donas detalajn klarigojn: ekz.: „kuireti": tio signifas, ekkuiri kaj de tiam kuiretu; aŭ „kaĉo": por havi kaĉon frotu kuiretan manĝaĵon tra kribilo;

aŭ „kustardo": tio estas manĝaĵo farita el lakto kaj maizfaruno.

Sekvas la ĉapitro „Sugestoj" kun pliboniĝaj rekomendoj, ekz. „Legoman supon" sen viando oni plibonigas metante unu pecon da sukero en la supon,

aŭ „tro salita supo" enmetu unu aŭ du kuiritajn terpomojn en la supon. Ili absorbas multe de la salo.

La lasta ĉapitro pritraktas kuirejajn ilojn, mallongigojn kaj mezurunuojn, kaj proksimumajn pezojn de ingrediencoj (Zutaten)

ekz.	1 supkulero da butero	= 20 g
	1 supkulero da faruno	= 10 g
	1 supkulero da paneroj	= 10 g
	1 supkulero da sukero	= 15 g
	1 supkulero da rizo	= 15 g
	1 supkulero da lentoj	= 15 g
	1 supkulero da pizoj	= 15 g

kaj fine gvidilo por temperaturo de bakforno.

Nun je la fino *mi resumas*: Tiu ĉi libro estas tre uzebla, bonstilforma kuirlibro kaj por komencantoj kaj por spertulo, do por laiko kaj eĉ por kuirartisto:

La apetito jam komenciĝas dum la legado.

Hella Sauerbrey

Detlev Blanke

Internacio de proleta esperantistaro [IPE]

— historia skizo —

Enkonduke

Okupiĝante pri la perspektivo de la internacia lingvo, oni sendube devas krei al si klaran imagon pri la socia, t.e. la sociutila rolo de Esperanto. Montriĝis en la praktiko sterila tiu koncepto en la Esperanto-movado, kiu limiĝas je la nura argumentado pri la teoriaj utiloj de enkondukata internacia lingvo, kiu ofertas la „neŭtralan" (fakte por nenio kontreta taŭgan) solvon de la internacia lingva problemo. La historio de la esperanto-movado pruvas, ke la plej bona propagando por Esperanto estis ĝia konscia uzo por klare definitaj celoj. La internacia proleta esperanto-movado liveras al ni tian pruvon.

1. Komencoj

Kiam komence de nia jarcento la laborista movado en Eŭropo konsiderinde pligraviĝis, ankaŭ fondiĝis la unuaj laboristaj esperanto-grupoj (1903 en Stockholm, 1905–1908 en Frankfurt/Main; den Haag, Paris k.a.)[1] La laboristoj ja volis uzi Esperanton por tute konkretaj celoj. Ili ne kontentis pri la „neutrala movado". Jen kiel 1912 la bohemia (laborista) esperanto-gazeto „Kulturo" karakterizis la VII-an UK en Krakovo: „Bonvenado kaj fama „babilado", ekskurso, balo, teatro, fiservema glorumado de modesta persono de Zamenhof, kelke da senprogramaj „laboraj" kunsidoj kaj kanto de naiva himno pri „pacaj batalantoj": tio estas ĉio, kio okazas dum tia tutmonda kunvenego esperantista – kaj laŭ tio aspektas poste tuta esperanta movado ĝenerale"[2].

„Unue ni estas socialistoj, poste esperantistoj"[3], oni senkaŝe deklaris, proponante Esperanton por interkomunikado de la laboristoj serve al la interesoj de la proletaro. La 1906 en Parizo fondita „Internacia Asocio Paco-Libereco" komprenis sian celon, ja certe ankaŭ propagandi Esperanton sed unuavice" batali per presaĵoj ... kontraŭ la Armeo kaj la Militarismo, la kapitalismo, la Alkoholismo, fine kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj antaŭjuĝoj, por la plibonigo de la socia vivado"[4].

Kunfandiĝinta kun la (eble franca?) „Esperantista Laboristaro" 1910 la nomo de la asocio ŝanĝiĝis en „Liberiga Stelo". La unua mondmilito detruisla promesplenajn klopodojn de la laboristaj esperantistoj sin internacie organizi. La unua neneŭtrala internacia gazeto verŝajne estis la „Internacia Socia Revuo", kiu pritraktis en siaj riĉaj kajeroj tiujn problemojn, kiuj interesis la tiutempajn progresulojn.

2. S A T – ĝiaj meritoj

La merito de Eugeno Lanti estis la kolekto kaj reaktivigo de iamaj membroj de Liberiga Stelo post la mondmilito. 1921 Lanti, klera metiisto, iniciatis la fondon de „Sennacieca Asocio Tutmonda" en la kadro de la UK en Praha. Sub la slogano „for la neŭtralismon", SAT estis la tiutempe sola internacia esperantista proleta asocio. De 1921 ĝis 1929 ĝi evoluis de 390 membroj al forta asocio kun 6329 membroj. Necesas substreki ke 1929 1987 membroj de SAT viiss en Soveta Unio kaj 1835 en Germanio[5]. Do nur tiuj ambaŭ landoj havis pli ol duono de la SAT-membraro. En siaj gazetoj „Sennaciulo" kaj „Nova epoko" (kelktempe nomita „Sennacieca Revuo", kiel ankaŭ hodiaŭ denove) oni legis pri vere klasbatalaj temoj, informoj pri la unua socialisma ŝtato de la mondo, Soveta Unio, analizojn pri la vivo de la laboristaro en plej diversaj landoj. La politika kaj literatura nivelo de la kontribuoj grandparte estis tre altaj. SAT-kongresoj havis progresemajn elstarulojn kiel patronojn (ekz. Henry Barbusse, Romain Rolland, Ernst Toller, Albert Einstein, A. Lunatscharski). La 1927 fondita gazetara servo sub gvido de Otto Bäßler (Leipzig) peris al nacilingvaj, laboristaj gazetoj multajn valorajn informojn pri la batalo kaj vivo de la laboristoj en diversaj landoj. Nur dum 1 jaro tiu-ĉi servo kolektis 115 kunlaborantojn en 33 landoj, kiuj disponigis 310 dokumentojn al la redakcioj de laboristaj gazetoj. La materialo aperis en formo de 1466 raportoj.[6]

Evoluis en SAT-rondoj certa internaciismo proleta. Kaj la organizo en neesperantistaj rondoj estis konsiderita kiel valora internacia proleta organizo. Eble pro tio la 6-a SAT-kongreso nomiĝis „Internacia proletaria Esperanto-kongreso[7] kaj ne „SAT-Kongreso" aŭ simile.

3. La krizo de SAT

Fakte la originaj ideoj de Lanti pri „Sennaciismo" en la unua kaj plej frukta periodo de SAT ne tro efikis. Sub „Sennaciismo" la plej multaj proletoj komprenis internaciismo – internacia lingvo. Sed tion Lanti ja absolute ne celis. Sub le influo de la oktobra revolucio kaj akraj ekonomiaj krizoj en la kapitalismaj landoj la laboristaro estis tre batalema, komencis en Germanio proletan revolucion (kiu disbatiĝis i.a. pro la firolo de la socialdemokratio) aŭ batal-akiris certajn rajtojn. Sed meze de la dudekaj jaroj la kapitalismo relative restabiliĝis. Revizionismaj teorioj pri „klasa paco", „kresko senbatala al al socialismo" ktp. kreskis kaj potencis. Ankaŭ en SAT pli influiĝas la plene utopia „Sennaciismo" de Lanti laŭ la formulo „pri milito kaj ĉiuj sociaj problemoj kulpas la lingvaj baroj. Forigante tiujn barojn ni kreos la vere justan, socialisman sociordon". Nekompreno de la nacia problemaro, malĝusta takso kaj de la historia rolo de kapitalismo kaj de Soveta Unio pli kaj pli videbliĝis sur la paĝoj de la SAT-gazetaro. En „La Laborista esperantismo" Lanti eĉ konsilis ne batali kontraŭ la imperiismo por ne ĝeni la historian proceson ... Li konsilis redukti la klasbatalon je ekonomiaj postuloj de la laboristoj al la entreprenisto.[8] Pura ekonomismo, tute ne originala, jam longe antaŭ Lanti kritikita de Lenin. Aldoniĝis, ke Lanti, kiu 1922 vojaĝis al Soveta Unio, tute ne komprenis, ke dum kelkaj jaroj, ne eblis al la nova ŝtato solvi, ĉiujn problemojn hereditajn el la peza cara tempo. Li fariĝis pli kaj pli skeptika (skeptikismo cetere estis lia elstara karaktera trajto) kaj montriĝis eĉ tute malkaŝe kontraŭsovetia.

4. La opozicio kaj la fondo de IPE

Kompreneble plej multo de la klaskonscia laborista esperantistaro ne povis kontenti kun tia evoluo. Unuan severan kritikon de la koncepto de Lanti ni trovas en la broŝuro de Ejdelman / Nekrasov[9]. Ankaŭ Germana Laborista Esperanto-Asocio, kiu ek de 1930 liberiĝis de la skismemaj socialdemokratiaj rondoj ĉirkau Sproeck, Puff kaj Deubler,

kompreneble kune kun SEU kaj kune kun aliaj pli klarvidaj esperantistaj proletoj, komencis fortan kaj principan kritikon de la teorioj kaj praktikoj de SAT. Formiĝis internacia „SAT-opozicio de klasbatalaj LEA-oj", kiu paralela al la 11-a SAT-kongreso somere 1931 en Amsterdam aranĝis „kongreson de revoluciaj esperantistoj".[10] Jam 1930 ekde oktobro aperadis dufoje monate nova gazeto „Internaciisto", kiu daŭrigis la pozitivan periodon de SAT kaj estis redaktita tute sur marksisma-leninisma bazo, tre rapide fariĝis la organo de la opoziciaj al SAT membroj. 1931 tio estas ĉirkaŭ 75 % de la SAT-membroj.
Fine de 1930 tiu nova gazeto jam havis pli da abonantoj ol „Sennaciulo".[11] 1930 ankaŭ en Leipzig fondiĝis „Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo" (EKRELO), kiel soveta-germana entrepreno, kiu dum ĝia ekzisto (1930–1933) eldonis pli ol 60 titolojn[12]), t.e. pli da libroj ol SAT dum sia tuta historio.
La celoj de la opozicio estis i.a. reŝanĝo de SAT en klasbatalan organizaĵon, organizo de internacia laborista korespondado, batalo kontraŭ la reakcia ideologio de SAT kaj ŝanĝo de la konsisto de la SAT-direkcio. Ĉar Lanti kaj liaj subtenantoj neniel emis cedi al la premo de la opozicio necesis fondi novan, memstaran klasbatalan internacian proletan esperanto-organizon. 1932 en Berlin (21. 8.–25 .8. 1932) tial fondiĝis la „Internacio de Proleta Esperantistaro" (IPE), kiu fariĝis unu el la plej potencaj kaj plej laborkapablaj organizoj. La kongreson partoprenis 348 laboristaj esperantistoj el 11 landoj.
La Internacia Unuiga Komitato (IUK) arigis ĉirkaŭ si dum la fondkongreso de IPE pli ol 13 000 laboristajn esperantistojn el 18 landoj kun 33 gazetoj. Do al IPE apartenis 1932 72 % de ĉiuj organizitaj proletaj esperantistoj kaj 82 % de ĝia gazetaro.[13]
La fondo de IPE praktike komencigis la preskaŭ plenan degenerigon de SAT. Jam 1924 la unua skismeto okazis, kiam kelkaj anarkistoj sin turnis kontraŭ la tiutempe ekzistanta soveti-amika sinteno de SAT, ili fondis la tamen nur vegetintan „Tutmondan Ligon de Esperantistaj Senŝtatanoj" (TLES)[14]. 1933 sub la influo de Aŭstria Laborista Ligo Esperantisto (ALLE) fondiĝis la Internacio de Socialistaj Esperantistojn (ISE), socialdemokratia unuiĝo[15], kiu tamen ankaŭ ne tro fortiĝis.

5. Laboroj der IPE

IPE en sia politiko tute orientiĝis al la aktualaj klasbatalaj bezonoj. En la gvidrezolucio de la Fondkongreso ni i.a. legas:

„3. La proleta esperanto-movado estas sang' de l'sango karn' de l'karno de la laborista klaso, tial ĝi devas viciĝi en la revolucian batalfronton en ĉiu lando, kontakte kun la aliaj klasbatalaj amasorganizoj. La taskoj de la laborista esperanto-movado estas organizi la disvastigon k aplikon de Esperanto por la revolucia batalo, al la proletaj organizoj, ĉefe organizi la internaciajn ligojn inter fabrikoj, kampmastrumejoj k Organizoj, ĉu perletere, ĉu per limrenkontiĝoj ...
6. La laboristaj esperantistoj plene subtenas la devizojn de la proleta internaciismo, batalas kontraŭ imperialismo k faŝismo, subtenas la liberigan batalon de la suprema taj nacioj k koloniaj popoloj, kontraŭ la subpremantaj k sialanda burĝaroj ...[16]

Kvankam gvidita de marksistoj IPE tamen ne estis pure marksisma organizo. Eĉ la plej granda parto de la membraro estis senpartia. Sed la klara ideologia koncepto de IPE estis ĝusta kaj alloga, ĉar ĝi respondis al la historia neceso, batali kontraŭ la minacanta faŝismo kaj milito kaj defendi la unuan socialisman ŝtaton, Soveta Unio. En sia organo „Internaciisto" aŭ en la eldonaĵoj de EKRELO (kiu fariĝis la eldonejo de IPE) oni presis materialojn tute ne utopiajn kiel SAT sed brule aktualajn. Tial la amasoj de la laborista esperantistaro vidis sian organizon en IPE. La ekrego de la faŝismo kaj la detruo de la IPE-centra oficejo en Berlin (februaro 1933) estis forta bato por IPE, sed ne povis ĝin detrui. Post la malpermeso de „Internaciisto" per la naziistoj en Germanio Sovetrespublikara Esperanto-Unuiĝo (SEU) faris el sia organo „Bulteno" novan sub titolo „Sur posteno", organo de SEU kaj IPE. 1933 kaj 1934 „Sur posteno" do raportis pri IPE, kies plej fortaj sekcioj fariĝis i.a. la franca kaj la brita. 1934 nova „Sur Posteno" ekaperis en Amsterdam (1934–1938) kaj la soveta ree fariĝis nur la organo de SEU. 1939 Marcel Boubou reeldonis tri numerojn de „Internaciisto", sed la plifortiĝanta ankaŭ en la aliaj eŭropaj landoj faŝismo kaj la senpere minacanta dua mondmilito ne donis longan vivon al la revuo. Sed en tiuj gazetoj oni legis klarajn parolojn pri la bruta naziismo, pri ties koncentrejoj, pri la hispana civitana milito kaj la partopreno de esperantistoj sur la flanko de la popolfrontanoj. Oni trovis sur ĝiaj paĝoj informojn pri Soveta Unio, por la proletaj amasoj plej interesa lando. 1935 IPE malgraŭ fakta disbato de GLEA en Germanio kaj forta lamigo de LEA-oj en aliaj terore regitaj landoj, havis ĉ. 17 500 membrojn[18]. 1935 la dua IPE-kongreso okazis en Antwerpen[17]. Konferencoj krome okazis 1933 en Lille[18] kaj 1937 en Paris[19].
Tamen, la historiaj kondiĉoj fine de la 30-aj jaroj malebligis la pluekziston de IPE. Ĉi 1939 dissolviĝis.

Kiujn servojn alportis IPE?

1. Per ĝia ideologie klare redaktita gazeto „Internaciisto" kaj aliaj materialoj ĝi grave kontribuis al la ideologia eduko de laboristaj esperantistoj kaj helpis al ili liberiĝi el la kaosa ismo de Lanti.
2. La bone organizita 1930 fondita Proleta Esperanto-Korespondo (PEK) ligis multajn neesperantistajn laboristojn kaj kolektivojn al tiuj en aliaj landoj, precipe en Soveta Unio pere de Esperanto. Krome ĝi peris materialojn (en formo de PEK-bultenoj) al la neesperantistaj laboristaj gazetaroj.

Ekzemple jam 1931 PEK publikigis 15 bultenojn kun 119 paĝoj da informmaterialo. 108 kunlaborantoj laboris en 21 landoj. Estis presitaj 234 artikoloj de PEK en laboristaj gazetoj de 20 landoj.[20]
Ĝis 1932 la PEK-centro en Berlin povis ligi 82 fabrikojn kaj organizojn el Sovetunio kun 185 partneroj el kapitalismaj landoj[22]. Nacilingvaj korespondbultenoj, nutritaj de PEK, i.a. aperis en Bulgario (Mejdunaroden rabselkor) 1934 kun eldonkvanto de 7000 ekzempleroj[23]. En la sama jaro la brita „Contakt" havis 1000 ekzemplerojn[24]. Gravan rolon PEK ludis en la disvastigo de la vero pri la germana faŝismo. La ek de 1933 ilegale en Germanio produktitaj materialoj per la PEK-kanaloj trovis vastan internacian distribuon.
Oni povas diri sen troigo, ke IPE savis la moralan vizaĝon de la internacia esperanto-movado dum epoko, kiu apartenas al la plej malhelaj de la homaro. UEA kongresis 1933 en Kolonjo en hitlerabruna ĉirkaŭo kaj 1935 en la mussolini-nigra Romo.
Multaj „neŭtralaj esperantistoj" adaptiĝis al la faŝismaj reĝimoj aŭ eĉ kreis faŝisman E-to-asocion (ekz. en Germanio Nova Germana Esperanto Movado).
Miloj da ilegale laborantaj laboristaj esperantistoj i.a. en Germanio, Pollando, Bulgario, Hungario kaj legalaj LEA-oj ne adaptiĝis sed daŭrigis sian batalon. Multaj laboristaj esperantistoj mortis en faŝismaj koncentrejoj aŭ en la hispana milito.
Certe ankaŭ en la t.n. burĝa movado multaj sinceraj esperantistoj faris heroaĵojn rezistantaj al la teroro. La familio de Zamenhof mem fariĝis viktimo de la faŝismo. Certe multaj el la iam neŭtralaj esperantistoj ekkomprenis la historian necesan ekkagi kontraŭ la brutaj reĝimoj, kontraŭ la milito por la libereco. Sed karakteriza tio bedaŭrinde ne estis. La honoron de la Esperanto-movado en tiu tempo de la historia sinpruviĝo savis la Internacio de Proleta Esperantistaro. Pri tio ni konsciu!

6. Ĉu revivigi IPE?

Kelkfoje meritplenaj laboristaj esperantistoj inklinas al la imago, ke nuntempe necesas revivigo de IPE. Por konanto de la historio de IPE, tio eble ŝajnas almenaŭ komprenebla. Sed oni devas analizi, ĉu la hodiaŭaj historiaj kondiĉoj respondas al simila neceso. Antaŭ 40–50 jaroj ja ne ekzistis socialis-

ma ŝtataro, ne estis tiel forta la internacia komunisma movado kaj la daŭre plilarĝiĝanta diversideologia pacmovado. Hodiaŭ regas tute aliaj historioj kondiĉoj. Tio ne signifas, ke ankaŭ mankas klasbatalo. Kontraŭe. Sed revivigo de IPE en malnova formo tamen fariĝus anakronismo. Ja multaj idealoj de IPE eniris en la agadon de MEM, fariĝis elementoj en la politiko de la esperanto-asocioj en socialismaj landoj. La ĉefa tasko de la internacia klasbatalo estas, devigi la imperiismon alpreni la principojn de la paca kunekzistado, bridi la militagantojn. Por tiuj celoj, kiel konate, jam multajn jarojn, agas MEM. Tio ne signifas, ke ni devas plene kontenti pri la nuna agado de MEM, sed ĝi estas aktuale la plej progresema internacia esperanto-organizaĵo, kiu siavice post la dua mondmilito savis la honoron de la esperanto-movado, ĉar ĝi ĉiam staris sur la historie prava flanko en la internaciaj konfliktoj kaj porpacaj iniciatoj. Kvankam laŭ ekesto, strukturo kaj esenco IPE kaj MEM estas du diversaj aferoj (MEM ekzemple tute ne estas nur laborista movado!), tamen ja en gravaj celoj estas identeco. Sed same kiel la internacia komunisma kaj laborista movado **ne** eĉ pensas pri kreo de nova kominterno (komunisma internacio), simile restarigo de esperantista internacio nur signifus izoliĝon kaj apartiĝon de la ĝenerala esperanto-movado, en kiu devus kunlabori ĉiuj diversdentencaj movadoj kaj organizoj. Tamen, ke estas utila la aktivado de esperantistoj en la sino aŭ en kunligo de komunistaj partioj, pri tio ne povas esti iu ajn dubo.

Plue, reviviĝo de ne-SAT-emaj laboristaj Esperanto-Asocioj en nesocialismaj landoj ja same estus bonvena. Sed necesas eviti la erarojn de la pasinteco. Tiuj, ne-SAT-emaj laboristaj asocioj aŭ komunistaj grupoj devus kunlabori kun la „neŭtrala" landa asocio, kun la neŭtrala internacia movado, kun MEM ktp. kaj tamen sekvi sian propran specifikan vojon.

La historio ne ripetiĝas. Sed lerni el ĝi oni devas. La historio de IPE, kiu nur tute supraĵe povis esti skizita ĉi-tie, i.a. instruas:

1. Esperanto por si mem estas tute superflua, se oni ne atentas la realan socian grundon, en kiu la lingvo efikas aŭ devus efiki.
2. Esperanto ne estas rimedo por solvi ĉiujn sociajn problemojn, sed ĝi povas en taŭgaj manoj utili al ties solvo.
3. Tial organizo kun klara ideologio (kiu respondu al la aktualaj ĉeftaskoj de la homaro) mobiligas amasojn.
4. Sekve engaĝiĝo por la historia progreso, por la plej gravaj interesoj de la homaro (batalo kontraŭ la milito), per Esperanto estas tre bona (kvankam ne la sola) argumento **por** Esperanto.
5. La utiligo de Esperanto por neesperantistaj rondoj pli elokvente ol ĉio ajn pruvas la taŭgecon de la lingvo.

7. Font-indikoj

1. de Bruin, G. P.: Laborista Esperanto-Movado antaŭ la mondmilito, SAT, Paris 1936, pĝ.
2. fonto 1) pĝ. 9
3. fonto 1) pĝ. 8
4. fonto 1) pĝ. 21/22
5. Jarlibro de SAT 1929/1930, Paris 1930, pĝ. 218
6. kp. Historio de SAT 1921–1952, 1953, pĝ. 46/47
7. kp. la sovetan poŝtmarkon 1926, en fonto 6) pĝ. 39
8. kp. Lanti, E. „La laborista esperantismo", Leipzig/Paris, 1928, pĝ. 28/29
9. Ejdelman, Nekrasov N. „Problemoj de laborista esperantismo" Leipzig 1930
10. kp. la protokolon de „Kongreso de revoluciaj esperantistoj" Eld. „Internaciisto" 1931, Berlin, (92 paĝoj)
11. kp. „Internaciisto" n-ro 18/19 (1931), pĝ. 1
12. kp. „La Revuo Orienta" n-roj 3, 4, 5, 6
13. kp. „Internaciisto" n-ro 45 (1932) paĝo 82
14. kp. Enciklopedio de Esperanto vol. II, Budapest 1933–34, pĝ. 313
15. kp. Enciklopedio de Esperanto, vol. I, pĝ. 242, vol. II, pĝ. 317
16. „Internaciisto" n-ro 45 (1932), pĝ. 85
17. kp. „Sur Posteno" (Moskvo) n-ro 1–2, 1936
18. „Sur Posteno" n-ro 4 (141), 1933, pĝ. 25
19. kp. Schödl, Ludwig: „El dokumentoj kaj memoroj pri la laborista Esperanto-movado", Paco 4/1973 (GDR-eldono)
20. kp. 10) pĝ. 56–59
21. kp. 10) pĝ. 54–55; „Internaciisto" n-ro 2/1930, pĝ. 15
22. kp. „Arbeiter-Esperantist", Berlin, n-ro 8/32, pĝ. 5
23. „Sur Posteno" (Moskvo) n-ro 28/29 (164–165), 1934, pĝ. 113
24. kp. 23)

Respublika konferenco de esperantistoj de GDR

Jam la trian fojon la esperantistoj de GDR kolektiĝis al tutrespublika konferenco. Ĉijare ĝi okazis la 1-an kaj 2-an de junio (pentekosto) en Berlin. Partoprenis pli ol 200 delegitoj kaj gastoj, inter ili reprezentantoj de la esperanto-organizaĵoj el Bulgario, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj Soveta Unio. La konferenco pritraktis speciale la laboron de la esperantistoj de GDR dum la lastaj du jaroj kaj fiksis la ĉeftaskojn por la proksimaj jaroj. En du plenkunsidoj kaj en la laborgrupoj „aktivado de grupoj", „tradicioj de laborista esperanto-movado", „junularo", „esperanto-instruado" kaj „interlingvistiko" estis pritraktitaj la plej ĉefaj resultoj kaj problemoj de la aktuala esperantomovado en GDR. Estis decidite doni specialan atenton al la laboro de la junularo, al la plibonigo de la grupa agado kaj ties gvidado kaj al la organizo de pli multaj kaj pli altnivelaj kursoj.

La du vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj kaj distraj programoj. La konata pola aktoro Andrzej Tomecki prezentis sian unupersonan spektaklon „Kaj tamen estas Varsovio", kiu kaŭzis grandegajn aplaŭdojn. La duan vesperon oni spektis la du nove sinkronigitajn kolorajn sonfilmojn el GDR „Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj" kaj „Nia lando". Diskoteko zorgis por muziko.

Substrekindas la alta aprezo, kiun donis la konferenco al la 1973 en Moskau subskribita „Komuna deklaro" inter Tutmonda Packonsilantaro kaj MEM. La konferencanoj subtenis rezolucion pri Ĉilio, akceptitan de la Packonsilantaro de GDR.

Riĉa literaturstando ofertis multajn materialojn kaj librojn en Esperanto, inter alie la romanon „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz.

Kun optimismo estis konstateble, ke partoprenis relative multaj gejunuloj, kiuj en la plej granda laborgrupo („Junularo") debatis pri novaj formoj de junulara esperantista agado. En „interlingvistika fakgrupo" la prelego de profesoro Armand pri la temo „interlingvistiko en Soveta Unio" vekis tre grandan atenton.

Duono de la kongresanoj (100 personoj!) partoprenis la konferencon je la kostoj de Kulturligo.

Mongola fabelo

Kvar amikoj

Antaŭ longa tempo vivis en belega arbaro en Hindio kolombo, leporo, simio kaj elefanto. Ili opiniis, ke oni ne nur vivu kune en amikeco, sed nepre estu necesa, ke ili ankaŭ estimu kaj respektu la plej aĝan fraton inter ili.

Pri tio ili parolis, demandante unu la alian, kiu do estus la plej aĝa frato inter ili.

La elefanto diris: „Kiam mi ankoraŭ estis elefantido jam mi dormis en la ombro de tiu-ĉi arbego."

Respondis la simio: „Dum mia infaneco ĉi-arbo nek havis branĉojn nek oni povis amuziĝi sur ili."

La leporo: „Kaj kiam mi ankoraŭ estis leporido, tiam ĉi-arbego jus ekkreskis kaj dum danĝero mi kaŝis min sub ĝi."

Poste la kolombo: „Sed mi unue alportis la semon por ke la arbo kresku."

Do, sekve la kolombo estiĝis la respektinda, plej aĝa frato inter ili. Depost ĉi-tiu tempo ili fariĝis veraj fratoj por ilia tuta vivo. Jen ili prezentas la simbolon de trankvilo kaj Paco.

Tiel la opinio de niaj maljunuloj.

Trad. Latosbaldo, Ulan Bator

RECENZO

Baldur Ragnarsson: **Esploroj.**
Poemoj. 123 p. 1973
Roberto Passos Nogueira: **Vojo kaj vorto.**
Poemoj originalaj kaj tradukitaj, 111 p. 1972
Ambaŭ: Stafeto. Beletraj kajeroj n-ro 44 resp. 41 Eld. J. Regulo

En „Literatura Foiro" n-ro 16 Clelia Conterno asertis, ke prozo estas multe pli malfacile alirebla ol poezio. Kaj dum en la originala verkaro esperanta ni ankoraŭ atendas la „grandan prozon", nin atingas novaj poeziaj verkoj, inter ili la du supre indikitaj.

B. Ragnarsson antaŭparole konfesas, ke por li poezio estas esploro, nome esploro per vortoj ekster la limo de ordinara sperto, estas trovo de io antaŭe nekonita aŭ nespertita aŭ nerimarkita. Iloj por realigi ĉi tiun esploron estas la metafora uzo de la lingvo kaj ties struktrua. Ĝuste Esperanto disponigas al la poeto riĉajn eblojn vortfaradajn kaj strukturajn, kiuj faras ĝin unike dinamika inter la lingvoj. Per ĉi tiuj ebloj B. Ragnarsson kuraĝe eksperimentas en siaj 24 poemoj. Li uzas kelkajn neordinarajn kunmetojn (ekz. blankdaŭri, erpasintoj, briloze, elsonĝaĵo). Li provas, per metafora uzo de la lingvo celi kaj atingi sub la kliŝon, en la profundon. Sed li ne troigas la metaforismon, sed kelkloke strebas al lingvo rekta, fakta, senornamenta (ekz. en la poemo „La ĉerizarbo de Lucullo"). Tiamaniere prezentante sian sentaron, li esperas „kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo". Tiun ĉi aserton B. Ragnarsson mem nomas estanta kaj restanta tre persona, ĉar neniu alia persono povas sperti liajn sentojn absolute same. En tio li certe pravas, kaj tiusence oni povas aprobi ne nur la formalan, sed ankaŭ la enhavan flankon de liaj poemoj. Certe ne senrezerve aprobindaj ili estus, se oni volus, preni ilin ĝenerale validaj saĝecoj. Ekzemple en la poemo „La celo sen difino", laŭ la opinio de la recenzinto certagrade tipa por la mondkoncepta pozicio de la poeto, li diras, ke vojoj „. . . evidente kondukas ĉiam ien, kio indas nur moderan laŭdon", kaj rilate al al konstruado de domoj „oni ja devas agnoski ĝian utilon, . . . sed ankaŭ ĝi proponas nenian solvon", sed „. . . validas . . . prefere . . . du fortaj piedoj, koro kuraĝa kaj drasta senfina emo" por foraj horizontoj" ĉar „. . . ĉiam daŭrigi sen iu celo difinita estas la plej bela, plej liberiga, sen iu ajn ĉirkaŭstringo" kaj la celo sen difino estas „tiu, kiu la sola faros liberaj nin . . ." Nu, eble B. Ragnarsson fakte sentas la bezonon liberigi sin de iuj celadoj, kiujn li sentas ĉirkaŭstringantaj. Sed la recenzinto ne povas vidi ian utilon en tia sinteno kaj opinias, ke la laŭdo de la celo sen difino nur kaŝas sencelecon, do staton apenaŭ kontentigan, kvankam probable kondiĉitan de la socia ordo, en kiu la poeto vivas.

Respektante la subjektivecon kaj la socian kondiĉitecon de la eldiroj la poemoj povas havigi artan ĝuon, ĉar ili estas faritaj per lerta kaj sprita lingvaĵo kaj en formoj, kiuj estas tre variaj, atingantaj de akademismaj, t.n. parnasaj formoj (inter ili eĉ troviĝas unu klasika soneto) ĝis vortdinamikaj konstruoj rezignantaj pri elformuligo de la ideoj kaj pri interpunkcio. Sed tiaj konstruoj ne konsistigas la esencan parton de la poemaro, kiu kiel tuto estas leginda kaj rekomendinda.

Male, en la originalaj poemoj de RP Nogueira la vortodinamiko estas karaktera kaj deklarita metodo. Deklarita ĝi estas en aldono je la fino de la libreto „Pri moderna poezio kaj Esperanto". Tie Nogueira prezentas sian koncepton pri moderna poezio, kies ĉefan trajton li vidas en iu profunde radikiĝinta aspiro al libereco de esprimado. Minacon al tia libereco li sentas (kaj timas) antaŭ ĉio flanke de la akademismo kun ĝiaj reguloj kaj rekomendoj pri la „perfekta" verso. En la „Parnasa Gvidlibro" kaj ĝiaj adeptoj li vidas la kernon de tiu akademismo, kies anticipaj formuloj malhelpas laŭ la opinio de Nogueira la esploradon pri ĉiuj fizikaj aspektoj de la poemo (la variigeblaj kombinoj de sonaj, ritmaj kaj rimaj strukturoj) kaj la fleksebleconnecesan al la verso por sin adapti al la enhavo. Nogueira sin apogas je la ekzemplo de William Auld, kiu honoris kaj kvazaŭ sankciis la libreton per antaŭparolo. Nogueira substrekas, ke William Auld per sia verko „La Infana Raso" malfermis novan vojon al reformulado de la poezia arto en Esperanto. Sed tiu procezo de reformulado elvolviĝis por Nogueira tro malrapide, tiel ke li kiel juna poeto kredas sin pravigebla kiam li volas plene glatigi la novan vojon. Jen, evidente, la celo de la originalaj poemoj nun prezentitaj de li.

Temas entute pri 17 eroj, kiuj parte konsternis la recenzinton per evidenta manko de enhavo (aŭ eble nur, laŭ Nogueira, temas pri manko de komprenkapablo flanke de la recenzinto ankoraŭ kaptita en „akademismaj" ideoj?). Sed kion pensi kaj imagi legante poemon kun la titolo „Sintezo" kaj jena teksto:

„La ekvacio kaj la rozo
Elektronoj kaj via rideto
Om
Sat
Pacon"

aŭ poemon kun la pretenda titolo „Simfonio de l'dubo":

„ĉu
jes
sed
se
eble
ne"

aŭ la poemon „Unu du tri kvar":

U R V
". D T I K A"
R

Vere, estas malfacile malkovri poezion en tiaj „poeziaĵoj". Sed necesas aldoni, ke ne ĉiuj poemoj estas tiaspecaj. Aliaj estas faritaj en legeblaj kaj relative kompreneblaj, sed ĉiam kontraŭ-akademismaj versoj. Sed ĉiam ili postulas de la leganto grandan pretecon sekvi la imagojn de la poeto, plej ofte nur aluditajn, tasko des pli malfacila, ĉar kun unu escepto mankas ĉia interpunkcio, tiel ke la leganto havas la kroman plezuron eltrovi, kiom da senc-variantoj eblas per interpunkciaj variantoj. Entute la orginalaj poemoj de „vojo kaj vorto" ja prezentas vortojn, kelkfoje eĉ sencojn, sed ne eblas ekkoni vojon, almenaŭ ne, se oni, malmulte interesiĝante pri poeziartaj disputoj, atendas aŭ serĉas proponojn pri vojoj al pli bona kompreno de mondo kaj homoj aŭ al pli certa venko super homaj kaj instituciaj malperfektaĵoj.

La tradukitaj poemoj ampleksas erojn el la verkoj de 17 verkistoj, ĉiuj elstaraj reprezentantoj de la nuna (aŭ jus pasinta) epoko, inter ili Bertolt Brecht, Vladimir Majakovski kaj Pablo Neruda Ili estas evidente elektitaj por apogi la tezojn prezentitajn de Nogueira. Certe ili povas esti rigardataj kiel tia apogo, sed samtempe ili frape demonstras laŭ formo kaj enhava eldiro la evidentan nivelan distancon kompare al la poemoj de Nogueira. La tradukoj estas kompreneblaj kaj bone legeblaj. Ĉu ili estas ĉiam trafaj en la senco de la originalo, la recenzinto povis kontroli nur rilate la poemojn de Brecht. Tiurilate ekestis iuj duboj rilate la tradukon de la poemo „Ĉe la Gravuloj", kiu ŝajnas al la recenzinto parte erara, parte tro retenema en la esprimo de la akra socia kritiko de Brecht.

D-ro Karl Schulze, Berlin (GDR)

RECENZO

Pio Baroja: **La arbo de la sciado**
El la hispana trad. de Fernando de Diego.
La Laguna, Tenerifo, 1973. Stafeto, Belliteratura Serio 31.
256 p., prezo 260 pesetojn
Kun aŭtoro- kaj verko-prezento de Juan Régulo Perez.

Honore al la 100-a naskiĝdatreveno de unu el la plej elstaraj romanverkistoj de la mondo, la Belliteratura Serio de la eldonejo Stafeto ofertas al la Esperantistaro la tradukon de „El árbol de la ciencia" de Pio Baroja (1872–1956). Ĝi peras konatiĝon kun vaska aŭtoro kiu havas multajn kontraŭulojn en Hispanio, ĉar li atakas ŝtaton kiel Papon, amikon kiel malamikon, mokas pri ĉio

kaj ĉiu, blasfemas, kritikas, pesimismas Tamen li estas agnostita kiel la plej bona hispana rakontisto de la lastaj 500 jaroj. Pablo Picasso pentris lin, Ernesto Hemingway vizitis lin kaj esprimis, ke Baroja meritintus la Nobelpremion antaŭ li.

Post militaj malvenkoj en Kubo kaj Filipinoj 1898 Hispanio perdis siajn lastajn transoceanajn koloniojn kaj siajn lastajn iluziojn. Formiĝis seniluziigita intelektularo, kiu elmontris ekstreman individualismon kiel komunan trajton. Ili celis spiritan regeneriĝon de Hispanio per individua iniciativo (v. Maeztu) per spirita-politika analizado de la kaŭzoj de la perdo de la iama hispana mondsignifo, per propono de parencaj eŭropaj ideoj (Ŝopenhauer, Nietzsche, Tolstoi, Dostojevskij k.a.) kaj per reakcentado de pure hispanaj historio, kulturo kaj pejzaĝo. Ili konatiĝis sub la nomo „generacio de 98" kaj Baroja, kvankam neinta sian anecon, estas rigardata kiel tipa ties reprezentanto.

Li kreis tre abundan verkaron, ekz. pli ol 100 romanojn. „La arbo de la sciado" (1911) estas inter liaj plej karakterizaj, plej maturaj, plej filozofaj verkoj.

La aŭtoro rakontas, aŭ pli bone: raportas la vivon de la molkora Andrés Hurtado, kiu studas medicinon, laboras kiel juna kuracisto sur diversaj madridaj kaj vilaĝaj postenoj kaj renkontas buntan ĉenon de figuroj el ĉiuj tavoloj de la popolo, kiuj peras la observojn, reflektojn kaj teoriojn, kiujn la aŭtoro volas pritrakti. La heroo komparas konstante idealon kaj realon. Li trovas nur mensogon, senreviĝas kaj ne povas solvi siajn problemojn. Li mortas, ĉar la tokso de la socio venenis lin.

La libro estas pesimisma sed neniel enua. Baroja skribas propran tre precizan sobran stilon. Li estas forta kontraŭulo de vortriĉa retoriko. Senemocie li konstatas, registras la faktojn de la vivo en la tiama Hispanio. Ne mankas amara tragika humoro, kiu memorigas al la tradicioj de Cervantes. (La usona verkisto Don Passos titolis sian eseon pri Baroja: „Rosinante denove survoje".)

„La arbo de la sciado" prezentas sendube multajn aŭtobiografiajn trajtojn. Baroja raportas nur tion, kion li mem konas, mem spertis. Li rigardas sin pli kiel kronisto ol kiel literato.

Sed la sobraj faktoj estas spicitaj per malicaj rimarkoj pri ĉio kaj ĉiu. Li mokas pri la „brua parademo kaj ventkapa naturo de la mediteraneanoj" kiel pri la „anglosaksa persisto". Certa profesoro, „akiris la gestojn kaj la manierismojn de la francoj fanfaronaj". Li avertas: „Ne legu la germanajn metafizikulojn. Ilia filozofio kiel la alkoholo ebriigas kaj ne nutras". Pri la hispana fanatikeco pri la honoro: „Ni faris ideojn kaj ili turmentas nin." Honesta virino ŝajnas al iu figuro „unu el la plej sensencaj kaj amaraj produktoj de la vivo". Kaj kion la katolika Hispanio devis pensi pri: „Protektado de la Sankta Papo ĝenerale utilas al la animo, sed tre difektas la sciencon kaj la industrion?"

La titolo „La arbo de la sciado" estas aludo al la biblia tempo. La esenco de la romano: Konsciencstato povus kompromiti la vivon. „Tia intelektismo kondukos vin al nenio bona." „Inteligento nur kreas bedaurindaĵojn. Feliĉo nur devenas de frenezeco." La amikinon de la heroo velkigis „la laboro, la mizero kaj la inteligento".

Baroja kiel sia heroo serĉis vivkoncepton, sed sin sentis trompita kaj de la filozofoj kaj de la vivo. En sia libro li komparas nur okcidentajn idealismajn filozofiojn, sed estas pruvite ke li konis ankaŭ Marx kaj Lenin. Tamen lia troa individualismo malhelpis akcepton de ideoj de kolektiva agado. Li misfidis kaj kontraŭis tiujn konceptojn same kiel ĉiujn aliajn. Li estis pesimisma anarkisto. Tamen en sia verkado li ĉiam staras flanke ĉe la malriĉuloj kaj malfeliĉuloj. Li ankaŭ sciis, ke nura bonkoreco ne sufiĉas. Tion li esprimas per figuro de postrestinta studento, „postrestinta pri studoj kaj pri ideoj". „Li kredis, ke la tuta sociala problemo estus solvebla per la karitato kaj per la nura ekzisto de bonkoruloj." (Esperantistoj, auskultu!)

Tiu „praktika idealismo" ne sufiĉis al Baroja. Li akcentis la neceson de konstanta agado, eĉ rigardis la agadon kiel pli grava ol la celo mem, kio ne malofte misgvidis lin. Li ne povis venki la kontraŭdirojn inter tia aktivisma principo kaj la de li preferataj nihilismaj filozofioj. (Similajn nihilismajn tendencojn oni observas ankau ĉe certaj postmilitaj, ĉefe usonaj verkistoj, la tielnomata „perdita generacio!)

Restas aldoni, ke Juan R. Pérez verkis aparte ligindan tre bonan aŭtoro- kaj verko-prezenton kaj ke F. de Diego spite de la malfacile transponebla propra stilo de la aŭtoro plenumis senmankan tradukon.

Pio Baroja mem bonvenigis la intencon traduki lian romanon en Esperanton kaj rezignis tantiemojn. Faksimilo de la koncerna letero troviĝas en la volumo.

La nova libro nepre pliriĉigas la esperantistan libromerkaton kaj peras pluan eron el la mondliteraturo.

Linde Knöschke

RECENZO

Waringhien, Gaston: **Ni kaj Ĝi.** *Eseoj* III. Pri religio kaj Arto. La Laguna: J. Régulo 1972. Belliteratura Serio STAFETO 30. Prezo: 350 pesetoj hisp. Eldonkvanto 1500 ekz.

Jen la tria kolektaĵo de eseoj post „Beletro" (1956) kaj la famkonata „Lingvo kaj Vivo" (1959), per kiu la aŭtoro ampleksigas sian riĉan verkaron gravan por Esperanto. Certe – kaj tion sugestas jam la subtitolo – por la internacia lingvo mem tiu ĉi libro ne same gravas kiel la lingve fundamentaj verkoj vortaraj aŭ gramatikaj, ĉe kiuj Waringhien minimume kunaŭtoris. Ja kontraŭe, la aludo al religio repuŝos multajn manojn, kiujn la nomo Waringhien jam igis avide prenemaj. Ĉu li, kiun kelkiuj jam apostrofas lingva papo, nun ankaŭ provas papi nin religie? Ne timu! Minimume li ne provas kristanigi nin.

Li donas materiale riĉan, kritikan esploron pri la grandaj homaj fenomenoj religio kaj arto, esploro pri iliaj enhomaj fontoj kaj pri iliaj historiaj esprimoj. Tiuj sondaĵoj ne formas sisteman kaj kompletan tuton. Kaj ili ne legiĝas science sobre. La esea formo ja permesas liberon por personaj opinioj kaj konjektoj.

Tamen eseo ne samsignifas, ke la lingvo devas esti flirta kaj facillegebla. La libro, kvankam skribita de lingva majstro, ne estas libro por lingva komencanto aŭ por iu, kiu ne ŝatas pensi legante. Malofte oni trovas frazon de malpli ol 30 vortoj. Kaj kelkfoje oni renkontas punkton nur post 100 vortoj. Ne necesas diri, ke la lingvo ne plate restis nur-fundamenta. Pri derivaĵoj kiel „nepereiveco", „neerarivo", „disatomizado" oni do ne grumblu! Aldonita glosaro nomas pli ol 30 terminojn ne entenatajn en Plena Ilustrita Vortaro. Ve al la miloj, kiuj ne posedas PIV! Kelkloke tramontriĝas francismoj. Simpla franco ofte lasas francan „sur" anstataŭ Esperanta „pri", klera franco kiel Waringhien altiĝas ĝis al „super" (meditado super, labori super), se iom konvenas la spaca bildo. Kritikindaĵon li altigas al pliriĉigo. Kompreniĝas, ke propraj nomoj transvestiĝis al fantaziaĵoj kiel Neŭtono, Kantio ktp.

Sed al kiu ni rekomendu la penon studi tiujn pretendemajn eseojn? Iom ortodoksaj Kristanoj ne estos tute kontentaj pri la enhavo. El la „parolo de Dio" ofte nur restas erartraduko kiel sekvo de la plurlingva tradukoĉeno. Eĉ centraj dogmoj kiel la difileco de Kristo rezultas el erarkompreno de la greka vorto „pais" en ĝia dusenco de „sklavo" kaj „knabo". La grekoj akceptis la dipatrecon senproteste, ĉar al la paganestintaj grekoj „la ideo de gravedigo de virino per la spermo de diaĵo havis . . . absolute nenion ŝokantan" (p. 183). Anatomie Waringhien diskutas la demandon, kiamaniere la dipatrino restis virga eĉ post la nasko. Sed pli ol absurdojn naturajn Waringhien sumas kontraŭdirojn en la sanktaj tekstoj mem kaj harstarigajn eldirojn de eminentaj „piuloj". Li montras en tio mirindan scion. Nekredanto nur en proksima intimeco kun kredanta ĉirkaŭularo tiel studadas teologiaĵojn aŭ el dubo aŭ pro

kredrestoj. En tio la leganto memorkomparas Waringhien kun la granda verkisto Anatole France, same franco, kompreneble ankaŭ citita. Sed tiaj studoj nur restas en la vestiblo de scienca ateismo. Materialiston la libro ne tiklas. Kaj por ke oni ne taksu Waringhien materialisto, li konsente citas Jean Jaurès: „Se mi ne akceptas la infanan spiritualismon, mi ankaŭ ne povas akcepti, kiel definitivan evangelion, tiun suprajan materialismon, kiu pretendas ĉion eksplikl per tiu plej granda nekonataĵo, kiun oni nomas materio" (p. 11). Sed kial do akcepti iun suprajan materialismon? Ĉu Waringhien ne konas alian aŭ ne opinias iun materialismon alia? La tragika persono de Jaurès en sia duvizaĝeco trafe karakterizas la lokon, kie Waringhien staras kaj la (ne)utilon de tia interstarado.

„Ĉio estas ebla" por tia agnostikulo „– eĉ Dio" (p. 234). Eblas, ke la novpozitivistoj pravas, eblas ke ne. Ĉiu fantomas prave, malprave en tia nedecida koncepto. La frazo, ke vivo „ŝajnas, en la senfineco, ia kromprodukto, formiĝinte akcidente sur kadukiĝanta planedo" (p. 231) gustas laŭ la (nenomata) franca ankaŭfilozofo Jacques Monod. Sed same ankaŭ la rifuzitaj opiniaroj (kaj ĉiuj ja estas iom rifuzitaj) iel samvaloras antaŭ Waringhien. Al tiu ĉion komprenanta kaj multon pardonanta alta juĝisto kvazaŭ egalas de ia psikologieca vidpunkto dekstro kaj maldekstro, religio kaj marksismo. Bone respeguliĝas la intelektula situacio en ĥaosa, pesimisma, iom nihilismema disfalanta socia formacio. Tio evidentiĝas ankaŭ en la lasta triono de la libro, kiu surskribiĝas „pri arto". Waringhien bedaŭras la perdon kaj disfalon de „vera" arkitekturo antaŭ „ni, erarvagaj idoj de neonlumigata, gasvenenata kaj komputorobsedata jarcento" (p. 270), la perdon de mezuro kaj sereneco. Li skribas pri la maŝino, kiu „sklavigas sian mastron". „Ĝi faris el li kriplulon, kiu ne plu povas translokiĝi sen sia veturilo aŭ pensi sen sia diktafono" (p. 326). Li salutbedaŭras la detruon de racio. Kaj post distanciĝo de „homoj, kiuj kredas je la neceso de forta socia disciplino kaj de la forofero de individuaj orginalecoj al la kolektiva uniformeco" (p. 330) nominte Stalin, Breĵnev, Mao kaj Hitler, li subite kaj apenaŭ konvinke provas optimisman finon esperante, ke la modernecaj artistoj „eble antaŭfiguras ian novan arton, kiu elfontos el ankoraŭ ne konceptebla nova mondrigardo. Eble kun ili koncipiĝas ia nova speco de homaro, kiu scias?" (p. 332).

Kial ne skribi tian libron? Ĝi respegulas la opiniaron ne de la Kristanoj kaj ne de Marksistoj, sed certe proksimume de multaj personoj vivantaj en la lasta stadio de kapitalismo, kiuj sincere cerbumas pri la sorto de la homaro. Kial ne diskuti kun ili pri tiu sorto fine por ni ĉiuj komuna?

D-ro P. W. Ruff

Kie aboni al „Paco"

Abonprezo: Por kapitalismaj landoj – 15 fr. fr. aŭ egalvaloro. Por socialismaj landoj – laŭ la subaj indikoj.

Aŭstrio: S-rino A. Sindl, A-3108-ST-PÖLTEN, Wagram, Traiseng. 26:

Belgio: Edm. LÖDÖR, 385 Brusselsesteenweh, 9001 GENTBRUGGE:

Britio: P. Hewitt, 3 Elmdale, Madeline road, PETERSFIELD-Habts:

Bulgario: Bulgara MEM-komitato, Bulv. Hristo Botev 97, Sofia — 3 lv.

Ĉehoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-sekcio, Poštovni Schranka 8, 120 21 PRAHA-2: — 20 k.

Danlando: Egon STARUP, Vingetoften 34 2730-HERLEV

Finnlando: Erkki JÄRVINEN, Ukonkivenpolki 2-I-68, 00440-HELSINKI-44:

Francio: Federation esperantiste du Travail, 179, rue Ordener, 75018 PARIS (p. ĝ. k. Paris N-ro 902-52):

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la germana Kultur-Ligo Charlottenstr. 60, 108-BERLIN: — 6 m.

Hungario: Hungara MEM-komitato, Kenyermezö utca 6, BUDAPEST-VIII: — 30 f.

Italio: Mauro La Torre, via De Carolis 119, I-00136 ROMA (pĝk. 1/44162):

Japanio: Kumaki Hideo, PO Box 17, Edogawa, TOKIO (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio):

Jugoslavio: Dim. BJELANOVIČ, str. Zahumska 23/b, 18/I 11000-BEOGRAD:

Kubo: Raul Juarez SEDENO, Apartado 570 CAMAGÜEY

Nepalo: KESHAB RAN JUSHI, Esperanto-Societo, 10/319 Bhosiko Tole, KATHMANDU:

Norvegio: Ildefonso NUNEZ, Calle 2 de Mayo, 796-CAJAMARCA:

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna n-ro 6, Warszawa:

Polopa Respubliko de Koreo: Korea Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 16, PJENJANG:

Rumanio: S-rino Irma FÜLÖP, str. Calan 12, etj. I, SIBJU:

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj (S-ro Kuznecov), Kalinina 14, MOSKVA K-9: — 1.80 r.

Svedio: K. Kvist, Rinmansgatan 13, S-660-92 – DEJE: (p. ĝ. k. N-ro 442478):

Usono: Jim DEER, 12946, NE Hancock, **Portland**, Oregon 97230:

Vjetnama Demokratia Respubliko: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68 Ly Thoung Kiêt, HANOJ

Aliaj landoj: Ĉu turni sin al unu el la ĉi-supraj adresoj, ĉu aboni ĉe S-rino G. ROUX, Route de Villeneuve, 47150 MONFLANQUIN (Francio) (pĝk. Nantes 816-52).

Redakta komitato:

William GILBERT (Francio), ĉefredaktoro
Detlev BLANKE (GDR)
Kimiati KURITA (Japanio)
Stanislaw SWISTAK (Pollando)
Nikola ALEKSIEV (Bulgario)
Arta aranĝo: Kiril DRAJHEV (Bulgario)

Kunlaborantoj:

Kolomano KALOCZAY (Hungario)
Asen GRIGOROV (Bulgario)
D-ro Istvan SZERDAHELYI (Hungario)
D-ro Magomet ISAEV (Sovetunio)
Doc. S. N. PODKAMINER (Sovetunio)
Mihaly GERGELY (Hungario)
Rudi GRAETZ (GDR)
Oldrich KNICHAL (ĈSSS)
Antonie SINDL (Austrio)
Dao ANH KHA (DRV)

Kien Skribi

Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod II, SOFIA – 13, Bulgario.

Vicprezidantoj: Karl Kvist, Rinmansgatan 13, S-660 – 92. DEJE, Svedo.

S. N. Podkaminer, ul. Školjnaja 48/7, 197010 LENINGRAD, USSR

Generala Sekretario: Drahomir Kočvara, ČSSR

Sekretarioj: Hideo Kumaki, P. O. Box 17 EDOGAWA, TOKIO, Japanio.
D-rino Magda Šaturova, Posta 1, D 10 Slovaka Esperanto-Asocio, BRATISLAVA, ČSSR.

Centra Administranto: Boris Popov, Bulgara MEM-Komitato bul. Hristo Botev 97, Šofia 3, Bulgario

Kasistino: Germaine ROUX, 47 150 MONFLANQUIN, Francio (pĝk. 816-52) Nantes.

Grave: abonpagojn el socialismaj landoj direktu al SOFIA 3, bul. Hristo Botev 97, por „PAĈO". el ne-socialismaj landoj – al la kasistino.

Dimanĉa trankvilo

Ekde kelka tempo la danej policistoj ĝuas nekutiman trankvilon. La malpermeso, dimanĉe uzi aŭtomobilojn, kaŭzis rimarkeblan malkreskon de semajnfinaj ŝteldeliktoj. Evidente la ŝtelistoj ne emas bicikli al la „laborejo". Anstataŭe oni nun rimarkas pli fortan ŝteladon dum la ceteraj tagoj de la semajno.

Dankon al „Wochenpost"

La konata en GDR semajna revuo „Wochenpost" iniciatis kampanjon solidare al Ĉilio inter artistoj de GDR. Tiuj disponigis por disvendo grafikaĵojn, el kiuj ankaŭ originas la kovrilaj grafikaĵloj. Ni kore dankas al „Wochenpost" por la afabla subteno.



Brazilio

Dez. koresp. Naide Coêlho, Rua General Sampaio 1373, *Fontaleza*, Cearà

Britio

Bibliotekisto, 30 jara, dez. koresp. kun fraŭlino inter 20–30 Tim Charr, Crewe, *Cheshire*, Gordon House, 211, Bedfordst

Bulgario

Laboristo dez. koresp. pri turismo, interŝanĝi bk, Hristo Gencev (28 jara) *Gabrovo*, str. Trakia 38/4

60 junaj esperantistaj gelernantoj dez. koresp. kun germanaj gejunuloj (12–15 jaraj). Dimitar Petkov, *Gorna Orjaĥovica*, str. Vâstaniĉeska 1

Kun plezuro renovigas la korespondadon kun siaj geamikoj, Sider Denev Pavlov, str. A. Veleŝki, n-ro 2 k. 22, *Sviŝtov*

GDR

Fraŭlo, 23-jara (ĉefio, portempe laboranta en GDR) dez. koresp. pri ĉiuj temoj, Michal Brabenec, *Berlin 102*, Postfach 1

Material-ekonomiisto, 55 jara, Heinz Siegel, *DDR - 92 Freiberg*, Dammstr. 49c

Instruisto, 37 j. kun instruistoj el aliaj landoj, Joachim Erler, *DDR - 943 Schwarzenberg*, Karlsbader Str. 6

Masonisto, 44 j. interŝ. bk, dez. koresp. pri profesiaj problemoj Esseln, Helmut, *DDR - 943 Schwarzenberg*, Külzstr. 7

Lernantino, 15 j. pri la tuta mondo. Elvira Kanis, *DDR - 6506 Ronneburg*, Karl-Liebknecht-Str. 31

Studento de ekonomio serĉas kontakton kun aktivaj ŝakistoj. Hahlbohm, *DDR - 117 Berlin*, Mittelheide 46

La esperanto-grupo en Dresden aranĝos ekspozicion okaze de la 25-a datreveno de la fondiĝo de nia ŝtato. Bv. sendi materialojn. Ni rekompencas per prspekto pri GDR aŭ nia jurnalo „der esperantist". Bv. skribi al s-ino Evelin Berndt, *DDR - 806 Dresden*, Helgolandstr. 9b

Dipl. sportinstruisto, komencanto, dez. interŝ. bk, Joachim Kretzschmer, *DDR - 9312 Kurort Oberwiesenthal*, Keilbergstr.

Kiu disponigos por fotokopii „Internaciisto"-n n-roj 29/30, 49, 50, „Sur Posteno" (Amsterdam) n-roj 1–38, 41–48, 52, 64 . . .

„La nova etapo" (Moskvo), ĉiuj numeroj? Skribu al Detlev Blanke, *DDR - 108 Berlin*, Charlottenstr. 60, Kulturbund, Abt. Esperanto

Instruistino, 30 j. dez. koresp. pri folkloro, popola artmetio, turismo (intergastigado), pedagogiaj problemoj. Brigitta Grödel, *DDR - 8256 Weinböhla*, Marienstr. 4

Hungario

Ministo, 28 jara, lernas germanan, italan, rusan, anglan kaj latinan lingvojn, dez. koresp. kun 2-3 familioj, János Beleznai, *H - 2800 Tatabanya*, Györi u. 16

Pioniroj 10–13 jaraj dez. koresp. skribu al Esperanto-grupo en 23. ĝenerala lernejo *3534 Miskolc*, Tonicsics tér 1/a

Knabino, 15 jara dez. koresp. Terézia Menyhaart, *5131 Jázapasi*, PF 23

knabo, 15 jara dez. koresp. kol. pm Zoltán Somogyi *1035 Budapest III*, Vörösvaŕi u 21 V. 15

Gimnazianino 18 jara, Nagy Eszter, *7633 Pécs*, Lotz Károly u 19

Italio

Dez. koresp. kun geknaboj itale, esperante, angle, kol. pm. bk, Tataro Arcangelo, Via Buzzi 5, *23100 Sondrio*

Jugoslavio

Jugoslavaj knabinoj dez. koresp. Skribu al „Esperantis TINA kurso" *YU 41000 Zagreb*, Ljubice Gerovac 1

Nederlando

Ni peras korespondantojn. Skribu al E. C. van Groningen Rud. *Amsterdam 1016*, Agricolastraat 22

Kubo

Dez. koresp. Orlando Sanz Menendes, Correa 210, entre Flores y Serrano, Santos Suarez, *La Habana*

Studento, 22 jara, dez. koresp. pri espo-movado, literaturo, arto, historio, José I. Quesada, Rena Bobre 114, *Habana 1*

Laboristo, 28 jara, dez. koresp. kun GDR-anoj kaj tutmonde, kol. pm kaj kol. bk Miguel Hernandez A. 60 729 Altos Esq 7ma B. Marianao 13, *Habana*

Pollando

Interŝ. pm, bk, esperantajojn Mlozi, ierz Malinowski, *59-902 Zgorzelec*, ul. Tuwima 28/6

studento, 20 jara, interesiĝas pri elektroniko, distra muziko, dancmuziko, turismo, interŝ. notarojn, kanzonojn, diskojn, sonbendojn, Staszwski Stanislaw, Al. Wojska Polskiego 37/39, *97-200 Tomaszow Mazowiecki*

Ekonomiisto, 28 jara, pri turismo, muziko, sporto, interŝ. pm, diskojn, bk, Mieczyslaw Porowski, *45-774 Opole*, ul. Dambonia 133/15

Rumanio

Dez. koresp. Anitei Maria, 30 Decembrie 66, *Tg. Heamt*, Jud. Heamt

Soveta Unio

Gekomencantoj dez. koresp. kaj interŝanĝi pk, pm, literaturon, alumet-etikedojn, insignojn. Ili estas 14–40 jaraj. Skribu al s-ro Heiki Kalam, *Viljandi*, Musta Tee 5, Estona SSR s-ro Jaanus Kaljula (lernanto de 8-a klaso), *Viljandi*, Posti 14-7

Estona SSR
f-ino Helina Loit (laboristino), *Aidu* s/jsk, Muri Puukool, Estona SSR

f-ino Ebe Meiesaar, *Viljandi*, str. Lääne 16 (Laboristino), Estona SSR

s-ino Viivi Oppo (*oficistino*), Viljandi, str. Pöhja 2b-6, Estona SSR

s-ino Ly Palu (kudristino), *Viljandi*, str. Leola 38-4, Estona SSR

s-ino Helmi Rahumetes (kuracistino), *Viljandi*, str. Kivi 5-2, Estona SSR

s-ro Ruuben Rahumetes (kuracisto), *Viljandi*, str. Kivi 5-2, Estona SSR

s-ro Rein Saag, *Viljandi*, str. Jakobsoni 36-1, Estona SSR

s-ro Udo Uibo (lernanto de la 11-a kl.) *Viljandi*, str. Side 5-1, Estona SSR

s-ro Peeter Vaher (seruristo), *Viljandi*, str. Uuveski 17-4, Estona SSR

s-ino Tiiu Visnap (medicina flegistino), *Viljandi*, str. Pioneeri 23-3, Estona SSR

Represo de la anoncoj petata

Infanĝardenistino, 19 j. pri politiko, kulturo, artbildoj de muzeoj, Majboroda Taja, *330091 Zaporosje-91*, N-Dnerovskaja 14–05

Inĝeniero, 32 j. serĉ. kontakton kun numismatikuloj, kolektantoj de kaktoj, studantoj de japana lingvo, M. Denisov, *184280 Monĉegorsk*, Murmanska obl, Leningrad NAB 24–83

Filologo, pri lingvoj, speciale Esperanto, sporto, literaturo, kol. bk, pm, alumetetikedojn, Aleksandro Jevdokimov, *480091 Alma-Ata*, Glavpoĉamt Do vostreb

Kolektanto de esp. literaturo kaj poŝtkartoj dez. korespondi kun la tuta mondo, ankaŭ en germana lingvo. Endel Pajula, *Ambla*, Paide/raj Estona SSR

Studento de fremdaj lingvoj, pri lingvoj, literaturo, junularaj problemoj, pm, Vladimir Opletajev, *625026 Tjumen*, ul. Melnikajtle 93a, 305

Serĉas korespondamikojn meze de filatelistoj por poŝtmarka interŝanĝo. Leo Teder, Nomme sovhoss, *203622 Kilingi-Nómme*, Estona SSR

Kurmanaviĉiute, *Stakliŝkes*, Prienu raj, Litova SSR

Lernanto, 15 j., pm, muziko, Laimus Straznickas, *Stakliŝkes* Prienu raj, Litova SSSR

Lernantino, 13 j, interesiĝas pri fotoj de aktoroj, Inita Alvatere, str. Voroŝilova, 15 b–2, *228730 Aluksne*, Latvia SSR

Lernanto 14 jara, kol. bk, pm, Aleksandr Siliĉ, glavpoĉtamt, do vostreb, Kopejkina M. J. *340066 Doneck*,

Dez. koresp. precipe kun GDR, Pollando, CSSR, Nedelĉo Iliel, str. Nolaya n. 4, *Mokraus*, distr. Saratov, reg. Fyodorolka

Studento de matematiko, 22 j dez. koresp. pri pm (pentroarto, kosmo, sporto, floro, faŭno), en esp. rusa, angla, hungara, germana, franca, ĉeĥa, Vladimir Ivanoviĉ Lisenko, obl. Zakarpatskaja, *Ujgorodo* 294000, ul. Sovetskaja 98 kv, 3

Studentino, 19 j, Interŝ. bk, pm, *310008 Ĥarkov*, primerovskaja 8 kv. 6

Studentino de matematiko, 21 j, bk, diskoj, insignoj, Jelena Ŝestarova *310032 Ĥarkiv-32*, ul. v. Gjugo 18, Ukraina SSR

Esperanto-rondo, 25 junuloj, lernantoj kaj studentoj 16–25 jaraj, dez. koresp. tutmonde. Mikaelo Gilinskij, *450025 Ufa*, ul. Komunistiĉeskaja 75 kv 22

15 knabinoj (16 jara), komencantoj, en fervoja mezteknika lernejo, membroj de Societo de amikeco kun GDR dez. koresp. kun geamikoj el GDR. Anja Vojnaroviĉ, Esperanto-grupo, PTU-43, *343671 Avdeevka*, Doneckoj obl. Ukrainio

15 knaboj (16 j.) dez. koresp. kun Rumanio kaj 12 knaboj (16 j.) kun Jugoslavio. Komuna adreso Anja Vojnaroviĉ, Esperanto-klubo, PTU-43, *343871 Avdeevka*, Doneckoj obl., Ukrainio.

Esperanto-grupo dez. koresp. speciale kun grupo aŭ esperantistoj el Berlin, GDR. Skribu al J. V. Lupickij, *310072 Harkovo*, 23. aŭgusto 62-127.

Inĝeniero, 23 jara, esperantisto plej norda en la mondo, dez. koresp, kun ĉ. l. pri ĉ. t. kol. pentrajohavajn pk kaj pm. Aleksandr Vajsberg, Murmanskaja obl. *184280 Monĉegorsk*, abonkesto 53.

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio Germana Kulturligo / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto de GDR). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 22 59 91. Respondeca redaktoro: Detlev Blanke, Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Dr. Hans Eichhorn, Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm, Rainer Knapp, Willi Vildebrand, Redakcia fino: 20a Februaro 1974. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.

AG 203-40-74



lasta paĝo: Liselotte Klepper-Purjahn: „Ĉilio 1973"
titolpaĝo: Fritz Kremer „Por Viktor Jarra"

La fotoj estas ricevitaj dank' al la afabla helpo de „Wochenpost" (Semajna Revuo)